

SKIZO  
PRI LA  
ESPERANTA  
LITERATURO

PRILABORIS  
VLASTIMIL NOVOBILSKÝ

ELDONIS  
ESPERANTO-JUNULARO  
ĈE DOMO DE KULTURO EN OPAVA  
1956

## ENHAVO DE LA SKIZO

Antaŭparolo de la prilaborinto

Fonto - literaturo

Uzitaj mallongigoj

Enkonduko

## I. P A R T O

Aŭtoroj de la originala kaj tradukita literaturo en Esperanto  
(la ĉeĥajn vidu en la dua parto).

W. Auld

H. Adamson

J. Baghy

L. de Beaufront

K. Bein (Kabe)

L. Belmont

P. Bonnemann

E. Boirac

M. Boulton

K. Bourlet

H. Bulthuis

M. C. Butler

M. Carlsson

T. Cart

J. G. Casas

A. Dambrauskaus

G. Bogenhamp

V. N. Devjatnin

J. Dinwoodie

H. Dresen

E. Drezen

L. Einstein

S. Engholm  
V. Erošenko  
J. Forge  
J. Francis  
A. Grabowski  
M. Hankel  
E. A. Haugen  
B. P. Heywood  
H. Hodler  
N. Hohlov  
T. Jung  
K. Kalocsay  
A. Kofman  
I. Krestanov  
N. Kurzens  
E. Lanti  
H. Luyken  
E. Miħalski  
T. Morariu  
P. Neergaard  
V. N. Nekrasov  
E. Privat  
R. Rossetti  
C. Rossetti  
I. Rotkviĉ  
E. de Saussure  
R. Schwartz  
K. R. C. Sturmer  
F. Szilagyi  
M. Šidlovskaja  
I. G. Širjaev  
P. Thorsen  
L. Totsche

H. Trompeter  
H. Vallienne  
G. Waringhien  
L. L. Zamenhof

## II. PARTO - ĈEĤA

S. Schulhof  
S. Kamarýt  
T. Čejka  
O. Ginz  
R. Hromada  
J. Kořínek  
V. Lorenz  
M. Lukáš  
Moraviaj Esperanto-Pioniroj  
F. Omelka  
K. Píč  
T. Pumpr  
E. Seemannová-Suchardová  
J. Šupichová  
E. Urbanová  
Š. Urban  
J. Vondroušek

## III. PARTO - ALDONO

Mallonga listo de neologismoj  
Plej gravaj literaturaj revuoj  
Faka literaturo en Esperanto  
Verda Ĉaro de Julio Baghy  
Mallonge pri la E-metrikaj  
Korektoj de eraroj

## ANTAŬPAROLO

Kreskanta intereso pri la Esperanta literaturo inter la junularo kaj urĝa nezo de lernotekstoj por la Someraj Esperanto-Tendaroj de la ĉeĥoslovaka E-junularo, instigis min al sistema kompilo de miaj notoj priliteraturaj kaj ilia aperigo en formo de konciza skizo.

La tasko estis tre malfacila, ĉar ĝis nun ne ekzistas detala kritika libro pri la Esperanta literaturo. El la malsupre menciita fonto-literaturo mi povis ĉerpi nur parte. Sekve la Skizo estas nur helpa lernoteksto kun multaj malperfektaĵoj, kiujn la prilaborinto konscias.

La Skizo ampleksas nur iomete riĉigitan studmaterialon, kiun mi prelegis en SET - 1955 kaj 1956. En ĝi vi trovos respondojn al ekzamenaj demandoj el la DEMANDARO, kiun eldonis la junulara Ekzamena Komisiono, por normi apartenon de la gesamideanaro al opaj junularaj lingvaj kategorioj.

Mi deziras, ke mia modesta kompilaĵo veku intereson kaj amon ĉe junaj geesperantistoj al la Esperanta literaturo, kiu antaŭ 60 jaroj ekiris triumfan vojon.

Miaj sinceraj dankoj apartenas al ĉiuj, kiuj per siaj afablaj informoj kaj konsiloj helpis kompletigi tiun ĉi Skizon. Apartan dankon mi ŝuldas al dro Tomáš Pumpr, kiu al mi havigis gravan materialon kaj al s-ano Vladimír Novotný, kiu kompleze maŝinskribis la tutan tekston.

Ústí nad Labem, septembron, 1956.

Vlastimil Novobilský

## FONTO - LITERATURO:

Edmond Privat: Vivo de Zamenhof, 1920, Literatura Mondo, Budapest

Enciklopedio de Esperanto, 1933, Literatura Mondo, Budapest

Lajos Totsche: De paĝo al paĝo, 1932, Literatura Mondo, Budapest

Ivo Lapenna: La internacia lingvo, Faktoj pri Esperanto, 1954, London

Kolomano Kalocsay-Gaston Waringhien: Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro, 1932, Literatura Mondo, Budapest

Jiří Kořínek: Esperanta literaturo, /prelego, manuskripto/

J. Glück: El la klasika periodo de Esper. eld. J. Munsses-Purmerend

K.Kalocsay: Lingvo Stilo Formo, Literatura Mondo, /1933/ Budapest

## KELKAJ UZITAJ MALLONGIGOJ

Kp	.....	Komparu
E.	.....	Esperanto, Esperanta
Z, G, P	.....	Zamenhof, Grabowski, Privat, respektive
pĝ	.....	paĝo
LK	.....	Lingva Komitato
UEA	.....	Universala Esperanto-Asocio
UK	.....	Universala Kongreso
ICK	.....	Internacia Centra Komitato
vd	.....	vidu

M M M

M M

M

## ENKONDUKO

En 1957 ni festas 70-jaran ekziston de la lingvo Zamenhofa. Sen bruo kaj bombasta propagando aperis en 1887 libreto, kiu racie solvis centjaran problemon pri la Internacia Lingvo.

Dro Zamenhof starigis sian lingvon sur sanajn principojn, kiuj certigis al ĝi senriskan evoluon. La ĉefa principo de Esperanto estas logikeco, kiu ne permesas nenecesajn lingvajn komplikajojn kaj kontraŭraciajn gramatikajn regulojn. Sed Esperanto ne estas regata de la logiko blinda, kiu kreus el la lingvo sekan matematikon, kiu nur grize perus interŝanĝon de faktoj.

Estas jam longe forpasinta tempo, kiam oni esperis fari el la Internacia Lingvo komercan kodon, kiu servus nur kiel helpilo en la internaciaj rilatoj de komercistoj. Hodiaŭo pretendas de la Internacia lingvo la samajn eblojn kiel de la lingvoj naciaj. Oni postulas hodiaŭ, ke tia lingvo helpu ne nur en la scienca kaj komerca rilatoj, sed ke ĝi posedu ankaŭ artismajn kvalitojn. Kaj al tiuj ĉi postuloj nia lingvo Esperanto plene respondas, dank' al multaj konataj kaj nekonataj esperantistoj, kiuj en la unua etapo kaj de tiam ĝis nun, ne atendante propran profiton, cizelis kaj tornis la lingvon.

Efektive! La apliko de Esperanto sur la literatura kampo kondiĉis pluan sukcesan evoluon kaj fakton, ke Esperanto hodiaŭ povas servi kiel elprovita lingvo en kiu ajn branĉo de la homa agado.

K. Kalocsay diras: "Kaj unu el la plej geniaj trovaĵoj de la Majstro estis, ke Esperanton, tuj post ĝia naskiĝo, li fianĉigis al la poezio ... Li sciis, ke nur la poezio povas spiri vivon en la argilfiguron de la verko, nur ĝi povas fari el grizaj vortoj, enuaj reguloj, sekaj skemoj vere vivan estaĵon, en kiu oni mire rimarkas la pulsbaton de l' vivo. Kaj vere, oni povas diri, ke ne

per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton. Oni povas diri, ke la tuta Esperanto estas poezia lingvo."

Post dro Zamenhof venis aliaj verkistoj kaj poetoj, kies sentemaj koroj vartis kaj nutris la internan spiriton de la lingvo, kiu donis al ĝi harmonion, flekseblon, senperecon kaj apartan ĉarman aromon.

Oni ofte diskutis, ĉu la Lingvo Internacia rajtas havi sian literaturon, siajn poetojn. Antaŭ ol respondi tiun ĉi demandon ni trarigardu Esperantan bibliotekon. Granda nombro da originalaĵoj kaj tradukitaj verkoj evidentigas, ke la demando estis mise starigita! La Esperanta literaturo jam ekzistas kaj oni vane provas a priori pruvi ĝian neeblon. Oni difinas iam la literaturon, kiel "arton krei belon per vortoj". Se la verkoj, kaj poeziaj kaj prozaj, estas do tiel abunde skribataj en Esperanto, do ĝi devas posedi kvalitojn, per kiuj oni la Belon povas krei.

Estas interese kaj instrue studi evoluon de la literatura lingvo Esperanta. Diversajn evoluajn etapojn ni renkontas, kun apartaj idealoj koncerne la lingvon. La Esperanta literaturo vivis tempon de freŝa disfloro, post kiu venis stagno, denove alternita de la reviviĝo.

Akademiano I. Rotkviĉ karakterizas nunan nivelon de la lingvo-evoluo jene:

"Dinamiko de nia lingvo ankaŭ nun pulsas barorompe, verkistoj ankoraŭ ĉiam tornas frazojn en fosforeskajn spiralojn kaj poetoj elkisas sorĉajn tonojn de sia fluto, sed la riĉaĵoj de la lingvo amasiĝas nur sur la surfaco, oni dislarĝigas periferion de la lingvo, konkerante novajn radikojn. Sed, bedaŭrinde, oni iel malzorgas la internan potencon kaj esprimeblon, kiuj kaŝiĝas en la balgaj krispoj de Esperanto kaj kies elminado dispordus novajn, matenfreŝajn perspektivojn."



La sekvantaj ĉapitroj konatigos vin koncize kun verkistoj kaj poetoj, kiuj helpis krei Esperantan Parnason.

Estimu ĉiam ilian laboron, kiu, ne atendante rekompenco, paŝo post paŝo forĝas Esperanton en lingvon, kiu estos plene kapabla plenumi sian venontan historian taskon.

Memoru ankaŭ, ke "ĉiu popolo havas tian literaturon, kian ĝi meritas". Ankaŭ ni, per nia intereso kaj intima kunsento, klopodu elmeriti literaturon plej altan.

## LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF

**Biografio.** L. Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en urbo Bialystok - tiama rusa Polujo. Lia patro kaj avo estis instruistoj de lingvoj. Ankaŭ por la juna Ludoviko fariĝis homa lingvo la plej kara objekto en la mondo. Pleje li ŝatis tiun lingvon, en kiu li estis edukata t.e. la lingvon rusan, revante fariĝi iam granda rusa poeto. Efektive dum sia frua junaĝo li skribis diversajn versaĵojn, kaj en sia 10-a jaro verkis 5-aktan tragedion. Sed ankaŭ aliaj lingvoj logis lian atenton. Krom la rusa, pola, germana kaj franca li teorie konis ankoraŭ 8 aliajn.

Evoluon de la animo de Zamenhof forte influis la nobla patrino, kiu konstante instruis al li, ke ĉiuj homoj estas fratoj kaj devas ami unu la alian. Sed en la stratoj de sia naskiĝurbo li devis konstati ĝuste la malon. Li atestis sovaĝajn kverelojn inter la kvar gentoj, kiuj loĝis tie: poloj, germanoj, rusoj kaj hebreoj. Lia pasia amo al la rusa lingvo estis pagata per malamo: li konvinkiĝis, ke nur ekskluzivaj mastroj de tiu ĉi lingvo nomas

sin homoj, kiuj premegas kaj persekutas ĉiujn aliajn. Observoj de la stratkvereloj kaj teruraj pogromoj kontraŭjudaj pensigis

Zamenhof pri tio, ke la diverseco lingva estas la esenca kaŭzo de la interganta malamo. Jen kie ĝemis la unuaj ideoj pri lingvo internacia, fratigonta la tutan homaron.

En la jaro 1869 Z. eniris la Bialistokan realan gimnazion. Kvankam lia sano estis tre malforta, tamen li estis ĉiam la unua en sia klaso. En 1873 la tuta familio transloĝiĝis al Varsovio, kie la patro fariĝis instruisto pri la germana lingvo en reala gimnazio. En Varsovio Zamenhof finis en 1879 filologian gimnazion kaj forveturis Moskvon por studi en tiea medicina fakultato. Pro malbona financa stato de siaj gepatroj li devis reveni Varsovion kaj ĉi tie fini en 1885 siajn altlernejajn studojn. En vilaĝo Vejseje Zamenhof ekpraktikis. 4 monatoj de kuracista laboro montris al tre impresiĝema animo de Zamenhof, ke ĝi ne taŭgas por la malfacila praktiko de la ĝenerala medicino. Tial li partoprenis okulistan kurson en Vieno kaj fariĝis okulkuracisto (1886).

En la jaro 1887 Z. edziĝis al Klara Silbernik, kiu per sia mono kaj entuziasmo fidele helpis efektivigadi celojn de sia edzo. Financa situacio de la junaj geedzoj ne estis tre hela: Esperanto baldaŭ forglutis la tutan doton kaj la kuracista praktiko ne povis kovri la elspezojn. Komenciĝis la plej amaraj jaroj por Zamenhof: li devis forlasi Varsovion kaj serĉi sian panon en alia loko. Ne trovinte ĝin en la suda Rusujo li revenas al Varsovio, esperante perlabori pli multe da mono. Vane. Li transloĝiĝas al Grodno, sed eĉ ĉi tie li ne povis kovri elspezojn de la maturiĝantaj infanoj. Laŭ la insista peto de sia bopatro li revenas Varsovion por la lasta provo. Per monrimedoj de sia bopatro, A. Silbernik, li flne sukcesas grandigi sian praktikon kaj ekvivi pli trankvilan vivo. De la jaro 1903 lia financa situacio jam permesas al li partopreni persone internacian esperantistan movadon.

Dro Zamenhof havis unu filon Adam, kies profesio estis ankaŭ okulkuracisto. Post la morto de la patro Adam

anstataŭis lin en la kuracejo en strato Dzika 9. Ankaŭ la unua filino Sofja fariĝis kuracistino. La dua filino Lidja plej fidele sekvis la vojon de sia patro instruante Esperanton kaj partoprenante religian movadon Bahaismon. Ŝi pereis dum la dua mondmilito en germana koncentrejo. Literature aktivaj fariĝis du fratoj de dro Z., Felikso kaj Leono. Felikso administris la movadon kaj verkis multajn artikolojn kaj poemojn, kiluj esatis kolektitaj en libron "VERKARO DE FEZ".

Zamenhof laboris ĝis sia lasta vivo-momento. Morto faligis lin la 14-an de aprilo 1917, kiam eksplodoj de bomboj sonis tra la mondo kaj minacis por ĉiam pereigi noblajn idealojn de la mortanta Majstro. Li ne malesperis: tra la uragano li profete vidis novan homaron, leviĝantan el la ruinoj de la malnova mondo, kiu efektiviĝos liajn sonĝojn.

La penso, krei internacian lingvon, akompanis dron Zamenhof de la frua junaĝo. La unua primitiva formo de Esperanto estis preta vintre 1878 kaj tiam Zamenhof kun siaj gimnaziaj kolegoj aranĝis feston, kiun ili nomis "tago de vivigo de la internacia lingvo" (Lingwe universale). Dum la universitataj studoj li daŭrigis siajn laborojn. Li ne rezignaciis eĉ kiam lia patro forbruligis ĉiujn liajn lingvajn notojn, timante pri la sanstato de sia filo. En la jaro 1881 ni konas jam 3 malsamajn projektojn de la lingvo; nur en la jaro 1885 ĝi ricevas definitivan formon. Poste li devis atendi ankoraŭ du jarojn serĉante eldoniston.

Ludoviko Lazaro Zamenhof estis malaltstatura homo, kun grizeta barbeto, granda frunto kaj kalva kapo; li portis pormiopajn okulvitrojn; li misprononis la sibilantajn konsonantojn. Dro Zamenhof estis pedante ordama en la ordinara vivo, timema antaŭ publiko, malinklina al ĉiuj oficialaj ceremonioj, nature modesta kaj pacama, li penis mildigi ĉiujn konfliktojn. Li estis idealisto: per sia senmezura

amo li klopodis alporti almenaŭ iom da helpo al la fizike kaj morale blindiĝinta homaro.

## **Verkaro de L. L. Zamenhof:**

### **1. Verkaro originala**

a) verkoj prilingvaj

#### **MĚŽDUNARODNYJ JAZYK. Predislovije i polnyj učebnik. (Dlja ruskich). Dro Esperanto**

La libro aperis la 14-an de julio 1887 ĉe eldonejo Kelter en Varsovio. La libro konsistas el 40 paĝoj, kovrilo kaj granda paĝo. Prezo 15 kopekoj. Sur la titolpaĝo krome troviĝas jena devizo: "Por ke lingvo estu tutmonda ne sufiĉas nomi ĝin tia." Samjare Z. eldonis ankaŭ francan, polan kaj germanan tradukojn de libro. La enhavo estas jena: Antaŭparolo, 16 gramatikaj reguloj, Rkzercaro kaj Universala vortaro kun 917 radikoj. Tiu ĉi unua lernolibro de Esperanto estas ofte nomata la UNUA LIBRO.

**DUA LIBRO** (1888) Ĝi estas skribita jam komplete en Esperanto. Same kiel en la Unua libro ni renkontas ŝaĝan prudenton kaj toleremon de Zamenhof: "Nur la uzo ellaboros definitivajn regulojn; ... ne venis ankoraŭ tempo, ke ni estu tro pedantaj..." ktp. Li donas al la lingvo liberan-evolupovon.

**ALDONO AL LA DUA LIBRO** (1888). Broŝuro, en kiu Z. anoncis decidon de la Amerika Filozofia Societo kunvoki kongreson, por decidi definitivajn formojn de la internacia lingvo.

**FUNDAMENTA KRESTOMATIO** (1903). Libro de la modela stilo. Zamenhof diras en la antaŭparolo: "Ĉiuj artikoloj en la F.K. estas aŭ skribitaj de mi mem aŭ - se ili estas

skribitaj de aliaj personoj - ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas." F.K. enhavas fabelojn, anekdotojn, rakontojn, sciencajn artikolojn dramfragmentojn kaj 70 poemojn.

**UNIVERSALA VORTARO** (1894). Krom la 917 vortojn el la Unua libro enhavas 1740 novajn vortojn. U.V. fariĝis tria parto de Fundamento de Esperanto (do ĝi estas netuŝebla).

**FUNDAMENTO DE ESPERANTO** (1905). F.D.E. konsistas el tri partoj: Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala vortaro. La unua Universala kongreso en Bulonjo konfirmis ĝian karakteron de netuŝebleco. Tiu ĉi "tabuo" en la lingvo estis nova genia propono de la Majstro. Ĝi certigis al la lingva senriskan evoluon kaj malebligis disfalon de Esperanto en dialektojn.

**LINGVAJ RESPONDOJ** (1925). Unue aperis en la Revuo. Plena kolekto estis eldonita en 1925. Apud F.K. kaj F.D.E. ĝi estas tria baza ŝtono de Esperanto. En la libro Z. respondas dubajn punktojn de la E. gramatiko.

**KONGRESAJ PAROLADOJ.** Ĝi estas kolekto de la paroladoj, kiuj estis diritaj okaze de opaj komencaj Esperanto-kongresoj. La kolekton inaŭguras la parolado en Bulonjo (1905) kaj fermas ĝin tiu el Krakovo (1912), kiam Zamenhof ĉesis ludi rolon de la aŭtoro de Esperanto kaj fariĝis simpla membro de ĝia movado. K.P. estas plenaj la forta espero en helan-estontecon, en fratecon de homoj, baziĝanta sur la interkompreno helpe de lingvo internacia.

**ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE LA LINGVO INTERNACIA.** Ĝi estas traktaĵo publikigita en Fundamenta Krestomatio. Ĝi estas efektive verko klasika, montranta profundajn pensojn kaj klaran saĝon de d-ro Zamenhof. Por la klerigo de esperantisto ĝi havas eminentajn valoron kaj signifon.

b) verkaro poezia:

"Dro Zamenhof mem estis en profundo de sia animo poeto, kvankam li postlasis al ni unusolan lirikan poemon "Ho, mia kor". Sed liaj poemoj kun temo kaj motivoj esperantismaj, himnecaj, sentagitaj, preĝecaj montras al ni lian grandan arton. Nur fakto, ke liaj laboroj prozaj al kiuj li sin preskaŭ devontigis, kaj tradukoj beletraj, liaj abundegaj gazetartikoloj forpostulis ĉiun lian liberan tempon, malhelpis tiun kapablulon eldiri pli en versoj. Sed eĉ tio, kion li al ni postlasis estas kaj restos valorega." (Jiří Kořínek)

Dro Zamenhof verkis entute 9 originalajn poemojn. La plej famaj estas:

**LA ESPERO**, himno esperantista kun muziko de franco Mĉnil. (La unuan melodion komponis sveda parlamentano Claes Adelsköld [adelseld]).

**LA VOJO**, poemo de la eminenta poeta forto. Profete pentras Z. antaŭ la esperantistaro dornoplenan vojon de Esperanto al la venko. Ĝiaj versoj fariĝis proverbaj en parolo de esperantistoj.

**AL LA FRATOJ**, saluto al "la fratoj" dissemitaj tra la tuta mondo kaj instigo al la obstina kaj fidela laboro por la Afero.

**PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO**, poemo deklamita dum la inaŭgura parolado de dro Z. en Bulonjo. Poemo forte patosa, efika.

**MIA PENSO**, subjektiva poemo, same kiel

**HO, MIA KOR'**

Ĉiuj ĉi poemoj (krom PREĜO) estis publikigitaj en Fundamenta Krestomatio.

## 2. Verkaro tradukita

La tradukoj de dro Z. prezentas la plej ampleksan parton el lia verkaro. Multajn horojn dediĉis Z. al tradukado en la novan lingvon. La kialo estas simpla. La nacioj fieras pri eminentaj kaj

gloraj verkoj de siaj literaturistoj; nacioj nehavantaj tiajn - fieras almenaŭ pri bonaj tradukoj de mondverkoj. En la unua periodo estis necese pruvi al la publiko, ke Esperanto povas esprimi ĉiujn sentojn, ĉiujn pensnuancojn. Kaj Z. brile sukcesis pruvi, ke Esperanto ne estas lingvo nur por komerca rilato, sed ke ĝi plene taŭgas eĉ por belarto.

Dro Zamenhof uzadis limigitan vortmaterialon, tamen liaj tradukoj prezentas veran fonton de belsonaj vortturnoj. El la ĉefaj tradukoj ni menciuj precipe:

**LA BATALO DE LA VIVO**, de Ch. Dickens. La libro ne estis siatempe eldonita libroforme, tial ĝi ne havis penetran signifon.

**HAMLETO**, de Shakespeare W. Ĝi renkontis senkomparan sukceson kaj estis plej utila propagando por la nova lingvo. Shakespeare, kiu el la mondaŭtoroj uzas la plej ampleksan vortaron, estas mirige tradukita de Z. en Esperanton, kvankam Z. devis uzi nur limigitan vortprovizon. Hamleto estas verŝajne la plej perfekte konstruita dramo de S. Loko de agado estas Danujo. Hamleto, kiu volas venĝi murdon de sia patro, per sia nedecidemo kaŭzas novajn kaj fine sian mortigon mem.

**IFIGENIO EN TAŬRIGO** de Goethe J. W. - verse tradukita 5-akta dramo pri Ifigenio, filino de Agamemnono, Oresto, ŝia frato, kaj Toas, reĝo de Taŭridanoj. Loko de agado estas arbareto antaŭ templo de Diano sur Taŭrido.

**GEORGO DANDIN** de J. B. Moliĉre.

**LA RABISTOJ** de F. Schiller.

**LA REVIZORO** de N. V. Gogol.

**MARTA** de E. Orzeszko.

**FABELOJ** de H. C. Andersen.

**PROVERBARO ESPERANTA.**

**MALNOVA TESTAMENTO**, ĝi estas la unua parto de Biblio. La **NOVA TESTAMENTO** estis tradukita de la kolektivo de anglaj pastroj, kiuj ankaŭ reviziis tradukon de la M.T. kaj ambaŭ partojn eldonis en la jaro 1926.

Oni miras pri la nombro de la tradukoj, kiuj venis el la plumo de dro Zamenhof. Oni ne povas kompreni, ke li, plene okupita per sia kuracista praktiko povis dum 4 monatoj traduki verse la tutan Ifigenion. Tamen en la tradukoj estas sentebraj du mankoj: kelkfoje sencaj neprecizaĵoj kaj aliffoje naciaj idiotismoj. Sed Z. ne strebis al "kabineta lingvo" li preferis vivan lingvon, rektan dirmanieron, trafan esprimon. Ĉiu esperantisto devas legi tradukojn de dro Z. se li volas alproprigi veran Esperanten stilon kaj proprasperte konvinkiĝi pri la ebloj de nia lingvo.

### **3. Laboro por E. gazetoj**

Al la literatura agado de Z. apartenas ankaŭ lia laboro por diversaj gazetoj. Da artikoloj propagandaj, instruaj kaj instigaj li verkis dum sia vivo grandan kvanton. Precipe grava estis lia kunlaboro al "La revuo", kiu estis eldonata de la firmao Hachette en Parizo. Ĉi tie aperadis liaj tradukoj antaŭ ol ili aperis libroforme.

Krom Esperanto havis dro Zamenhof ankoraŭ unu grandan idealon, nome "sennacian religion". Pri ĝi ni povas informiĝi el la broŝuro "Homaranismo" (1906), kiun Z. eldonis anonime. Por povi pli libere ofendi siajn filozofiajn principojn kaj eviti atakojn kontraŭ Esperanto, kiujn entreprenis malamikoj de la Homaranismo, - dro Zamenhof en 1912 rezignis ĉian oficialan



rolon en la esperantista movado - eĉ la honoran titolon Majstro. Tiam li eldonis (sub sia propra nomo) broŝuron "Deklaracio pri Homaranismo", per kiu li evidente volis kompletigi "Deklaracion pri Esperantismo" el Bulonjo. Pri la Homaranismaj principoj legu pli detale en "Originala verkaro" de Dieterle.

**Bibliografio:** E. Privat: Vivo de Zamenhof, E. Dresen: Zamenhof, Dieterle: Originala verkaro de Zamenhof, J. Šupichová: Kdo je L. L. Zamenhof.

**Rekomenditaj verkoj:** Fundamento de Esperanto, Fundamenta Krestomatio, La Vojo, La Espero, Hamleto, Ifigenio en Taŭrido.

## LA VOJO

Tra densa malluno briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
Al ni la direkton ĝi diras.  
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
Nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj,  
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco -  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,  
Pri l' tempoj estontaj pensante,  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝad, -  
Ni semas kaj semas konstante.  
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, -  
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:  
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
Se vi pacience eltenos".

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
Velkantajn foliojn deŝiras,  
Ni dankas la venton, kaj repurigitaj,  
Ni forton pli freŝan akiras.  
Ne mortos jam nia bravega anaro,  
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,  
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco -  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.

## LA ESPERO

Himno de la esperantistoj.

En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko;  
Per flugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion:  
Al la mond' eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero  
Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj:  
Sed dissaltos la obstinaj baroj,  
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos,  
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.

## ANTONI GRABOWSKI

Apud dro Zamenhof staris fidele de la komenco A. Grabowski, kiu fariĝis dua plej grava kunkonstruinto de Esperanto. Lia fekunda literatura agado alportis al la ekestanta Esperanta literaturo fundamentajn ŝtonojn. Lia nomo neniam estos forgesita inter esperantistoj.

**Biografio:** A. Grabowski naskiĝis la 31-an de junio 1857 en Nowe Dobro (Polujo). Gimnazion li vizitadis en urbo Torun; de ĉi tie li transiris al la universitato en Breslau, kie li studis filozofion kaj natursciencojn, fine ricevinte diplomon de kemia inĝeniero. Laboris en diversaj lokoj de Bohemujo, Polujo kaj Germanujo Grabowski fine ekloĝis en Varsovio, fervore laborante en sia profesio. Li publikigis kelkajn gravajn sciencajn verkojn kaj ellaboris Polan Teknikan Vortaron. Grabowski estis poligloto: pli malpli li regis 30 lingvojn. Ankaŭ por la internacilingva problemo li montris grandan intereson. Li ellernis perfekte Volapük kaj vizitis kelkajn eminentulojn de ĝia movado - ankaŭ Schleyer. Li konstatis: "La sinjoroj redaktoroj, scias skribi volapüke, ĉiam havante la vortarojn en la manoj, sed ili ne scias paroli la tro malfacilan lingvon." La samon li rimarkis ĉe Schleyer; tio impresis seniluziige al li!

Vojaĝante al Torun (1887), li hazarde vidis en la elmontra fenestro la Unuan Libron de dro Esperanto kaj aĉetis ĝin. La simpleco kaj natureco de la lingvo tre forte lin impresis kaj kun profunda intereso li komencis studi ĝin. En 1888 li vizitas la Majstron, surprizante lin per flua Esperanto - tiel efektiviĝis la unua Esperanta konversacio. Grabowski fordonis al la movado ĉiujn siajn fortojn, fariĝinte propagandisto, instruisto, organisanto kaj verkisto.

Dum kelkaj jaroj li staris frunte de la "reforma ondo" serĉante la kaŭzon de la malrapida disvastiĝo de E. en ĝia malperfekteco. Sed post la decida voĉdono en 1894 li rekonis la fundamentajn principojn kaj fariĝis ilia defendanto.

En la movado li akiris gravan funkcion: 1904 li prezidantiĝis de Varsovia E. Societo, en 1908 li fariĝis prezidanto de la Pola Esp. Societo, en 1905 li estis elektita kiel membro de la Lingva Komitato kaj de post 1908 en la Akademio okupis oficon de direktoro de la gramatika sekcio.

Tamen plej grava estas lia literatura agado, precipe tradukpoezia laboro. Sur ĉi tiu kampo liaj meritoj kaŭzis al li honoran alnomon "Patro de la Esperanta poezio". Li enkondukas novajn vortojn (neologismojn), li malkovras novajn vojojn antaŭ la E. poezio kaj ellaboras E. metrikon. Lia originala poezio kompare kun la tradukita estas modesta.

Dum la unua mondmilito, Grabowski, kiel germanujano, devis forlasi Varsovion kaj vivi disigita de sia familio. Reveninte hejmen, li trovis sian domon malplena: la tuta familio formigris al Rusujo. Tiam en la dezerta domo li trovas solan konsolon en la tradukado kaj en oftaj vizitoj de la Majstro. De post la morto de dro Zamenhof li sentas sin tute soleca. Lia kormalsano ĉiam pli kaj pli turmentas lin. Kiam lia familio revenis, trovis lin preskaŭ tute elĉerpita. Tamen kun la lasta energio li laboras super sia vivoverko - sinjoro Tadeo.

La 3-an de julio 1921 Grabowski trairas varsoviajn stratojn kaj trarigardas novajn librojn en la Esperanta librovendejo. La nevidebla mortofalĉisto alproksimiĝas kaj per sia mano faligas grandan poeton-revemulon. Lia mortotago restos por ĉiam funebra tago de la esperantistaro.

## **Verkaro:**

**LA NEĜA BLOVADO** (1888), de A. Puŝkin. Krom la verkoj de Zamenhof ĝi estas la unua verko de la unua adepto de Esperanto. Per ĉi tiu traduko fondiĝis famo de la juna talento.

**LA GEFRATOJ** (1889), de J. W. Goethe.

**KONDUKANTO INTERNACIA DE L' INTERPAROLADO**, kun modeloj de leteroj, trarigardita de Zamenhof (1890). Siatempe tre grava kaj ĉefe utila helpilo por bona ellerno de Esperanto.

**EN SVISUJO**, (1904), de J. Slowacki.

**LA PATRO DE PESTULOJ** (1905), de J. Slowacki.

**NOVA ANTOLOGIO** (1909).

**GRANDA VORTARO ESPERANTA-POLA.**

**GRANDA VORTARO POLA-ESPERANTA**, ambaŭ vortaroj aperis en 1910.

**MAZEPA** (1911), de J. Slowacki. Mirinda bela lingvo de tiu ĉi 5akta dramo, estas majstre kaj modele transkomponita en Esperanton de sentega poeta animo. Tiu ĉi ĉefverko de la pola dramliteraturo estis prezentita en Krakovo (1912), okaze de la Universala kongreso. Grabowski kunreĝisoris.

**HALKA** (1912), de Volski, teksto por la fame konata 4akta opero Halka de Moniuszko, kiu estis unuafoje prezentita Esperante ankaŭ en Krakovo.

**PEKOJ DE L' INFANECO** (1913), de B. Prus.

**EL PARNASO DE POPOLOJ** (1913), poemantologio kun 6 originalaĵoj kaj 110 tradukoj el 30 lingvoj. La eldondato estas tre grava por la tuta E.poezio. Ĉiu komencanta poeto devas ĝin studi.

**LA LIRO DE ESPERANTISTOJ** (1893), kolekto de versaĵoj. Ni renkontas iomete reformitan lingvon (kp. lian reformemon), kiun li estonte ne plu uzas.

La **TAGIĜO** (1911-1912), originala poemo, tre ŝatata kaj populara. Muzikon komponis Baranski. Preskaŭ dua himno esperantista.

**SINJORO TADEO AŬ LA LASTA POSEDPRENO EN LITVO** (1918), de A. Mickiewicz. Antaŭsentante sian finon Grabowski lastfoje streĉis siajn fortojn kaj poeto-talenton. Li kreis sian ĉefverkon, pere de kiu li fariĝis literature senmorta. Grabowski mem ne esperis, ke li iam la tradukon finos. Sed dro Zamenhof konstante instigis lin antaŭen. En la verko, kiu laŭ rimombro preskaŭ egalas la originalon, G. montras sin neordinara majstro de la lingva spirito. La verko ampleksas 12 librojn kun 8778 versoj. Skemo de la verso estas: 13 silaboj kun konstanta ĉefakcento sur la 6-a kaj 12-a silaboj. La du lastaj silaboj de ĉiu verso ĉiam rimas kun la du lastaj silaboj de najbara verso. En S.T. troviĝas iom pli ol du cent neologismoj, el kiuj parto jam oficialiĝis.

Sinjoro Tadeo estas grandioza epopeo, pentranta la vivon, la morojn de la pola nobelaro kaj iliajn oftajn interkverelojn.

Multaj partoj de S.T. estas modeloj de la plej alta tradukarto kaj mirinde bela poezia lingvo. La partoj "Tempesto, La ĉaso, La koncerto de Jankjel, La Litva praarbaro" restos por ĉiam admirataj.

Sed ne nur la poezia beleco katenas la leganton. Atentema leganto-esperantisto kun miro observas la lingvon, kiu en la manoj de Grabowski akiras la plej elastan kaj efikan formon. Li alportis multon novan eĉ el la gramatika vidpunkto. Ni esploru kelkajn lingvajn principojn, kiujn li en sia Sinjoro Tadeo aplikis:

1. G. surprizas per la eleganta verbigado de substantivoj kaj adjektivoj:

"**Tempas** manĝi kaj trinki ..."

"Mi **junas**, sed aranĝon konsentas..."

2. Pro ritmo G. ofte kunmetas helpverbon kaj participojn:

- "Arboj miaj, kiome mi al vi **ŝuldantas!**"  
**"Laŭdatu Jezu-Kristo!"**
3. La elizio de la helpverbo ŝajnas al ni tro libera:  
 "Mi **'as** Jacek Soplica..."  
 "Kiu **'as** malica".
4. Li anstataŭas la pronomon "tiu ĉi" per sola "ĉi":  
 "**Ĉi** penso ŝajnas pura"  
 "Inter **ĉi** kampoj"
5. Li apostrofas: anstataŭ "preskaŭ" li uzas "presk'",  
 li uzas akuzativon de ambaŭ: "ambaŭn"  
 li uzas kunmetojn "ekde" ktp.
6. G. uzas interesajn vortkunmetojn: "klinsaluto, tempo-  
 prena...".

G. krome provis elizii eĉ adjektivojn (bela - bel'), sed tiu ĉi paŝo jam estas malkonsentinda, almenaŭ en la nuna evolu-  
 ŝtupo. En la poezi-teorio estas konata termino de G.  
 "adasismo", kiu signifas "sufiksrimo" (ehz.: montaro-arbaro,  
 ringeto-venteto ktp.).

Je la fino restas diri, ke sen la granda talento kaj pacienca  
 laborado de A. Grabowski, Esperanto ne havus hodiaŭ tian  
 nivelon de perfekteco, kian ĝi efektive havas.

Legu kaj ellernu parkere originalan poemon de A.  
 Grabowski, himnecan Tagiĝon:

## TAGIĜO

Agordu la brustojn, ho nia fratar',  
 Por nova, pli vigla jam kanto!  
 Ĝi sonu potance de montoj al mar',  
 Anoncu al ĉiu dormanto:  
 Tagiĝo, tagiĝo radias en rond'



La ombroj de nokto forkuras el mond'!  
Post longa migrado sur dorna la voj'  
Minacis nin ondoj de l' maro;  
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'  
Al verda haven' de l' homaro.  
Post longa batalo, maldolĉa turment'  
La stela standardo jam flirtas en vent'.

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',  
Ni estas jam bone harditaj;  
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',  
Nek ies perfidoj subitaj.  
Nenio en mondo elŝiros ĝin for,  
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',  
Benante la Majstron por verko,  
Kaj lian anaron, de plej frua hor'  
Fidelan al li, ĝis lia ĉerko.  
La mond' aliiĝos, la temp' pasos for,  
Sed vivos eterne pri ili memor'.  
La lingvo benata motriĝis al ni  
Mirinda donaco ĉiela:  
Per amo al hejmo, patrujo, naci',  
Ni flamas en koro fidela.  
Kaj same fidelaj al hejma altar',  
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.  
En ĉiu modparto, en ĉiu ter-zon',  
En koroj da centoj da miloj,  
Jam vibras por nia saluto reson',  
Do kantas de l' tero ni filoj:  
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',  
La ombroj de nokto forkuras el mond'!

## Dro KAZIMIERZ BEIN

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,  
Droninta vive en la morto,  
Kia mister-malica forto  
Vin povis preni de ni rabe?

Ni leernis ĉe vi lernantknabe  
Kuiiri en la stilretoro,  
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,  
Droninta vive en la morto!

Kaj nun ni miras gape, strabe,  
Pri via karier-aborto.  
Al vi la Esperanta vorto  
Nun eble sonas jam arabe ...

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe!

(K. Kalocsay: Rimportretoj)

**Biografio:** Dro Kazimierz Bein (Kabe) naskiĝis en 1872. Estante polo li miksiĝis en siaj junaj jaroj en kontraŭrusan movadon kaj pro tio li estis ekzilita por pluraj jaroj. Jen la kaŭzo, ke li finis siajn medicinajn studojn nur en 1899 en la rusa Kazan. Same kiel dro Zamenhof ankaŭ li fariĝis okulkuracisto. K. Bein estis fervorulo de sia profesio: li verkis multajn fakajn librojn kaj artikolojn kaj krom tio ĉi en Varsovio li fondis "Instituton por okulmalsanoj", kies direktoro fariĝis. Li estis iniciatoro de la Pola Oftalmologia Societo; en sia privata vivo famiĝis kiel amatora foto-artisto. Tra la mondo esperantista li gloriĝis kiel klasika literaturisto,

konata sub la mallongigo Kabe. Same kiel Grabowski ankaŭ Kabe ekkonis Esperanton en la unua jaro de ĝia ekzisto. Legu, kion diras Kabe mem pri sia esperantiĝo:

"En la jaro 1887, kiam aperis la unua broŝuro de Dr. Esperanto, mi estis liceano en Varsovio. Unu el miaj kolegoj, S. D., granda ŝerculo, aĉetis la lernolibron, legis ĝin al ni dum la paŭzoj inter la lecionoj kaj uzis sian tutan spritecon por moki la lingvon kaj precipe kelkajn sufiksojn, kiujn li trovis - maldecaj. Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi partoprenis kaj subtenis la mokojn kaj ĉar mi estis bona latinisto, mi forte kritikis la lingvon, en kiu mankas, interalie, tiaj formoj, kiel futurum exactum kaj plusquamperfectum. Tamen la versaĵoj ĉarmis min kaj dum kelke da tagoj senĉese "en songoprincinon mi vidis". (Aludo pri la traduko el Heine - rim.V.N.) Post kelke da semajnoj mia kolego S. D. forgesis pri la maldecaj sufiksoj, mi pri la princino. La leganto ne juĝu nin tro severe: ni estis junaj, la vetero estis bela, ne estas do mirinde, ke la boatveturado sur Vistulo allogis nin pli forte, ol nova lingvo; ĉu ne sufiĉe jam tedis nin la antikvaj!

Pasis 16 jaroj. Kiel abonanto de la angla "Review of Reviews" mi legis tie kun intereso Esperantan kronikon, sed post kelke da monatoj ĝi komencis inciti min. "Kia diablo estas tiu Esperanto, kiun faris en Varsovio iu Dro Zamenhof, okulisto, same kiel mi?" Mi aĉetis la unuan malgrandan broŝuron de Dr. Esperanto por poloj, mi prenis de kolego (li tiam ne estis ankoraŭ esperantisto) la jarkolekton 1896 de "Lingvo Internacia" kaj post kelke da tagoj, ĝustadire post kelkhora laboro, mi jam libere komprenis ĉiajn Esperantajn tekstojn sen helpo de vortaro. Mi jam konis la novan lingvon."

Kune kun Grabowski li apartenas al la kunfonintoj de la Esperanta klasika literaturo. Kabe ne skribis originale, pro sia konvinko, ke la lingvo multe pli profitas el la traduklaboro, ĉar ĉi tie la tradukanto ne povas eviti malfacilaĵojn kaj devas trovi

la plej taŭgan esprimmanieron. En majstra formo li tradukis belaĵojn el la lingvoj germana, pola kaj rusa. Kabe estas majstro de la ĝusta kaj internacia Esperanta stilo. Li uzas elegantan facile legeblan lingvon tute liberan de naciismoj. Li, la unua, plene aplikas la principon pri neceso kaj sufiĉo, evitante ĉiun trokomplikaĵon kaj artefaritaĵon. Legi liajn verkojn estas efektiva ĝuo.

Krom sia traduklaboro Kabe verkis ankaŭ multajn artikolojn por diversaj E.gazetoj. Ekde la jaro 1906 li okupis en la Akademio postenon de vicprezidanto. Same kiel Grabowski, ankaŭ Kabe estis reformema. En la daŭrigo de la supra citaĵo li diras:

"Mi daŭrigis miajn vizitojn, (de la Majstro) sed mi devas konfesi, ke ne ĉiuj kontentigis min. Traleginte unu propagandan broŝuron, la ekzercaron kaj kelke da noveloj kaj tradukinte du rakontojn, mi venis al firma konkludo, ke diversaj reformoj estas absolute neeviteblaj en Esperanto kaj mi prezentis miajn proponojn al la Doktoro. Kun miro mi konstatis, ke li ne estas ravita kaj ke li ne volas akcepti ilin. "Terura konservativulo", pensis mi, "mi ne plu diskutos kun li pri la reformoj; baldaŭ li komprenos sian eraron kaj bedaŭros, ke li ne adoptis pli frue miajn proponojn."

Ĉi tiuj vortoj estas skribitaj en la jaro 1909. Post du jaroj, en 1911 Kabe forlasis la movadon kaj de tiam li ne plu okupiĝis pri Esperanto. Li mirigis la tutan esperantistaron, kiu ne povis kompreni, ke homo, kies literatura reputacio kulminas, povas tiel strange forlasi la movadon kaj la ideon de Esperanto entute. Estante intervjuata por Literatura Mondo en 1931 li klarigis sian sintenon per tio, ke E. ne progresas kaj ke li ne konsideras ĝin solvo de la internacia lingvo. Tamen la efektivaj kialoj de lia fortiriĝo estas ĝis nun neklaraj. Oni konjektas, ke verŝajne ankaŭ personaj malpaciĝoj kun A. Grabowski kaj Zakrzewski kontribuis al tiu ĉi foriro. Jen vi

povas kompreni versojn, kiujn mi antaŭmetis al la biografio de Kabe. La vorto "kabeiĝi" jam fariĝis proverba kaj karakterizas homon, kiu malfidele forlasas la movadon.

Malgraŭ tio, ke post la jaro 1911 Kabe neniam plu okupiĝis pri Esperanto, tamen lia verkaro kaj lia nomo restos por ĉiam en la Esperanta literaturo. Li restas modelo de bona stilisto, kies lingvo spiras propran spiriton. Li helpis forĝi al dro Zamenhof kaj A. Grabowski Esperanton, donante al ĝi spiriton kaj potencon, belecon kaj dolĉecon; li fariĝis klasikulo de Esperanto.

(Pola E.Bulteno kaj poste ankaŭ aliaj E.gazetoj alportis antaŭ nelonge informon, ke dro K. Bein, en la aĝo de 84 jaroj denove okupiĝas pri Esperanto. La detaloj ne estis anoncitaj.)

## **Verkaro:**

**LA FUNDO DE L' MIZERO** (1904), de Sieroszewski.

**LA INTERROMPITA KANTO** (1905), de Eliza Orzeszko.

**POLA ANTOLOGIO** (1906), el la plej bonaj polaj aŭtoroj.

**ELEKTITAJ FABELOJ** (1906), de fratoj Grimm.

**UNUA LEGOLIBRO** (1907), parte originala.

**VERSAĴOJ EN PROZO** (1909). de I. S. Turgenëv.

**PATROJ KAJ FILOJ** (1909), de I. S. Turgenëv.

**VORTARO DE ESPERANTO** (1910), ĝi estas vortaro, kie estas Esperantaj vortoj klarigitaj Esperante. La vortaro fariĝis fundamento por **PLENA VORTARO**. Ĝi estas ĉefverko de Kabe apud

**LA FARAONO** (1907-1908), de Boleslav Prus. Ampleksa romano el la malnova Egiptujo, priskribanta morojn de la popolo, batalojn inter pastraro kaj kronprinco Ramses la XIII, kiu volas en siaj manoj koncentrigi plenpotencon. La romano estas en 3 volumoj, 630 paĝoj. Verŝajne plej populara verko en Esperanto. La traduko estas modela, lingvo klasika. Pola

ŝtata eldonejo preparas Esperantlingvan eldonon (3-an; la dua en 1912) por la jaro 1957.

## HENRI VALLIENNE

Dro Henri Vallienne [valjen], franco, naskiĝis la 19-an de novembro 1854 kaj mortis la 1-an de decembro 1909. Kvankam li estis profesie kuracisto, tamen konstanta amo al la literaturo kaj poezio akompanis lin dum la tuta vivo. En sia gepatra lingvo franca li publikigis volumon de poemoj. Konatiĝinte kun Esperanto (1903) dro Vallienne tuj rimarkis ĝiajn eksterordinarajn kvalitojn literaturajn kaj provis siajn fortojn je ENEIDO, konata verko de Vergilio.

En 1905 lia kormalsano kulminis per kruela atako, pro kiu dro Vallienne preskaŭ mortis. La fortika korpo tamen rezistis morton, sed post la krizaj tagoj li ne plu povis eliradi el sia ĉambro. Malforta karaktero rompiĝus pro tiu ĉi plago; la karaktero de Vallienne estis forta kaj tial li trovis novan kuraĝon por plua vivo. Li utiligis sian invalidecon por intensigi la literaturan laboron:

Jam en 1906 li publikigas kompletan ENEIDON kaj poste, tuj venontjare li dediĉas al esperantistoj la plej ampleksan romanon, kiu ĝis tiam en Esperanto estis skribita - "KASTELO DE PRELONGO". Pasis apenaŭ unu jaro kaj nova originala romano venis el la plumo de dro Vallienne: "ĈU LI?". Ekzistis ja en nia literaturo jam antaŭ Vallienne noveloj kaj romanetoj, ĉ. 500-paĝaj originalaĵoj ne estis ĝis tiam skribitaj. Ni konsideras do dron Vallienne enkondukinto de la romanoformo en nian literaturon. Iomete alia demando estas tiu pri la kvalitoj de liaj originalaj romanoj. Oni devas konfesi, ke la temoj en ambaŭ ne estas indaj je sia aŭtoro. La temoj faras el ili romanojn malbonspecajn, kie svarmas

juĝistaj eraroj, krimoj, adultoj. Eĉ la stilo ne estas senriproĉa. La afero fariĝas iome komprenebla, se ni konsideros la fakton, ke en tiu tempo ne estis ankoraŭ skribitaj gravaj lingvaj verkoj kaj mankis modelaj literaturaĵoj. Liaj romanoj tamen bone servis kiel propagandiloj, pruvantaj, ke E. taŭgas por la literatura kreado.

### **Verkaro:**

**ENEIDO** (1906), traduko el Vergilio,

**KASTELO DE PRLONGO** (1907),

**ĈU LI?** (1908),

**MANON LESCAUT** (1908), de Abbé Prévost,

**LA METAMORFOZOJ**, de Ovidio.

## **HEINRICH LUYKEN**

H. Luyken naskiĝis la 10-an de decembro 1864 en Allenkirchen, Germanujo. Frekventinte gimnazion en Düsseldorf li transloĝiĝis al Anglujo, kie edziĝis kaj fine angliĝis. Ek de sia esperantiĝo (1904) Luyken fervore propagandis ĝin. Nepasemajn meritojn li akiris pro sia romanverkado. Post dro Vallienne li estas dua romanverkisto, kiu skribas ampleksajn originalajn verkojn. El tiuj la plej famaj estas:

**PAŬLO DEBENHAM** (1912)

**MIRINDA AMO** (1913)

**STRANGA HEREDAĴO** (1922)

**PRO IŜTAR** (1924).

Konstruo de ĉiuj romanoj estas la sama: inter la romanherooj troviĝas iu, kies kristana kredo estas subfosita pro

herezaj delogoj, aŭ personaj malfeliĉoj. Lin savas alia heroo, kies pura kredo restis spite danĝerojn neŝanĝebla.

Luyken pentras en siaj libroj heroojn perfektajn- sekve al leganto ŝajnas nerealaj. Luyken volas utiligi Esperanton al propagando de siaj kristanaj idealoj kaj tiamaniere volas doni al ĝi pli profundan mesaĝon.

Malgraŭ la menciita nerealeco de la ĉeffiguroj L. kapablis skribi librojn, kiuj daŭre apartenas al la plej legataj kaj ŝatataj. Lia *Pro Iŝtar* certe tenos intereson de ĉiu leganto de la komenco ĝis la fino. Fono de la romano estas malnova Babilono kaj ni kun retenita spiro legas pri batalo inter la malnova kredo al Jehova kaj babilona idolanino. Tute plastike staras antaŭ ni simpatiaj Hamul kaj Omar aŭ belega sed intrigema Zalmuna.

Pura lingvo, iom arkaika stilo kaj riĉa enhavo garantias kontenton de la legontoj.

## MARIE HANKEL

Laŭdevene germanino, naskiĝis la 2-an de februaro 1844 kaj mortis en Dreseno la 15-an de decembro 1929. Ŝi eklernis Esperanton en 1903 kaj de post tiam estis entuziasma samideanino, kiu fordonis al la esperantista movado ĉiujn siajn fortojn. Ŝia prepara laboro helpis al sukceso de la Universala kongreso en Dreseno 1911. En la unua tempo ŝi helpis disfloron de la Esperanta literaturo fondinte kaj prezidante Esperantistan Literaturan Asocion. Ŝi membriĝis al la Lingva Komitato.

El ŝia plumo venis multaj originalaj poemetoj, dissemataj en diversaj E.gazetoj. En la jaro 1909 ŝi estis "Reĝino" de la Internaciaj floraj ludoj. (I.F.L. estas kultura aranĝo laŭ la modelo de tradiciaj literaturaj konkursoj en Katalunujo. Por esperantistaj verkistoj ili estas aranĝataj de la tieaj



esperantistoj de post 1905. La Ludoj estas favorataj ankaŭ de la urbaj magistratoj; oni fiksis diversajn temojn kaj premiojn. "Reĝino" estas juna virino, kiu disdonas premiojn. En poemaroj de famaj verkistoj ni ofte legas ĉe iuj poemoj menciojn: Premiita en Internaciaj Floraj Ludoj.)

Marie Hankel estis la unua Esperanta poetino, kiu donis al la E. poezio unuajn originalajn poemojn. En apartaj eldonoj aperis: LA SIMBOLO DE L'AMO kaj SABLEROJ (poezio kaj prozo).

## **A. KOFMAN**

A. Kofman estis ruso, librotenisto en Odessa. Kapablulo, kiu vekis miron, sed kies sorto estas simila al tiu de Kabe. En la reformema periodo li transiris al Ido kaj poste fariĝis Occidentalisto.

Kofman estis unu el efektivaj talentoj en la krea periodo, inter amaso de la mezkvalitaj poetoj. Lia stilo estas klara kaj pura, lia lingvo estas freŝa kaj daŭre meritis atenton de la poetoj.

Li verkis originalan poemaron kaj krome arte tradukis KAIN de Byron, partojn el Iliado de Homér kaj partojn el Goethe -a FAŬSTO. Lia plano aperigi grandan poemaron el la naciaj lingvoj ne efektiviĝis pro la foriro en la tendaron de idistoj.

## **VASILIJ NIKOLAJEVIĈ DEVJATNIN**

V. N. Devjatnin estis ruso naskiĝinta en 1862. Post la studoj fariĝis instruisto pri la literaturoj latina kaj rusa en Kijev kaj poste en Vilna.

Esperanton li ekstudis fervore en 1891. Antaŭe Devjatnin estis volapukisto. Estante apenaŭ unu monaton esperantisto li jam eklaboris literature tradukante ANĜELON de Lermontov. Esperanta vivo de Devjatnin estis varia kaleidoskopa bildo: Partoprenas unuan Universalan Kongreson, fariĝas Lingva Komitatano, gajnas unuan literaturan premion (1911), en Parizo laboras unu jaron por Esperanto, al kongreso en Krakovo li piediras kvardek du tagojn, por E. agas en Munĥeno kaj Leipzig. Tie estas militkaptita en 1918: donas E.lectionojn al oficiroj kaj foriras en Sovetunion, kie verve laboris por la movado en Leningrado.

La propaganda kaj instruista laboroj ne malhelpis lian literaturan aktivecon. Por rusoj li verkis multajn lernolibrojn kaj lingvajn studojn. Kunlaboris al multaj gazetoj Esperantaj. Plej ŝatata verkisto de Devjatnin estas Lermontov kaj Puŝkin, el kiuj li pleje tradukadis.

### **Verkaro:**

ANĜELO (1891), de M. J. Lermontov

DEMONO (1894), de M. J. Lermontov

BORIS GODUNOV (1894-1895),

POLTAVA (1906),

RUSLANO KAJ LUDMILA, ĉiuj tri verkoj de A. S. Puŝkin.

PLENA VERKARO - estas kolekto de liaj verkoj en 4 volumoj.

Liaj poemoj originalaj kaj tradukitaj aperis en FUNDAMENTA KRESTOMATIO kune kun la originala rakonto ARTURO.

## ALEKSANDRO DAMBRAUSKAS

(aŭ Dombrovski), litovo, profesoro kaj katolika prelato. Naskiĝis en 1860 en Kuroniai. De la rusa cara registaro Dombrovski estis ekzilita por 6 jaroj, ĉar li malpermesis al la katolikaj lernantoj vizitadi rusan ortodoksan preĝejon, kiel estis ordonite.

Kun Esperanto li konatiĝis kiel studento en Petrograda Pastra Akademio en 1887. Semajnon post ricevo de la Unua Libro li skribas per senerara Esperanto al dro Zamenhof. Por siaj samnacionoj li verkis unuan litovan lernolibron de E. en 1890. En diversaj gazetoj esperantistaj troviĝas amaso da artikoloj subskribitaj per lia nomo aŭ per lia pseŭdonimo A. Jakstas. En la movado tre aktiva. Li redaktis LITOVAN STELON. Lia verkaro ampleksas verkojn skribitajn en la litova, pola, rusa kaj latina lingvoj. En Esperanto li aperigis:

**Du malgrandaj libretoj matematikaj (1905-1906)**

**VERSAĴARETO (1905),**

**MALGRANDAJ PENSOJ PRI GRANDAJ DEMANDOJ.**

A. Dombrovski krome kunlaboris al LITOVA ALMANAKO, 1923.

## HIDRIK BULTHUIS

Aŭtoro de la popularaj rakontoj estas nederlanda verkisto H. Bulhuis (bölthöis), naskiĝinta la 15-an de decembro 1865. Profesie doganoficisto, post 1924 en pensio. Antaŭ ol li en 1901 esperantiĝis li estis fervora volapükisto kun diplomo de la ĉefinstruisto. Sed Esperanto tute forlogis lin kaj dediĉis al ĝi ĉiujn siajn fortojn entuziasme ĝin propagandante kaj instruante. En la movado li atingis altajn funkciojn (LK ktp.).

Sian literaturan agadon komencis Bulthuis per mallongaj rakontoj, sed lian efektivan literaturan reputacion kreis nur liaj postmilitaj ampleksaj rakontoj. Ekde 1907, kiam li debutis, entenas literatura rikolto de B. pli ol 30 librojn kaj broŝurojn. B. estas kaj tradukisto kaj originala verkisto. Lia lingvo estas ĝusta, ordinara sen artismaj ambicioj. Sed la lingvo bone harmonias kun la enhavo de la rakontoj, kiuj estas plenŝtopitaj je aventuroj, implikaĵoj kaj surprizoj. Verŝajne pro tio kelkaj el liaj verkoj apartenas al la plej legataj libroj de la E. literaturo.

### **Verkaro:**

#### 1/ Originalaj rakontoj,

IDOJ DE ORFEO (1923)

JOZEFO KAJ EDZINO DE POTIFAR (1926)

LA VILA MANO (1928),

#### 2/Tradukoj.

LA LEONO DE FLANDRUJO (1929), de Conscience

IMPERIESTRO KAJ GALILEANO (1930), de H. Ibsen

JANE AYRE (1930), de CH. Bronte

LA MALGRANDA JOHAMO (1926) de van Eeden

KARAKTERO (1928), de Luiscius

ROBINSON CRUSOE, de D. Defoe

DON KIĤOTO, de M. Cervantes.

#### 3. Originalaj poemoj

LA DU ŜIPOJ (1909)

#### 4. Teatraĵoj

ONKLO EN AMERIKO (1922),

MALRIĈA EN SPIRITO.

SALOME (1910), de O. Wilde

IDOJ DE ORFEO, originala rakonto, verŝajne plej populara kaj ŝatata. Ĝi prezentas al ni H. Bulthuis kiel talentan

rakontiston, kiu scias sur kelkaj centoj da paĝoj nelacige teni intereson de leganto. La temo estas iom stranga: trinaskitoj, el kiuj ĉiu pro fatala sorto estas edukita en alia lando kaj en alia gepatra lingvo. Sub alia nomo kunvenas hazarde en koncerta salono, en kiu ĉiuj tri donos koncerton. Pere de Esperanto ili interkompreniĝos. La rakonto portas multajn neverŝajnajn partojn, kiuj tamen ne malgrandigas ĝuon de la legantoj. LA VILA MANO estas alia konata rakonto, bildiganta holandan kamparon, ties belaĵojn kaj loĝantojn. Ankaŭ ĉi tie abundas okazintaĵoj, kiuj ofte estas neverŝimilaj.

LA LEONO DE FLANDRUJO de la flandra Conscience kaj IMPERiestro KAJ GALILEANO estas ambaŭ premiitaj de la Akademio. KARAKTERO estas de la holanda Luiscius. Tiu ĉi verko estis el E. tradukita en plurajn lingvojn, ekz. ankaŭ en la ĉeĥan. LA DU ŜIPOJ estas unusola poemaro originala de Bulthuis. Ĝi gajnis premion en Barcelono.

## **IVAN GRENADIJEVIĈ ŜIRJAEV**

Konata ankaŭ sub la pseŭdonimo Ivan Malfeliĉulo. Ruso. Naskiĝis en 1877 kaj mortis en 1933. Profesie unue instruisto kaj poste pastro. Ŝirjaev esperantiĝis en 1895 kaj de post tiu dato E. akompanis lin dum la tuta vivo. Krom lia grava kunlaborado al diversaj E. gazetoj, partoprenado en literaturaj konkursoj estas ĉefe menciinda lia laboro sur la literatura kampo. Verkis kelkajn originalajn rakontojn kaj tradukis elstarajn verkojn de la rusa literaturo, kiuj bedaŭrinde restis nur en manuskripto:

MILITO KAJ PACO, de L. N. Tolstoj,

FRATOJ KARAMAZOV, de F. M. Dostojevskij, k.a.

I. G. Ŝirjaev estis la unua, kiu kaptis ideon pri E. enciklopedio. Li kolektis grandan nombron da alfabeto ordigitaj artikoloj,

kiuj fariĝis pli poste (post lia morto) bazo por eldono de la efektiva E. enciklopedio, sur kies unua paĝo la nomo de Ŝiorjaev havas titolon Iniciatinto - ĉefredaktoro.

## EDMOND PRIVAT

Edmond Privat - la dolĉa Vorto!  
Plej mola ĉarmo kaj gracio!  
Poeto de la Historio  
Pri l' Majstro kaj pri nia Forto.

La koron streĉas la risorto  
De l' Nova Sento por misio.  
Edmond Privat - la dolĉa Vorto!  
Plej mola ĉarmo kaj gracio!

Pri l' papilia frosto - morto  
Funebris kun melankolio,  
Kun dolĉkompata melodio  
Rakontis pri l' Ĝinevra sorto

Edmond Privat - la dolĉa Vorto!  
(K.Kalocsay: Rimportretoj)

**Biografio.** Dro Edmond Privat [priva] naskiĝis la 17-an de aŭgusto 1889 en Ĝenevo. Post siaj studoj fariĝis doktoro pri historio kaj docento ĉe la Universitato en Ĝenevo. Kun Esperanto konatiĝis jam kiel infano. Dekkvarjara li kun Hector Hodler komencis eldonadi gazeton JUNA ESPERANTISTO. Post du jaroj, en 1905, li piede pilgrimis al Boulogne sur Mer, kie surprizas per sia Esperanta elokventeco. Privat entreprenis en 1907-8 longajn propagandajn vojaĝojn tra Usono, Anglujo

kaj Francujo. En 1921 li vizitis Sovetunion kaj landojn de la Meza Eŭropo. Depost la jaro 1920 ĝis 1934 li famiĝis pro la lerta redaktado de ESPERANTO, kie aperadis liaj altnivelaj artikoloj. Privat havas nemalgrandajn meritojn pri la funda reorganizo de la esperantista movado kaj ĝia starigo sur sanajn principojn (1921-1928). Li plenumadis superajn funkciojn: prezidanto ICK (1923), prezidanto de UEA (1925). Lia propagandista agado estas ĉiam strikte serioza, atestanta pri la plej alta kompetenteco. Lia merito estas prezento de E. al la Ligo de Nacioj, al Internacia Laboroficejo kaj al Universala Telegrafa Unuiĝo. Privat aranĝis aŭ grave helpis al aranĝo de diversaj internaciaj teknikaj konferencoj en Esperanto, ekz. Konferenco de Edukistoj en Ĝenevo (1922); Komercistoj - Venecio (1923); Radio - Ĝenevo (1924); Paco per Lernejoj - Prago (1927). Li estas ankaŭ ĉefiniciatinto de la Someraj Universitatoj.

Edmond Privat krome apartenas al niaj plej kapablaj oratoroj. Lia pura prononcado estas konsiderata modela. Li distingiĝas per rekta pensmaniero kaj facile komprenebla parolkonstruo. Ankaŭ lia pedagogia agado meritas atenton. Li estas aŭtoro de tre sukcesaj lernolibroj. E.Privat funkcias ankaŭ kiel radioanoncanto en la Esperantlingva elsendado de radio Bern.

Dro Privat estas aŭtoro de kelkaj franclingvaj verkoj, el kiuj apartan atenton meritas lia HISTORIO KAJ PSIKOLOGIO DE POPOLOJ. En la internacia forumo li prezidis kelkajn konferencojn kaj komitatojn por liberigo de subpremitaj nacioj. En Svisujo li pledis por popolklerigo kaj kooperativa sistemo de la ekonomia vivo.

## **Verkaro:**

ESPERANTO IN 50 LESSONS (1908),  
KARLO (1910),  
KURSA LERNOLIBRO (1911)  
GINEVRA (1913),  
TRA L'SILENTO,  
VIVO DE ZAMENHOF (1920),  
HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO (1927),  
ESPRIMO DE SENTOJ EN ESPERANTO (1931)

KURSA LERNOLIBRO estas bonege, tre populara, rektmetoda lernolibro uzata tra la tuta Esperantujo. KARLO estas malnova, sed ĝis nun tre populara legolibro. ESPRIMO DE SENTOJ EN ESPERANTO estas majstraĵo lingvista, kie la aŭtoro science kaj klare, trafe kaj alloge eksplikas teoriajn problemojn. HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO konsistas el du partoj. La unua pritraktas la movadon en la komenca periodo. La dua ĝis 1927-a jaro. En la libro montriĝis dro Privat plej detala kaj scienca historiisto de la esperantista movado. Per sia dolĉa rakontmaniero tute faligis eldiron, ke la historio estas "seka scienco". Kvankam ni legas fakan libron, tamen ni estas ravitaj pro preskaŭ poeta priskribo, pro kristala stilo, pro interesplena konstruo de la ĉapitroj. La libro ne povas manki en biblioteko de vera esperantisto. La samajn kvalitojn posedas lia lingvaĵo en VIVO DE ZAMENHOF, en kiu dro Privat donis al ni detalan bildon pri la vivo de nia ŝatata Majstro. Li analizis ĉi tie, ĝis nun malzorgatajn filozofiajn vidpunktojn de dro Zamenhof kaj per sia oratora-patosa stilo kreis senmortan monumenton al homo, pri kiu admire diris iam Kabe: "ECCE HOMO".

Dro Iva Lapenna en sia INTERNACIA LINGVO asertas, ke dro Privat apud dro Stanislav Schulhof estas fondinto de la



efektiva originala poezio. Kaj vere, modesta poemaro TRA L'SILENTO havis grandan influon al multaj pli postaj poetoj. Respondo al demando: "Kiu influis via plej forta el la malnovaj verkistoj kaj kiu verko?" diris s-ano Julio Baghy: "La unua verko, kiu vekis en mi artan ĝuon estis TRA L'SILENTO de Edmond Privat en 1913".

La drama provo estis lirika GINEVRA, skribita laŭ malnova kelta legendo. La dramo estis ludita okaze de la UK-oj en Bern 1913 kaj en Ĝenevo 1925.

Jen la seka portreto de propagandisto, instruisto, oratoro, sciencisto, poeto kaj verkisto - dro Edmond Privat, sen kies saĝaj manoj kaj konsiloj la movado ofte estus estinta grave endangerigita. Jen luma ekzemplo sekvinda de nia junularo.

## MARIA ŜIDLOVSKAJA

rusino, Esperanton ŝi ellernis en 1907. Ŝi kaj ŝia frato Konstantin Ŝidlovskij, medicinisto en Moskva kaj Kazan, tre fervore propagandis Esperanton. Ŝidlovskaja entreprenis kelkajn vojaĝojn propagandajn kaj faris ampleksan kursgvidan laboron.

El ŝiaj preskaŭ cent literaturaĵoj nur naŭ aperis libroforme, aliaj aperis en E.gazetoj kaj la ceteraj restas en manuskripto.

Plej konataj ŝiaj tradukoj estas:

PRINCO SEREBRĴANIJ, de A. Tolstoj,  
LA SONGŔO DE MAKARO, de V. Korolenko,  
LA KAPITANFILINO, de A. S. Puŝkin.

Krom la verkistoj, kiuj forĝis Esperanton en la unua literatura periodo, ekzistis longa vico de aliaj esperantistoj, kies nomoj restas daŭre ligitaj al la Esperanta literaturo.

Mi kure menciu iliajn nomoj:

**LEOPOLD EINSTEIN**, germano, gvidis eldonadon de la unua gazeto LA ESPERANTISTO. Nur dank' al lia malavara subteno E. povis venki la komencajn malfacilaĵojn. Eldonis propagandajn broŝurojn pri E. en Germanio.

**W. H. TROMPETER**, germano, kiu post L. Einstein transprenis eldonadon de la ESPERANTISTO. Ankaŭ al li ŝuldas E. multajn dankojn.

**LEO BELMONT**, polo, juristo, pola nacia verkisto kaj poeto. Kontribuis al multaj E.gazetoj. Libre aperis liaj SONOJ ESPERANTAJ.

**VASILIJ EROŜENKO**, ruso, blindulo, propagandisto de E. en multaj ekzotikaj landoj. Li skribis rakontojn por geknaboj.

**LOUIS DE BEAUFRONT**, (1855-1932), franco, markizo, aŭtoro de multaj lernolibroj kaj propagandaj artikoloj. Redaktoro de L'ESPERANTISTE. En 1908 li anonime prezentis reformon de Esperanto sub pseŭdonimo Ido kaj tiel fariĝis ĉefa gvidanto de la Ido-movado. (Vd. Historion).

**CARLO BOURLET**, franco, matematikisto. Fondis gravan literaturan ĵurnalon LA REVUO, kiun redaktis mem Zamenhof.

Elstara oratoro kaj gvidanta persono en Francio.

**RENÉ DE SAUSSURE** (sospir), svisa franco, universitata profesoro. Dum la Ido-krizo brile defendis Esperanton. Klara gramatikisto: Esperanta vortfarado kaj Principo pri neceso kaj sufiĉo.

**HECTOR HODLER**, sviso, kunfondinto kaj direktoro de UEA. Aŭtoro de bonegaj artikoloj en la organo de UEA.

Dro **EMILE BOIRAC**, franco, rektoro de Universitato en Grenoble. Gvidanta personeco dum la Ido-skismo. Tradukisto el Leibnitz, Molière kaj Van Dyks.

**THEOPHILE CART**, franco, profesoro ĉe Universitato en Uppsala, Svedio. Eldonis kelkajn lernolibrojn, tradukitajn en multajn lingvojn. Lia fama devizo "Ni fosu nian sulkon" dum la Ido-skismo helpis savi E.movadon antaŭ disfalo. Laboris multe por blinduloj.

## **JULIO BAGHY**

Preter vivo tro racia      Pro sopir' de l' ciklona  
Vigle migras plum' de nia      Pri la vera Homo homa  
Kara vagabond',      Sangas lia kant',  
Kaj aŭskultas lin avide,      Sed konsolon al viktimo  
Kortuŝite kaj ravite      De la dorna am-pilgrimo  
Esperanta mond'.      Donas Esperant'.

Kantu, Baghy, nia bardo,  
Bardo de l' sincera ardo,  
Kun antaŭa fort'!  
Vian larman emocion,  
Kaj fajreran ironion  
Aŭdos sud' kaj nord'.

H. Dresen.

**Biografio.** Julio Baghy (bagy) estas hungaro. Li naskiĝis la 13-an de januaro 1891 en urbo Szeged. Post siaj lernejoj studoj Baghy fariĝis aktoro kaj pli poste reĝisoro en diversaj teatroj daŭrigante tiel la familian tradicion: ankaŭ lia patro estis

aktoro kaj la patrino estis teatra sufloristino. Baghy rememoras:

Drama aktoro estis mia patro, Drama aktoro estis mia patro  
sortorompita kara maljunul', mi, obeema lia fila id',  
kiu ludante rolojn en teatro, por mi elektis rolojn en teatro,  
larmojn elvokis ĉiam el okul' ...viŝi ĉi larmojn per tutkora rid'.

/Mia patro kaj mi, el Preter la vivo./

Jam en piaz junaj jaroj Baghy aperigis en diversaj hungaraj gazetoj kaj ĵurnaloj siajn nacilingvajn poemojn kaj novelojn. Lian karieron rompis eksplodo de la unua mondmilito: Baghy eksoldatiĝis kaj ses jarojn pasigis en siberia militkaptitejo. Tie komenciĝas lia vasta Esperanta agado. Kun Esperanto li konatiĝis en 1911 kaj precipe interna ideo tuj kaptis lian intereson. Post la reveno el la militkaptitejo, kie li gvidis multajn kursojn por diversnacionoj kaj kie li komencis verki poemojn en Esperanta lingvo, li fariĝas unu el la plej viglaj agantoj en la movado. Baghy gvidas diversgradajn kursojn kaj hejme kaj eksterlande kiel Ĉe-instruisto, aranĝas literaturajn vesperojn, gvidas E-rondon Amikan, aktoras kaj reĝisoras okaze de la Universalaj Kongresoj, prelegas kaj verkas. Li ne malzorgas eĉ la organizan sistemon de la movado kaj skribas "Publikan leteron" /1931/, en kiu li donis detalan proponon pri la reorganizo de la esperantista movado. Laŭ lia proponofariĝis naskiĝtago de dro Zamenhof "Tago de la Esperanta libro". Julio Baghy per sia tuta agado klopodis altigi lingvan kaj spiritan nivelon de la esperantistaro.

El ĉiuj diversaj agadoj de J. Baghy tiu sur la literatura kampo restos nepre por ĉiam plej grava kaj meritplena. El Budapest aŭdiĝis 1922 potenca poeta voĉo, kiu per poemaro "Preter la vivo" triumfe ekiris al pintoj de belo. Tiam du grandaj talentoj anoncis sin: K. Kalocsay kaj J. Baghy por

perbatali al la originala poezio ĝian vivorajton, por gvidi ĝin, stumblantan povrulinon, al la nivelo de naturlingva poeziarto.

Ne estas seninterese, ke ambaŭ grandaj poetoj havis tre parenca vivovojon, pri kiu rakontas J. Baghy:

Samtempe du homoj ekiris sur paralelaj vojoj al la sama celo. Apenaŭ paŝa distanco disigis ilin, sed ĝi estis sufiĉe granda por ne rimarki unu la alian dum longaj jaroj. Ĉiu rigardis nur antaŭen kaj atentis pri la propra vojo, parenca, tamen diferenca, sed en la animo de ambaŭ homoj brulis la fajro de la sama entuziasmo kaj la komuna celo inspire ombrumis ilin. Neniu el ili forlasas sian vojon, ĉar la pompo de la survojaj floroj estas diferencaj; sed neniu el ili preterlasas la okazon por atenti pri la voĉo de la alia. Ili jen reciproke entuziasmas, jen kverelas kiel la fratoj; ili jen konsentas pri la beleco de survoje trovitaj gemoj, jen akre diskutas pri la valoro de la trovita ŝtoneto: ĉu ĝi estas gemo aŭ siliko? Frata kverelo, amika diskuto, en kiuj partoprenas nur la mensoj, sed ne la koroj, havantaj reciprokan simpatian kaj neestingeblan entuziasmon por la komuna idealo. Tiel ili migras plu, ĉiu sur sia propra vojo. Jen Kalocsay kaj mi ... En la samaj jaroj ni naskiĝis, fariĝis esperantistoj /en la Enciklopedio estas erara dato ĉe li!/, en la sama tempo ni ambaŭ forlasis Esperanton por adeptiĝi al Ido kaj samtempe, pro samaj kaŭzoj ni seniluziiĝis pri ĝi kaj poste en la sama jaro ni prenis plumon por dediĉi nin al la literatura laboro en Esperanto kaj tamen dum longaj jaroj ni ne konis unu la alian.

La demandon, kial li fariĝis poeto, Baghy respondis jene: "Pri la "kial" mi scias malmulton, sed pri la "kiel" kontentigu vin la jeno: komence mi spasme prenis la plumon kaj nun la plumo spasme tenans nin."

La unua literatura naskaĵo de J. Baghy estis laŭ li: "Abortaĵo. La kritiko kondamnis min: Nek talento nek lingva lerteco. Lasu la literaturon! - Kelkfoje mi pripentis mian malobeemon.

Nu, sed tiaj obstinaj karakteroj, kiel mi, malofte akceptas saĝan konsilon. Kion fari?

Ni danku tiun ĉi "obstinecon", kiu alportis al nia literatura ĝardeno florojn tiom belajn! J. Baghy fariĝis nur originala poeto. Romantiko estas parto de lia koro kaj kiel sonas ankaŭ liaj versoj: jen admirinde delikata, jen forte kaj patose sonantaj. Li konsideras romantikon "kosmetikaĵo", kiu plibeligas la vivon, io, kio estas parto de la efektiva vivo. Ĉar ĉio, kio Baghy priskribas en siaj verkoj, fontas plene el lia koro kaj animo - tial li estis kaj estas sincere amata de ĉiuj esperantistoj. Sed ne nur de ili. Liaj verkoj estis tradukitaj en multajn naciajn lingvojn: anglan, francan, germanan, estonan, finnan, svedan, holandan, polan, latvan, katalunan, hispanan, hungaran, ĉinan, japanan.

Baghy estas instruisto de ĉiu komencanta poeto, kiu povas ĉe listudi belsonecon de versoj, precizan formon kaj ritmon. Ĉiu komencanto-poeto memoru bone ankaŭ vortojn de B., pri la verkoj de d-ro Zamenhof: "Mi legis ĉiujn, eĉ la Fundamenton de Esperanto!" Vere, neniu povas bone penetri la spiriton de nia lingvo ne leginte la verkojn de ĝia Majstro.

Verkista laboro de J.B. estas interesa kaj ofte eĉ tro rapida. Ekzemple al "Hura", originala romano, 400 pĝ ampleksa, li dediĉis nur 34 tagojn. "Printempo en aŭtuno" bezonis nur 5 tagojn kaj "Verdaj Donkiĥotoj" semajnon. Lia edzino rakontas pri li, ke dum verkado estis tre interese lin rigardi: jen li ridas, gestas, krias - jen ploras kaj imitas sonojn kaj ritmon.

Legado de liaj versoj kaj prozo estas vera ĝuo. Eĉ simpla homo, nekulturanta literaturon, estas ravita pro la eleganta lingvo, belsonaj versoj kaj ĉarma ritmo de liaj poemoj.

Sed J. Baghy ne nur verkas. Lia talento estas multflanka: li organizis, redaktoris, instruis, aktoris, prelegis, vojaĝis. Kun dro K. Kalocsay li fondis /1922/ kaj gvidis faman literaturan gazeton "Literatura Mondo", kies celo estis: "Doni lokon al

ĉiu valora verko originala aŭ tradukita, varbi ĉiujn talentajn verkistojn, eble eduki novajn." Sian taskon L.M. bone plenumis. Grandformata, ilustrita kaj sur bona papero presata monata ĵurnalo aperigadis juvelojn el la originala kaj tradukita Literaturo Esperanta kaj sub lertaj manoj de Kalocsay kaj Baghy baldaŭ atingis nivelon de nacilingvaj literaturaj revuoj.

### **Verkaro:**

PRETER LA VIVO /1922/

PILGRIMO /1926/

VIKTIMOJ /1926/

DANCU MARIONETOJ /1927/

MIGRANTA PLUMO /1929/

HURA /1930/

PRINTEMPO EN LA AŬTUNO /1931/

LA VAGABONDO KANTAS /1933/

VERDAJ DONKIĤOTOJ /1933/

LA TEATRA KORBO /1934/

SUB SANGA TERO

PRETER KA VIVO. Unua poemkolekto de la aŭtoro, kiu per sia individua tono kaj melodi-plenaj versoj ravis ĉiun literaturamanton. Ĝi heroldis grandan talenton, kiu eskapas el la lingva limigiteco de la antaŭmilitaj poetoj kaj montras antaŭ la originala poezio novajn eblojn. Sonoraj poemoj de Preter la vivo konvinkis definitive skeptikulojn pri Esperanta lingva belsoneco. La temo-riĉo de la poemaro anstataŭis banalajn motivojn de la komencaj poetoj kaj montris tiel plej klare, ke Esperanton oni jam ne devas prikanti kiel ion "novan", sed ke ĝi fariĝis jam nedisigebla esprimperanto de la poeta animo.

Preter la vivo havas 124 paĝojn. Enkonduke troviĝas Dediĉo, kiu estas kvazaŭ prologo. Ĝi estas poemo de eminenta

poeta forto. Sekvaj partoj: Tra Siberio, Tra l' oceanoj, Ĉe la ruinoj, Kantantaj kordoj.

Ĉiuj partoj enhavas poemojn belegajn, plenajn je emocio. La rimoj ne estas artefaritaj, sed surprizas ofte per sia nekutima noveco. Krom la beleco forma, la poemoj kaŝas profundajn pensojn filozofiajn. Ili kristaliĝis en la devizo:

Amo kreas pacon. Pacamo konservas homecon. Homeco estas plej alta idealismo.

En la poemaro estas Baghy efektive antaŭ ĉio Homo kaj ankaŭ ĉirkaŭ si li serĉas Homon. En la parto de poemoj verkitaj en Siberio sonas melodio kontraŭ blinda subpremo carisma; ni sentas pensojn vere progresemajn. Antaŭ ni kalejdoskopas fortaj personaj travivaĵoj, socialaj problemoj, abomeno al milito, kompato por suferantaj gefratoj, amaj serenadoj kaj observoj satiraj.

Kvankam en la poemaro severa kritikisto trovas kelkajn malperfektaĵojn /iam malharmonio inter formo kaj enhavo/, tamen ĝiaj bonaj ecoj superas ilin multoble.

Interesaj poemoj estas: Ploro kaj konsolo, Interrompita romano, Larmoj de Kristo, Dolora deziro, Turmentaj demandoj. Krioj de mizero, Milita fablo, La mar' furiozas kaj multaj aliaj.

Mi rekomendas al via atento la poemkolekton Preter la vivo, kiu nepre kreos en vi novan vidpunkton kaj komprenon por nia poezio. La aŭtoro en ĉi suba poemo ne troiĝas. Per ĉio li pridonacos vin, nur atentema kaj sentema animo necesas.

## DEDIĈO

Estas mi floro de sabla dezerto.  
Kreskis mi orfe sen ŝirm' de oaz'.  
Estas mi griza ĉifono de dioj,



teren ĵetita de l' alta Parnas'.  
Estas mi rido de ĝuo momenta,  
kiun kurbigas je ploro la sort'.  
Estas mi larmo de homo vaganta,  
kiun konsolos per kiso la mort'.  
Estas mi amo de koro sanganta  
pro la mizero de l' tuta homar'.  
Estas mi venĝo de sentoj ribelaj,  
kiuj inerte baraktas sen far'.

Floron, ĉifonon, la ridon kaj larmon,  
homo, akceptu donace de mi!  
Venkos la amo la venĝon inertan,  
ĉar ĝin destinis por venko la Di'.  
Mia donaco, se estas modesta,  
min ne riproĉu, ĉar estas nur sklav',  
kiu la verkon donante sin donas  
kaj li mem restas mizere sen hav'.  
Ĉion mi donas kaj ĉion disĵetas,  
kion mi havas en tiu ĉi mond',  
por ke vi ridu kaj larmu sincere  
songôjn naivajn de mondvagabond'.

PILGRIMO. Ĝi estas la dua kolekto de originalaj poemoj. La verstekniko ankoraŭ maturiĝis. Ni renkontas ofte patosajn poemojn, kun filozofia enhavo. En Pilgrimo aperis ankaŭ poemoj el lia familia medio. La poemoj havas samajn kvalitojn kiel tiuj en Preter la vivo: sonoraj kaj melodi-riĉaj. Ili rekte inspiras al muzikigo. Ekz. poemo "Jan granda tag" fariĝis tre populara kiel kanto de R. Kudla. Ankaŭ la poemo "Rankvarteto" pro sia petola motivo estas ofte deklamata.

LA VAGABONDO KANTAS. Tria originala poemkolekto. Ĝi entenas kelkajn interesajn pecojn, dum multaj aliaj poemoj perdis sian efikon pro la konstanta ripeto de la sama temo.

DANCU MARIONETOJ. Novelaro, kies titolo esprimas konvinkon de Baghy, ke homoj estas nur senfortaj pupoj en la monstraj manoj de la sorto. Estas nur malmultaj libroj, kiuj atingis tian popularecon, kiel tiu ĉi. Dancu marionetoj aperis jam en tria eldono. Kelkaj el la noveloj apartenas al la plej fortaj, kiuj estis en nia literaturo skribitaj. Impresa kaj plej ampleksa estas rakonto "Nur homo", kiu priskribas sorton de hungara militkaptito kaj rusa edzino, kies edzo troviĝas en kaptitejo en Hungario. Li fine hejmen revenas - la solvo ne estas banala. Konata rakonto estas "Kiel Mihok instruis angla" pri ĉarma kaj mallerta, sed tamen ruza samideano, kiu devis instrui al "tigra" kapitano Petrofi anglan lingvon, kiun li ne scipovis.

Baghy ĉi tie prezentis sin kiel lerta rakontisto.

VIKTIMOJ. La verko priskribas martirajn suferojn de la siberiaj militkaptitoj. Baghy povis penetri ĉi tiun temon tute realece, ĉar li mem 6 jarojn pasigis en la kaptitejo. Tamen la figuroj estas nedifinitaj kaj ĉeffiguroj nerealaj. La enhavo estas simila kiel en "nur homo" el "Dancu marionetoj": malespera ama luktado inter kaptito Baroy, kiu volas konservi fidelecon al hejmerestanta edzino, kaj Katja, malfidela edzino kaj demono. Malgraŭ jam menciita nerealeco de trajtoj de ĉefpersonoj la romano estas tamen tre kortuŝa legado, kiu akiris vastan popularecon. La romano aperadis en Literatura Mondo en daŭrigoj.

SUR SANGA TERO. Romano enkondukanta nin en la saman medion.

VERDAJ DONKIĤOTOJ. Ĝi estas romano kaj karikaturoj pri la strangaĵoj el la Esperanta vivo.

LA TEATRA KORBO. Libro enhavanta rememorojn pri lia vivo de la frua junaĝo.

HURA. Ampleksa romano, kiu estis en 1933 tradukita en la germanan lingvon. La verko estas grimaco kaj karikaturo pri nia epoko. Ĝi estas tre interesa, la filozofiaj partoj pensigaj. Sed tamen apud la majstra grimaco, bildo de estonta perfekta homa socio estas malforta. La libro estas leginda precipe pro sia freŝa kaj moderna stilo, kiu scias kateni la leganton ĝis la fino.

Multajn poemojn de J. Baghy premiis diversaj internaciaj konkursoj. Du liaj verkoj gajnis Akademian premion. Multaj poemoj estis tradukitaj en naciajn lingvojn. En la Stafeto aperos verŝajne baldaŭ nova volumo da poemoj AŬTUNA FOLIARO.

Julio Baghy estas Lingva Komitatano kaj depost 1923 ankaŭ Akademiano. En Hungario prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro. Ĉeĥoslovaka E-junularo deziras al sano Julio Baghy, kiu montriĝis ĝia sincera amiko, ankoraŭ multajn verkistajn sukcesojn sur la kampo de la Esperanta literaturo.

Rekomenditaj libroj: Preter la vivo, Dancu marionetoj, Viktimoj.

## **Sableroj**

(El Preter la vivo)

La poezio instruas nin senti;  
vivo reala la sentojn pripenti.

Se ekparolas ama sento,  
ofte eraras la prudento.  
Homo velanta super abismo, rifo,  
nepre konscias pri sia sensignifo.  
Por eviti duelon, skandalon  
eĉ hazarde ne paŝu - sur kalon.  
Kiu asertas: komprenas mi ĉion,  
tiu tutcerte komprenas - nenion.

## **KOLOMANO KALOCSAY**

Super la polvo de la mondĥaoso,  
en kor-izolo sidas kantforĝisto;  
juvelojn forĝas li sur vivamboso,  
el oro de la ĝoj', arĝento de la tristo.  
Ho, Majstro, de la frazo gemobrila!  
Majstro de l' verso polurita, ĉarma!  
Kiel nin sorĉas via ard' subtila,  
riĉa je l' sentabund' de via koro varma!  
Vin ne atakos Tempo la tirano!  
Envie li forrabas la renomon  
de ni teranoj per malpia mano;  
sed por eterne li indulgos vian nomon.  
Akceptu do omaĝon de animo  
pliriĉigita per belaĵoj viaj  
kaj forĝu, daŭre forĝu en sublino  
trezorojn de l' spirit' por koroj simpatiaj.

Tiel edife kantis la skota poeto John S, Dinwodie en la jaro 1951 por glorigi 60-an naskiĝtagon de la granda tradukisto kaj elstara poeto originala - dro Kolomano Kalocsay.

K. Kalocsay (kaloĉaj), hungaro, naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Abaujszanto. Gimnaziajn studojn li komencis en Miskolca kaj la universitatajn li finis en Budapeŝt fariĝinte kuracisto (1916). Antaŭ ol li fariĝis ĉefkuracisto de la budapeŝta hospitalo por infektaj malsanoj, devis servi dum 3 jaroj kiel bataalkampa medicinisto.

G. Waringhien karakterizas lin jene: "Alta, facilgesta viro, kun moviĝemaj manoj kaj tre karakteriza kapo: longa, ĝuama nazo, profundaj brunaj okuloj, alta nuda frunto, kaj ĉio substrekita de la ironia, iom diabla ridstreĉo de la lipoj. Li parolas per velura voĉo kaj prononcas la "o" longe kaj akute laŭ la hungara maniero."

Dro Kalocsay esperantiĝis en 1911, pri sia Ido-inklino li diras: "En 1912 mi funde trastudis la gramatikon kaj la vortaron de Ido. Tiam mi sciis Idon same bone kiel Esperanton. Sed mi neniam partoprenis en la Ido-movado, nek verkis ion en Ido: mia interesiĝo estis pure lingva kaj ĉesis post la ellerno de mia Ido-libro." (Pri la stranga paraleleco de Kalocsay - vivovojo kun tiu de Baghy legu ĉe Baghy!).

Sur la literatura kampo dro Kalocsay aperis en 1921 aperiginte tiam sian unuan MONDO KAJ KORO, kiu al literaturamaj legantoj profetis pri granda talento. Ili ne trompiĝis. Li baldaŭ prezentis sin kiel altkvalita arttradukisto, kiu daŭrigis vojon montritan de Grabowski. Kalocsay regas suverene eĉ gramatikajn subtilaĵojn de la lingvo kaj donis al la esperantistaro gravajn lingvistikajn studojn, kiuj kondiĉis kreskon de la lingva nivelo. Lia nomo estas ligita al la problemo de la neologismoj, kiu estis kaj daŭre restas problemo akuta, diversmaniere eksplikata kaj solvata (vidu malsupre). Kalocsay laboris krome fervore en la movado, oratoris, kontribuis diversajn E-gazetojn kaj estis ĉefredaktoro de LITERATURA MONDO. Nun plenumas K. Kalocsay

funkcion de vicprezidanto en Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro.

### **Verkaro:**

MONDO KAJ KORO (1921),  
KANTANTA KAMPARO (1923),  
MORGAŬ MATENE (1923), de Karinthy,  
JOHANO LA BRAVA (1923), de Sándor Pötöfi,  
TRAGEDIO DE L' HOMO (1924), de Emerich Madách,  
STREĈITA KORDO (1931),  
LINGVO STILO FORMO (1931),  
RIMPORTRETOJ (1931),  
ETERNA BUKEDO (1931),  
ROMAJ ELEGIOJ (1932), de J. W. de Goethe,  
TAGLIBRO (1932), de J. W. de Goethe,  
KIEL FARIĜI POETO AŬ PARNASA GVIDLIBRO (1932)  
HUNGARA ANTOLOGIO (1933), la poezia parto,  
LA INFERO (1933), de Dante Alighieri,  
ARTHISTORIO (1934), de Heckler,  
ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO (1934), lingva parto,  
PLENA GRAMATIKO.

Dro Kolomano Kalocsay estas konsiderata kiel tria granda evoluiganto de la lingvo, apud dro Zamenhof kaj Grabowski. Al Esperanta literaturo li kontribuis per verkoj unikaj, daŭre signifaj. Lia poeta voĉo estas forme perfekta kaj sentoriĉa. Ĉiu vorto estas sur sia ĝusta loko; superfluaĵoj ne tedas okulon de la legantoj. Kalocsay malkovris novajn sencojn de la jam "eluzitaj" vortoj. Sed lia bona lingva gusto pliriĉigis la lingvon eĉ pri vortoj novaj, neologismoj, Protesta ondo tiam leviĝis kontraŭ Kalocsay kaj asertis, ke li enkondukas en la lingvon balaston, kiu pezigas kaj malfaciligas Esperanton. La

problemo fariĝis temo de diskutoj eĉ disputoj inter konservativuloj, kiuj agnoskis sole originan Fundamenton, kaj progresemaj esperantistoj, kiuj celis pluan evoluon de la lingvo. Kalocsay daŭrigis sian vojon; cetere lian opinion pravigis antaŭ jaroj Zamenhof mem, kiam li skizis manierojn de la evoluo de Esperanto. Kalocsay konforme al tiu ĉi principo enkondukas novajn vortojn por nocioj, kiuj ne havis ĝis tiam sian respektivan nomon en Esperanto. Plie li per neologismoj celas forigi pezajn kunmetaĵojn, kiuj malbeligas la lingvon kaj faras ĝin plumpa por delikata poezia laboro. Per novaj vortoj oni volas ankaŭ anstataŭi tiel nomatajn "mal" vortojn, pri kiuj diras G. Waringhien: "Por ke la legantoj sentu la malon de koncerna impreso, ne sufiĉas kunmeti negacion kun la vortoj, kiuj ĝin esprimas; ĉar oni ne forigas tiel la evidentan impreson: oni elvokas la imagbildon dum oni kredas ĝin forpeli. Dezirante priskribi grizan vintran tagon Grabowski skribis:

"La tago malvarma, malgaja, sensuna ..."

Verso taŭga por doni la impreson de sunplena somertago. Tiun bildon la uzo de "mal" ne forigas de la spirito de la leganto. Tiuj mal-vortoj estas vera plago por la poezio - kaj ne nur por la poezio: pensu pri sekvoj, kiujn havus miskompreno de poraŭtomobila surskribo "Turnu maldekstren!".

Por tiuj, kiuj volas pli detale konatiĝi pri la teoria flanko de tiu ĉi problemo mi rekomendas antaŭparolon al "Skizo de E.metiko" fare de G. Waringhien el Parnasa Gvidlibro.

La ofta uzado de neologismoj ĉe Kalocsay estas verŝajne unu el la kaŭzoj, ke la esperantista publiko ne trovis al sia granda majstro ĝis nun la ĝustan rilaton.

**STREĈITA KORDO.** Poemaro aperinta en 1931. Samjare kiel Lingvo Stilo Formo, Rimportretoj kaj Eterna Bukedo. Recenzoj koncentriĝis al la aliaj libroj kaj Streĉitan Kordon menciis nur pretere. Kaj ĝuste tiu ĉi libro estis evento de nia

literaturo. L. Totsche diras: "Okazis io ankoraŭ ne ekzistanta en nia lingvo kaj literaturo, okazis io nova: poemlibro, kiu meritas, ke oni lernu Esperanton nur por ĝin legi, poemlibro, kies apero malfermas horizonton por nia literaturo: la epoko de l' diletantismo definitive dronis en la pasinton. La apero de Streĉita Kordo estas unu el la plej gravaj datoj de nia estonta literatur-historio." - Kaj vere: en sep cikloj, je kiuj la libro estas dividita, montris sin Kalocsay al la publiko kiel poeto de sorĉe fosforeskanta poezio. Kiel poeto de profunda vivo-filozofiemo, amo al naturo, amo al virino kaj homo entute. Grandioza Prologo malfermas la tutan libron, post kies tralego nepre naskiĝos ĉe vi profunde - konsciaamo al Esperanta poezio.

**RIMPORTRETOJ.** 58 portretoj de la plej eminentaj propagandistoj kaj literaturistoj de la samtempa movado. Malfacila estis la laboro, kiun Kalocsay entreprenis. Brila estis la sukceso, kiun rikoltis. La homoj scivolas pri la untimaĵoj de siaj poetoj kaj verkistoj laŭ sia natura instinkto. El la 58 rondeloj (vidu la metrikon) multaj restos daŭre vivaj monumentoj de la pioniroj de nia movado.

**LINGVO STILO FORMO.** Ĝi estas faka libro entenanta originalajn lingvajn eseojn. Grandan sukceson renkontis tiu ĉi libro. La esperantistoj avide prenis la libron en siajn manojn por lerni, por pli profunden penetri en la konstruon de nia lingvo. Inter alie Kalocsay en la unua parto prezentis sian grandan eltrovaĵon: **PRINCIPON PRI LA INVERSA VORTEFIKO.** Tiu ĉi principo lumigis ĝis tiam malklarajn flankojn de la vortfarado kaj kondamnis monstrajn kunmetitaĵojn, kiuj en la libroj kaj precipe gazetoj ofte aperadis. Kalocsay montris, ke ne eblas kunmeti vortojn kun arbitra vorta karaktero. (Kp en la gramatiko: belsimfonio ne



estas "bela simfonio", sed laŭ inversa vortefiko "simfonio de belo" ktp.).

Alia parto de la libro estas interesa prelego de Kaloscay pri la E. poezio. Komencantaj poetoj kaj interesuloj pri la metriko trovos koncernajn ĉapitrojn je la fino de la libro. Resume: Lingvo Stilo Formo ne manku en la biblioteko de niaj gesanoj!

JOHANO LA BRAVA - Esperanta repoemigo de la S.Pötöfi-verko. Maldika libreto certe ĝojigos tiujn, kiuj ŝatas belajn versojn.

KANTANTA KAMPARO. Entenas tradukon de 101 hungaraj popolkantoj.

ETERNA BUKEDO, antologio el poeuiĵoj de 22 naciaj lingvoj. Ĝi estas traduko, pri kiu validas la samo, kion mi diris pri Streĉita Kordo. Nur grandformata talento de Kalocsay povis komenci tiel altpretendan laboron - kaj sukcesi. Kelkaj pecoj estas pintoj de la traduka arto. La leganton ĉarmas plej grandaj poetojtutmondaj en la Esperanta vesto: jen Milton, Shelley, Shakespeare, Puŝkin, Hugo, Schiller, Carducci, Vrchlický, Loped de Vega, Heine, Poe ... En E. B. vi konvinkiĝas pri la ebloj de Esperanto kaj vi ekamas ĝin. La tutan antologion enkondukas soneta antaŭparolo. Aŭskultu:

Por fuĝi for de l' taga tedo  
ĝardenojn fremdajn mi trairis.  
Plezure gapis mi kaj miris  
kaj kuris mi de bed' al bedo.

Sur ĉiu bedo kaj arbedo  
min freŝaj floroj tente tiris.  
Mi pekis: kelkajn mi deŝiris

kaj plektis ilin je bukedo.

Jes, ŝtelis mi el fremdaj koroj:  
Bukedon de ŝtelitaj floroj  
prezentas mi en verda vazo,  
Eternaj floroj estas ili:  
eĉ paliĝinte ŝajnas brili  
en bel' sentempa de l' Ekstazo.

Leo Belmont aldonas: "Ho, se tiaj ŝtelistoj estus pli nombraj!"

ROMAJ ELEGIOJ kaj TAGLIBRO, estas tradukoj de J. W. Goethe.

PARNASA GVIDLIBRO (La tutan titolon vidu en Verkaro!). Unikaĵo de nia literaturo. Kunlaboris profesoro G. Waringhien. La nomo jam diras, ke ĝi estos ne-malhavebla por niaj poetoj-komencantoj kaj poezi-teoretikuloj Esperantaj. Inaŭguras la libron "Balado, fanfaronanta pri la grandaj utiloj de tiu ĉi verkoj", kies lasta verso karakterizas la tutan libron:

"Ni donas ĉion krom genio."

P.G. konsistas el kelkaj partoj:

1. Skizo de Esperanta metriko (Waringhien) estas unua kompleta pritrakto de la metriko aplikata en E. La antaŭparolo estas tre grava.

2. La Arto Poetika, disertacio de C.E.R. Bumy (pseŭdonimo de K. Kalocsay). Ĝi konsistas el 6 partoj, en kiuj Kalocsay mirigas per sia spriteco, pensoprofundeco kaj faka klereco. Mi estis ravitaĝin traleginte kaj ektrovis min en malagraba embaraso volante elekti por vi mallongan fragmenton. Ne eblas: La Arto Poetika formas tian kompaktan tuton, kiun oni ne povas disŝiri. El la komenca plendo pro malgranda intereso

pri poezio ĉe la publiko li "kaptas didaktan liron" kaj gvidas junan adepton de la poezi-arto en la sekretojn de poemofarado. Mi trovis tiun ĉi versan traktadon majstraĵo. Nepre ĝin tralegu!

3. Esperanta Rimaro, kompilita de Waringhien, estas helpilo por poetoj, kiuj troviĝas en embaraso ne povante trovi konvenan rimon.

4. Poezia Fakvortaro - listo de neologismoj. Malgrandan parton vi trovos en la fina parto de tiu ĉi skizo.

LA INFERO, el la itala de Dante Alighieri. La traduko, kiun Kalocsay pleje ŝatas. En ĝi aperis eksterordinara neceso uzi neologismojn. La demando: "Ĉu vi ne estus povinta traduki la Inferon sen neologismoj?" respondis Kalocsay jene: "Ne. Tion mi diras kun trankvila konscienco. Cetere, nur la kvinono de ili estas nova aŭ Parnas-Gvidlibra, la ceteraj troviĝas en konataj vortaroj." Laŭ la atesto de italaj kompetentuloj la traduko estas fidela transkompono de la unua parto de Dia Komedio en Esperanton.

PLENA GRAMATIKO. Verkita en kunlaboro de G. Waringhien. Unua kompleta gramatiko, science pritraktanta Esperantan gramatikon. Impona verko vekis tute kontrastajn eĥojn ĉe konservativuloj, kiuj vidis en ĝi atencon kontraŭ Fundamento.

ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO. Estas duvoluma verko, en kiu prizorgis Kalocsay la lingvan parton.

TRAGEDIA DE L' HOMO. Hungara ĉefverko de E. Madách (madaĉ). Ĝi estas drama poemo, pri kies Esperantlingva repemigo diras J. Baghy, ke ĝi kelkloke superas la originalon.

Antaŭ nelonge estis eldonita en Danlando fablo-kolekto EZOPA SAĜO. Kunlabore kun G. Waringhien tradukis K.Kalocsay poemkolekton FLOROJ DE MALBONO de la franca poeto Ch. Baudelaire, kies eldono estas preparata.

Dro Kolomano Kalocsay estas nia plej granda poeto, kies vasta verkaro ĝis nun atendas sian justan aprezon.

Rekomenditaj libroj: Streĉita Kordo, Lingvo Stilo Formo, Eterna Bukedo.

## **NIKOLAO HOHLOV**

N. Hohlov, ruso, naskiĝis en 1891 en Moskvo kaj mortis en 1953. Post siaj studoj en gimnazio kaj komerca instituto li eklaboris kiel supera ekonomo de iu industria trusto.

Hohlov kunlaboris al multaj E. gazetoj, precipe al Literatura Mondo; tradukis el lingvoj angla, serba kaj rusa. Poetan gloron atingis per sia unusola poemaro LA TAJDO, kiu metis lin inter la ĉefajn majstrojn de la E. vorto. Post LA TAJDO lia poeta voĉo silentiĝis, malgraŭ riproĉoj de Privat, Baghy kaj aliaj literaturistoj. Li forlasis sian artisman lirikismon por fordoni siajn fortojn al tradukado de klasbatalaj poemoj, por satisfakcii tiel al sia sociala konscienco.

Belan studon pri Hohlov vi trovos en DE PAĜO AL PAĜO fare de Totsche, al kies demando fina:

"Ĉu falis trulo el lia mano? Ĉu, kiun tiel verve li komencis, eterne stumpa restos lia

- Monumento postlasita sur la vojo al Eden?" ni hodiaŭ post morto de la poeto en 1953 verŝajne povas diri: jes!

## **Verkaro:**

LA MORTO DE DELEGITO DE UEA (1924),  
ORIENTAJ FABELOJ (1928), de Doroŝeviĉ,  
HISTORIO DE LA MONDLINGVO, traduko de E. Drezen.  
LA TAJDO (1928).

LA TAJDO estas unua kaj lasta poemaro de Hohlov. Ĝian signifon ni povus kompari kun tiu de Streĉita Kordo de Kalocsay. Ni legas en ĝi kristalajn versojn, kiujn apenaŭ ni renkontus ĉe poetoj aliaj. Lia poezio estas altpretenda. Poemoj, kiel La Tajdo, Mia vojo, Duelo, Eŭropo, 1905, Prolegomeno kaj En malsereno restos perloj de nia poezio.

### **Mia vojo**

Mi levas mian kapon en ĉielon,  
Sed per piedoj staras sur la ter';  
Nur idealojn vidas kiel celon,  
Sed nutras min per krudreala ver'.

Sur montoj kreskas mia sorĉa floro,  
Sed en la valoj kuŝas mia pan',  
Altiras la animon ĉiu floro,  
Sed ankre tenas ĝin la karna man'.

Al ĉiu bel' mi venas tra la tera,  
Tra la dolora aŭ ĝuiga prov';  
Sen tiu voj' ĝi estus nur ĥimera,  
Tuj paliĝonta post la brila nov'.

Samtial preĝas mi dum ardaĵ kisoj  
Kaj pliĉastiĝas en volupta trem',

Kaj la anim' la blankon de narcisoj  
Ne perdas en frivolo de l' poem'.

## **RAYMOND SCHWARTZ**

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo,  
la çarma an' de Epikur'!  
La Verdán Katon, ho, terur'!  
Li pikis morta per ombrelo.

Kaj post la streç' de l' kata felo  
li testamentis per tambur' ...  
Jen Raymond Schwartz kun vinbotelo,  
la çarma an' de Epikur'.

En verso, êserco kaj novelo,  
Grimaco kaj karikatur'  
ni çiam sentas kun plezur'  
aromon de la moskatelo.

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo!

(K. Kalocsay: Rimportretoj.)

Raymond Schwartz (êsvarc), franco, naskiçis en Metz la 8-an de aprilo 1894. Nun bankoficisto en Parizo. En la E.literaturo li prezentas unikan fenomenon.

Li estas la unua grandformata humoristo, kies sprito kaj çia forma manifestiçio vekis sensacion. Sian karieron Schwartz komencis per fondo de la konata pariza kabaredo "Verda Kato" en 1920. La kabaredo funkciis kelkajn jarojn nutrante êserceman publikon per plej sukaj fruktoj de la humuro de çia

gvidantaro, en kies frunto staris Schwartz. Hodiaŭa kabaredo de la samaj kvalitoj en Parizo nomiĝas "La Tri Koboldoj".

R. Schwartz redaktis ankaŭ dum 1933-1935 humurgazeton LA PIRATO, kiu "kaperis ĉiumonate". Unuajn rimaĵojn li publikigis jam antaŭ la milito, sed nur post ĝi lia talento plene disfloris.

R. Schwartz, kiun al vi tiel trafe prezentis K. Kalocsay en la supra Rimpostreto, estis nomata inter esperantistaro "terura infano de nia movado".

## **Verkaro:**

VERDKATA TESTAMENTO (1926),

PROZO RIDETANTA (1928),

LA STRANGA BUTIKO (1931),

LA ĜOJA PODIO (1949),

ANNI KAJ MONTMARTRE.

VERDKATA TESTAMENTO. Kolekto de kanzonoj, sprite-pikaj aludoj al strangaĵoj en la E. vivo, ironiaj versoj pri homaj malfortaĵoj kaj vanteco. V. T. rikoltas programojn de la kabaredo Verda Kato. Same kiel en alia, LA STRANGA BUTIKO, Schwartz sin montras atentema observanto de la vivo. Li scias tikli, ironii, eĉ pinĉi! Sed lia ironio kaj moko estas bonintencaj. Ĉio ĉi, transdonita per perfekta versa formo, povis nur veki aplaŭdon ĉie, kie Schwartz aŭ lia libro aperis. Kaj same estis ĝis nun en ĉiuj Someraj E-Tendaroj. Schwartz fariĝis preskaŭ "tendara" poeto, kies poemoj estis multnombre deklamataj ĉe tendarfajroj kaj aliaj okazoj. - Ankoraŭ perfektigantan versteknikon kaj fantazion konstatos leganto en LA ĜOJA PODIO, kiu aperis en la postmilitaj jaroj. Denove Schwartz, kiu ne preterlasas unu okazon por akcenti gajajn vivmomentojn prezentas sin al ni. Sed ni vidos, ke Schwartz

tamen havas ankoraŭ alian vizaĝon ol la ridoplenan! Poemo "NUR EPITAF' ATESTAS" pri Mnichov-tragedio de la ĉeĥoslovaka ŝtato atestos pri tio, ke eĉ en Esperanto povas aŭdiĝi forta poeta voĉo kontraŭ maljusto kaj krimo. Simile agordita estas lia "KOMPATON POR BIKINI", kie li pledas por nuligo de la atomeksperimentado sur Bikini.

PROZO RIDETANTA estas lia unua prozo-libro. Ĝi entenas kelkajn plej spritajn novelojn en E. skribitajn. ANNI KAJ MONTMARTRE, neampleksa romano, kiun kompetentaj recenzistoj konsideras eta ĉefverko de nia literaturo. Ĝi priskribas sorton de orfa germana knabino, delogita en Parizon de sia amato kaj tie forlasita. Ŝi venas en manojn de fiulo, kiu volas devigi ŝin al metio de stratknabinoj. Anni antaŭ ekdrone en la marĉo savas sin el Montmartre al sia hejmo. La romano apartenas al la plej ŝatataj. Mankas sentimentaleco aŭ moral-filozofiado. Lia stilo estas agrable flua kaj natura.

Elekti unu el la poemoj de Schwartz por lin prezenti estas ekstreme malfacile. Oni devus citi ĉiujn. Tondre estis en SET aplaŭdita Kata logo, En sonĝo, Senhareco, Pli bone, E. eliksiro ktp. Unu, kies fino jam fariĝis proverbe uzata (kaj oftege diskutata), mi prezentas al vi. Via sorto ne estu simila!

ESPERANTISTO, EKESTO KAJ MALAPERO  
[Plagiato (aŭ preskaŭ) el G a l i p o]

Gazetartikolo  
Aŭ varba parolo,  
Favora impreso,  
Ekintereso.

Lernolibro,  
Sankta vibro,  
Propaganda miasmo:



Entuziasmo!

Samideano,  
(Je via sano!)  
Kamarado,  
Varbado,  
Instruo,  
En butontruo  
Verda flago,  
Gloro tago!

Plua ŝtupo  
Nova grupo.  
Nova sento  
Facila vento  
kaj poemo  
Pri sama temo!  
Post hezito  
Delegito.  
Laŭ bezono  
Gazetabono  
Kotizoj  
Kaj valizoj  
Por kongreso.  
Miraklimpreso!  
Fraka veŝto,  
Bala festo,  
Naci-kostumo,  
Amindumo.  
Hispanino,  
Korinklino  
Kaj esperoj,  
Amleteroj.

Mielo,  
Ĉielo!

.....

.....

Edzino;  
FINO!!

DEK AFORISMOJ, EL KIUJ ĈIU ESTAS  
SENTENCO NE SEN SENCO!

1. La elefant', la granda besto,  
Ne loĝas en birdeta nesto.
2. La hundo svingas sian voston,  
Se vidas ĝi viandan oston.
3. Feliĉa estas fiŝo tuta,  
ĉar fiŝedzino estas muta.
4. En akvo banas sin saĝulo,  
Sed akvon trinkas nur stultulo.
5. Ne sendu vi al princa moŝto  
Putritajn ovojn per la poŝto.
6. La piro kreskas sur la arbo,  
Sur viro kreskas nur la barbo.
7. La pulo saltas en galopo  
eĉ sur krani' de episkopo.
8. Paseroj manĝas ĝis plensato

Ĉevalproduktoj sur la strato.

9. Normala viro dumebrie  
Subtenas murojn plej konscie.

10. Prudenta hom' ne iras vere,  
Al necesejo senpapere!

(Tiujn aforismojn plej zorge deklamu,  
por ke neniu el tiuj dek lamu!)

## JEAN FORGE

Jean Forge - Tekniko kaj Rapid'.  
Moderna vibro, aŭto, kino.  
Abismoj de la homa sino.  
Vi legos ĝin en unu sid'.

Mister Tot ŝtelas kun avid'  
sekretojn de la hom-destino:  
Jean Forge - Tekniko kaj Rapid',  
Moderna vibro, aŭto, kino.

Ĝis temp' de Nero li sen brid'  
flugigas nin per Co-maŝino,  
Kaj pro l' groteska temo-ŝpino  
eksplodas ni en laŭta rid' ...

Jean Forge - Tekniko kaj Rapid'.  
(Rimportretoj, K. Kalocsay)

Jean Forge (propranome Jan Fethke), polo, naskiĝis la 26-an de februaro 1903 en Oppeln. Dum siaj studentaj jaroj en politekniko li laboras en ĵurnalistiko, poste fariĝas reĝisora asistanto ĉe la fama Universalfilm A.G. (UFA). Depost 1928 li memstare reĝisoras filmojn, el kiuj kelkaj estas konataj eksterlanda.

Ekde sia esperantistiĝo (1919) Forge estas laborema samideano. Li redaktis ESPERANTOn TRIUMFONTAn kaj tre aktive partoprenis la polan E. movadon. En 1931 sukcesis varbi por Esperanto KOLA AJAY (aĵaj), negro, kaj prepari por li prelegvojaĝon, kiu estis tre fruktodona. Forge krome estas sperta Ĉe-instruisto en diversaj landoj.

Sur la literatura kampo gloriĝis per siaj tri originalaj romanoj, post kies eldono Forge silentiĝis.

ABISMOJ (1923), unua romano, skribita ankoraŭ en juna aĝo. Fundamenta lingvo, klara stilo, analizoj de animkonfliktoj kaj originala roman-konstruo, kie la personoj mem rakontas siajn historiojn - rezultigas, ke la libro estas valora kontribuaĵo al la literatura trezoro.

SALTEGO TRANS JARMILOJ (1924), dua romano, kiu konfrontas fantazie jarcentojn unuan kaj dudekan. La tuta domo de s-ro Fromaĝi helpe de la misteraj Co-radioj povas esti transportita en la malnovan Romon. Strangaj aventuroj de la domanoj en la urbo de Nerono estas interesa legaĵo.

Tamen s-ano Szilágyi opinias, ke la libro ne atingas nivelon de la Abismoj. La lingvo estas iom malpli glata. Forge trouzas afiksojn.

MR. TOT AĈETAS MIL OKULOJN (1931), detektivromano, kun paĝoj plenŝtopitaj de enhavo psikologie subpentrita. Ĝi ne estas trivialaĵo! En la romano ni renkontas

Forge tian, kian pentris lin en la supra rondelo K. Kalocsay. Forge elektis por tiu ĉi romano interesan moton, kiu bone enkondukas al la legotaj okazajoj:

"Ĉiu homo portas maskon antaŭ sia vizaĝo. Ĉar ne estas eble vidi la homon sen masko, ni ŝvebas en eterna erariĝo kaj serĉas unu la alian vane."

Mr. Tot pere de moderna inventaĵo - televizoro - ŝtelas la plej sekretajn pensojn kaj movojn de la homanimo. En la mallonge nererakontebla plua temdisvolvo aperas dro Kivikas, detektivo Viskarbeto, revolverpafo, fantaziigita morto, gasbombo kaj fina venko de subtaksata detektiva lerteco. Por konatiĝi kun la skribmaniero de J. Forge, legu tiun ĉi libron.

Por longaj jaroj mutiĝis la plumo de J. Forge. Antaŭ nelonge li vizitis Ĉeĥoslovakio kaj en Praha, okaze de la kluba babilo li malsekretigis al ni, ke li preparas eldonon de sia nova libro, kiu nomiĝos simple NOVELOJ. Ĝi ne estos fantazia, sed ĉerpos temojn el la Esperanta medio.

## **STELLAN ENGHOLM**

S. Engholm estas svedo, naskiĝis en 1899 en Stockholm. Kun Esperanto li konatiĝis jam kiel popollerneja instruisto en 1920. Aktive eklaboris nur en 1927 kiel kunlaboranto de LITERATURA MONDA kaj originala romanverkisto.

### **Verkaro:**

AL TORENTO (1930),  
HOMOJ SUR LA TERO (1932),  
INFANOJ EN TORENTO,  
VIVO VOKAS (1946).

## **Tradukoj:**

GÖSTA BERLING,

LA MONO DE SINJORO ARNO,

LA RINGO DE LA GENERALO,

LA INFANOJ DE BETLEHEMO, ĉiuj kvar verkoj de Selma Lagerlöf

LA PASKO, de August Strindberg

EKSPEDICIO KON-TIKI, de Thor Heyrdahl

S. Engholm literature famiĝis precipe pro siaj originalaj roman-rakontoj. La unuaj liaj figuroj estas en tro klare pentritaj, ili vivas iun nerealan vivon kaj filozofas nekonforme al siaj animebloj. En INFANOJ EN TORENTO li sukcesis jam pli bone.

Kiel tradukisto laboris S. Engholm kaj kiel poezi- kaj kiel prozo-tradukisto. Konataj estas liaj tradukoj el Selma Lagerlöf. S. Engholm partoprenis ankaŭ en la traduklaboro super Kon-Tiki, kiu estis el Esperanto tradukita en la lingvon slovakon.

La verkaro de S. Engholm estas vasta kaj nun li dediĉis siajn fortojn ekskluzive al la literatura laboro.

## **FERENC SZILÁGYI**

Dro F. Szilágyi (silad'i), hungaro, naskiĝis la 1-an de februaro 1895 en Budapeŝt. Post siaj juristaj studoj fariĝis oficisto, dum longa tempo senlabora. El Budapeŝt li transloĝiĝis al Svedio, kie li ricevis svedan civitanecon kaj vivas nun en Boras.

Por Esperanto tre aktiva laboranto: kunlaboranto al multaj E. gazetoj; aplikado de la memverkita instrumetodo per

lumbildoj; traduka laboro kaj originala verkado; redaktado de la kultura revuo NORDA PRISMO.

F. Szilágyi estas verkisto konscienca kaj klera, kies stilo estas eleganta, moderna kaj kolorriĉa. Inter la nuntempaj literaturistoj sendube unu el la plej bonaj.

### **Verkaro:**

POEMARO EL HUNGARLANDO (1929),  
PENTROARTO EN LA MALNOVA HUNGARUJO (1932),  
de Genthon  
TRANS LA FABELOCEANO (1932),  
LA GRANDA AVENTURO,  
INTER SUDO KAJ NORDO,  
LA SIMPLA ESPERANTO,  
KOKO KRIAS JAM (1956).

POEMARO EL HUNGARLANDO estas siaspeca antaŭulo de la HUNGAA ANTOLOGIO, kies kunlaboranto Szilágyi ankaŭ estis. TRANS LA FABELOCEANO estas kolekto de modernaj fabeloj kaj noveloj, kiujn verkis Szilágyi por siaj gekursanoj por variigi iliajn lecionojn. LA SIMPLA ESPERANTO estas bone konata sprita lernolibro, kun multaj originalaj poemoj. KOKO KRIAS JAM estas novelaro eldonita de la STAFETO.

F. Szilágyi kunlaboris ankaŭ al la SVEDA ANTOLOGIO kaj estis unu el la ĉefaj kunlaborantoj por la ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO.

## HILDA DRESEN

Hilda Dresen - padus' odoras  
super degela marĉa ŝlim',  
betuloj en la malproksim'  
blanktrunke vintron rememoras.

Sub frosta norda krusto floras  
kaŝitaj sentoj en anim'  
Hilda Dresen - padus' odoras  
super degela marĉa ŝlim'.

Nun aŭdu sur la lir' sonoras  
sudlande arda koresprim',  
kaprica ritmo, sorĉa rim':  
Marie Under ardfrosta ...

Hilda Dresen - padus' odoras.

Hilda Dresen, estonino, naskiĝis la 11-an de majo 1896 en Kolga, Harjumaa. Esperantistino de 1913. Profesie radiotelegrafistino.

Ektradukis en Esperanton en 1922. Siajn tradukojn kaj pli poste ankaŭ originalajn literaturaĵojn ŝi publikigis en Literatura Mondo.

"Melankolio estas la grundtono de ŝia poezio: melankolio pri si kaj pri la homoj. Sed tio ne estas plorema sentimentaleco: ĝi similas al la morna koloro de la ĉielo, tra kiu oni esperas, volas lumon. Tiu lumespero donas tute apartan nuancoriĉon eĉ al la grizo, kaj en ŝiaj printempaj bildoj ĝi tremas en la ĝojo de plenumiĝo."

(K. Kalocsay)



En ŝiaj originalaĵoj ni renkontos lingvon ankoraŭ pli esprimivan ol en la bonegaj tradukoj. H. Dresen estas nia plej granda poetino.

### **Verkaro:**

ELEKTITAJ VERSAĴOJ (1929), de Marie Under,  
HORIZONTOJ (1931), de Barbarus,  
ESTONAJ KANTOJ (1951),  
ESTONA ANTOLOGIO (1952).

### **Betulo**

Malmulton bezonas okulo  
por esti ravita:  
jen tegis sin nuda betulo  
per verdo subita.

Ho, kia belec' senmezura:  
betul' beltalia  
sur fon' de l' ĉiel' lazura  
en rob' freŝfolie.

Sur blanka trunketo diskreta  
vual' bonodoras ...  
ekvibras en koro sekreta  
sopiro dolora.

## NIKOLAJ VLADIMIROVIĈ NEKRASOV

N. V. Nekrasov, ruso, ĵurnalisto, naskiĝis la 18-an de decembro 1900 en Moskvo. Esperantisto ekde 1915. Li fariĝis en 1918-9 prezidanto de la Tutruslanda Ligo de Junaj Esperantistoj kaj redaktis ĝian JUNAn MONDON. Kontribuis al diversaj aliaj E. gazetoj.

Li okupiĝis pri la historio kaj kritiko de la E. literaturo, pri la proleta revolucia E. movado kaj pri la nacia problemo. En la Nova Epoko li publikigis multajn literaturajn studojn pri E. verkistoj: Baghy, Schulhof, Hohlov, Jung, Miĥalski k.a.

### **Verkaro:**

EŬGENO ONEGIN, de A. S. Puŝkin

KUPRA RAJDANTO, de A. S. Puŝkin,

DEKDU, de A. Blok,

PER PLENA VOĈO, de V. Majakovskij

kaj aliaj verkoj de Gerasimov, Balmont kaj Bezimenskij.

## GASTON WARINGHIEN

G. Waringhien (varingien), franco, profesoro, naskiĝis en 1901. Li estas konata ĉefa leksikologo de Esperanto kaj elstara beletristo kun intima sento por la plua sukcesa evoluo de nia literaturo. Akademiano. Kun Grosjean-Maupin estas aŭtoro de la PLENA VORTARO kaj kompilinto de ties SUPLEMENTO. G. W. eldonis duvoluman historie dokumentan verkon LETEROJ DE ZAMENHOF. Kun K. Kalocsay li prilaboris PLENAN GRAMATIKON kaj PARNASAN GVIDLIBRON. De Ch. Baudelaire estas

preparata por preso FLOROJ DE MALBONO, kiujn tradukis ankaŭ kune kun K. Kalocsay. G. Waringhien kompilis nun presatan ESPERANTA-FRANCA VORTARON, kiu verŝajne estos la plej ampleksa el ĉiuj aliaj vortaroj naciaj. Lian lastan verkon (ESEJOJ) eldonis en 1956 la STAFETO.

G. Waringhien estas kompetenta fakulo pri la Esperanta poezio. Ne eblas preterlasi fakton, ke li redaktas elstaran literaturan revuon LA NICA LITERATURA REVUO, kiu kun NORDA PRISMO estas dignaj reprezentantoj de la Esperanta kulturo.

### **Verkaro:**

PLENA VORTARO,  
LETEROJ DE ZAMENHOF,  
PLENA GRAMATIKO,  
PARNASA GVIDLIBRO,  
LA FLOROJ DE MALBONO, de Ch. Baudelaire,  
ESPERANTA-FRANCA VORTARO,  
ESEJOJ

## **IVO LAPENNA**

I. Lapenna estas kroato, eksprofesoro de la internacia juro kaj historio de diplomatio en universitato de Zagreb. Naskiĝis en 1909. Nun li vivas en Anglio.

I. Lapenna estas gvidanta personeco de la E. movado nuntempa. Pro siaj meritoj estis elektita ĝenerala sekretario de UEA. Kiel observanto li partoprenis ĝeneralan kunvenon de UNESKO en Parizo 1952, kiam estis diskutata la Internacia Peticio kaj atingis, ke ĝi akceptis la rezolucion, kiu devigis

rediskuti la temon en la ĝenerala konferenco en Montevideo 1954. Tie li atingis konsultan pozicion por UEA kaj akcepton de la fama rezolucio favore al Esperanto.

I. Lapenna estas oratoro de eminentaj kvalitoj. Pri tiu ĉi arto li verkis fakan libron RETORIKO, kun aparta konsidero al la Esperanta parolarto. La alia libro estas AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO. En LA INTERNACIA LINGVO, faktoj pri Esperanto li donas kompleksan bildon pri la historio, organizo kaj kulturo de la E. movado. Lia stilo distingiĝas per klareco kaj eleganteco.

### **Verkaro:**

RETORIKO (1950)

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA  
INTERNACIA VIVO,

INTERNACIA LINGVO, faktoj pri Esperanto (1954)

## **MARJORIE BOULTON**

M. Boulton naskiĝis apud Londono en 1924. Post eduko en diversaj ŝtatlernejoj ŝi akiris diplomon ĉe la Oksforda Universitato; nun estas ĉeflektorino pri la angla literaturo.

Esperanton ŝi eklernis en 1949 kaj ne supozis, ke fordonos al ĝi sian kreaĵon kapablon. En tiu tempo M. Boulton komencis publikigadi siajn anglalingvajn librojn.

Ŝian unuan Esperantan poemkolekton eldonis STAFETO (1955), sub titolo KONTRALTE. Antaŭparolas W. Auld.

En la libro alternas naturobservoj, pasioj, protestoj de la virina koro homamo, eĉ satiro.

## LA TRIOPA MEMO

Mi estas tri. La digna lektorino  
kun la krajon' kritika libron legas.  
En nigra robo pri la origino  
de l' dramo primitiva ŝi prelegas.

Dume en koro, primitiva dramo  
okazas, ĉiam freŝa kaj terura;  
Sub nigra robo brulas nun amo  
virino simpla en dezir' tortura.

La lektorino pensas. La virino  
baraktas, krias, nur angoron sentas.  
Sed la poet' per arta disciplino  
observas ilin ambaŭ, kaj komentas.

## WILLIAM AULD

W. Auld estas skoto, astronomo. Lia poezia lingvo estas moderna, kun abundo da neologismoj. Socialaj problemoj, amo al virino, volupto kaj pasio, travivaĵoj de aviadisto - jen kelkaj temoj de liaj poemoj en KVATOPO, kiu estis la unua eldonaĵo de STAFETO. Krom W. Auld (ould) kontribuis al Kvaropo aliaj tri skotaj poetoj: John Dinwodie (dinvudi), John Francis (frensis), kaj Reto Rossetti. La kvaropo de la skotaj poetoj kreis novan t.n. Skotan Skolon, kiu daŭrigas la vojon iritan siatempe de la Budapesta skolo.

La novan verkon de W. Auld LA INFANA RASO, eldonis en 1956 ankaŭ la libroeldonejo STAFETO.

Tre gravan funkcion li plenumas kiel redaktoro de la organo de UEA "ESPERANTO INTERNACIO":

o - o - o

Ekzistas ankoraŭ granda aro da verkistoj, kies kontribuo al la Esperanta literaturo meritas esti rememorita. Krome la leganto de niaj literaturaj gazetoj povas daŭre konstati debuton de novaj kaj novaj aŭtoroj kaj originalaj kaj tradukaj. En tiu ĉi neampleksa SKIZO ni rememoru almenaŭ nomojn, de kelkaj el ili.

**NIKOLAO KURZENS** (1910-), latvo, poeto traduka kaj originala. Li estas kantisto de vivsopiro, de malkontento spilita kontraŭ malvastaj horizontoj. Li uzas mallongformajn poemojn.

**HENRIK ADAMSON** (1891-), estono. Lia romano **AŬLI** estas juvelo de la E. literaturo. Liaj originalaj poemoj aperadis en Literatura Mondo.

**ERNESTO DREZEN** (1892-), latvo, inĝeniero. **HISTORIO DE MONDLINGVO** estas grava verko (trad. Hohlov). **ZAMENHOF** estas biografia studo. Aktivulo en soveta movado.

**EŬGENO MIĤALSKI**, ruso, profunda poeto alte aprezita de kompetentuloj. Lia **PROLOGO**, **LA UNUA ONDO**, **KANTOJ DE AMO KAJ SOPIRO** kaj **FAJRO KURACAS** prezentas ardpasian kaj impetan poezion.

**EŬGENO LANTI**, normando, instruisto. **LETEROJ DE LANTI**, **VORTOJ DE KAMARADO LANTI** estas kolektoj

de liaj plej gravaj originalaj verkoj. Longjare li redaktis SENNACIULON.

**LAJOS TOTSCHÉ-TARKONY** (1902), hungaro, ŝtata oficisto. Delikata poeto, lirikisto. DE PAĜO AL PAĜO estas la unua serioza kritiklibro pri la E. literaturo. Kunlaboris al Literatura Mondo.

**TEO JUNG** (1892-), germano, ĵurnalisto. Bone konata kiel redaktoro de HEROLDO DE ESPERANTO, duonmonata gazeto. Originala poeto de LA ALTA KANTO DE AMO kaj tradukisto de LA MISTERO DE L' SANGO de O. Forst.

**GIJSBERGUS DEGENKAMP**, nederlandano, pentristo. Aŭtoro de eminenta SESDEK JAROJ DE ESPERANTO. Aktiva tradukisto.

**PAUL BENNEMANN** (1895-), germano, instruisto. Tradukis multajn popolkantojn kaj operariojn. Aŭtoro de la populara MIRU! PENSU! RIDU!

**NORBERT BARTHELMAS** (1901-), germano, ĵurnalisto. Lia ĉefverko estas traduko de FAŬSTO de J. W. Goethe.

**TIBERIO MORARIU** (1901-), rumano, redaktoro. Tradukis: NIĈJO MENSOGULO de Bratuscu-Voinesti, NOBELA PEKO de Sadoveanu, SONORILO KAJ KANONO de Isac.

**JAME GRAU CASAS** (1909-), kataluno. Ĉefredaktoro de Kataluna Antologio. Originale: AMAJ POEMOJ, NOVAJ AMAJ POEMOJ.

**IVAN KRESTANOV** (1894-), bulgaro, lektoro pri lingvoj. Kunlaborinto al Enciklopedio de E. Eldonis Bulgaran Antologion.

**BRIAN PRICE HEZWOOD**, anglo, poeto, kiu debutis sur paĝoj de LM. Liaj poemoj aperis en poemaro DEKDU, kiun redaktis K. Kalocsay. En tiu ĉi libro troviĝas poemoj de jenaj aliaj poetoj: N. HOVORKA, G. MAURA, N. NEWELL, AMALIA NUNEZ-DUBUS, A. SCHUUHUBER, E. C. STILLMAN k.a.

**K. R. C. STURMER**, anglo, akravida literatura kritikisto. Konata estas lia NOTLIBRO DE PRAKTIKA ESPERANTISTO.

**IVO ROTKVIĈ**, kroato, juristo. Konata gvidanto de E. kursoj. Elstara oratoro. Akademiano. Okupiĝas pri la lingvistikaj problemoj. Altajn tradukistajn kvalitojn li montris en granda romano CEZARO de M. Jelušič.

**ERLING ANKER HAUGEN**, norvego, famiĝinta precipe pro sia traduko de PEER GYNT de Ibsen.

**M. C. BUTLER**, anglo, muzikisto. Kompilis kelkajn kantaretojn, verkis lernolibrojn kaj eldonis muzikan terminaron.

**PAUL NEERGARD** (1907-), dano, plantologo kaj zoologo. Eldonis 5-lingvan ĝardenkulturan terminaron kaj eldonis ilustritan ATAKON KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ.



**RETO ROSSETTI** (1909-), svisdevena skoto, profesoro pri desegnado. Unu el la t.n. Skota Skolo, kiu daŭrigas tradiciojn de la Budapesta Skolo. El la angla li tradukas precipe Burns.

Liaj poemoj aperis en KVAROPO, kiu estas kolektiva verko de 4 skotaj poetoj. En Stafeto aperis krome lia EL LA MANIKO, kiu estas novelaro.

**CEZARO ROSSETTI**, skoto, frato de Reto R. Lia KREDU MIN SINJORINO, bonhumora romano el la vivo de bazaruloj, glorigis lin tra la tuta Esperantujo.

**JOHN DINWOODIE**, skoto, pastro. Kunlaboris al KVAROPO, kie ni renkontas lin kiel poeton de interna ekvilibro kaj gracia delikateco.

**JOHN FRANCIS**, la kvara skoto el la KVAROPO.

**MAGDA CARLSON**, lerta tradukinto de SVEDA POEMARO, en kiu ŝi prezentas al ni 29 majstrojn de la sveda Parnaso.

**POUL THORSEN**, dano, instruisto. Liaj ROZOJ KAJ URTIKOJ estas poemaro kaj tradukita kaj originala.

**JAMES SAYERS, J. H. ROSBACH, GERALDO MATTOS, MASON STUTTARD, PETRO STOJAN, GOMEZ ISMAEL BRAGA, SYLLA CHAVES, LUCIEN LAURAT, REGULO PEREZ** kaj multajn aliajn nomojn povas literaturama leganto trovi sur paĝoj de nuntempaj E. gazetoj.

Sub diligentaj manoj de niaj multnombraj literaturistoj elkreskis Esperanto el la modestas komencoj al la hodiaŭa perfekteco.

# KONTRIBUOJ DE ĈEĤAJ AŬTOROJ AL LA ESPERANTA LITERATURO

Esperanto komencis penetri en niajn landojn jam tre frue. En la jaro 1890 eldonis **FRANTIŠEK VLADIMÍR LORENZ** (1872-) la unuan lernolibron por ĉeĥoj: **ÚPLNÁ UČEBNICE MEZINÁRODNÍ ŘEČI DRA ESPERANTA**. Sed eĥo de tiu ĉi lernolibro estis malgranda kaj la movado ne naskiĝis.

Nur en 1900, kiam **THEODOR ĈEJKA** el Bystřice pod Hostýnem eldonis sian lernolibron de Esperanto - la movado ekestis. En 1901 estis fondita en Brno la unua esperantista grupo kaj ekde tiu tempo la movado nehaltigeble iris antaŭen.

Por slovakoj tradukis dro Albert **ŠKARVAN** (Martin 1907) **FUNDAMENTO** DE ESPERANTO. Ĝi estis la unua slovakaj lernolibro de Esperanto, kun simila sorto kiel tiu de Lorenz.

Sume estis eldonitaj ĉ. 25 diversaj lernolibroj. El la aŭtoroj mi menciuj: Lorenz, Ĉejka, Bouška, Kilián, Eiselt, Dolinský, Bednář, Šupichová, Krajíc, Šilha, Šamla, Seppik-Krajíc k.a. El la aŭtoroj de 11 ĝis nun aperintaj vortaroj mi nomu: Kühnl-Procházka, Filip, Hromada, Dolinský, Čánský-Riedl, Berger k.a.

Ĉeĥaj kaj slovakaj aŭtoroj eldonis ĝis 1952 sume 30 tradukojn el la ĉeĥa kaj slovakaj beletraj literaturoj. Aperis kompreneble ankaŭ verkoj originalaj kaj libroj fakaj. En la sekvanta ĉapitro mi mencias kelkajn elstarajn ĉeĥajn aŭtorojn, kiuj pere de siaj tradukoj konatigis la ĉeĥan literaturon al la tuta mondo kaj pere de siaj originalaĵoj akiris agnoskon kaj rekonon por la ĉeĥa Parnaso.

## STANISLAV SCHULHOF

Dro S. Schulhof (ŝulhof) naskiĝis en 1864 en Lipka kaj mortis la 18an de aŭgusto 1919 en Pardubice. Li estis dentkuracisto en Pardubice. Krom siaj ĉeĥaj literaturaĵoj li famiĝis kiel originala Esperanta poeto, kiun dro Ivo Lapenna ne hezitas nomi fondinto de la originala Esperanta poezio. Pri la vivo de tiu ĉi ĉeĥa E. pioniro ni scias malmulton, malgraŭ esplorkonceptoj, kiun entreprenis en Pardubice kelkaj samideanoj. La Enciklopedio koncize informas nin, ke dro Schulhof estis tre vigla E. laboranto en Pardubice, kiu publikigis multajn propagandajn artikolojn. La originalan E.poezion li riĉigis per tri modestaj poemaroj:

PER ESPERANTO AL DESPERO (1911),

KION LA VIVO ALPORTIS (1911),

AŬTUNAJ FLOROJ (1912).

Ĉiuj tri volumoj entenas sume tridek poemojn. "Plenmano da versoj, granda promeso portita en la fruan tombon ...Kara malfeliĉa poeto, kara malsana doktoro, mi karesas vian memoron. Mi freŝe memoras pri la granda emocio, kiam mi unue legis ĉi tiujn poemojn, en kiuj post multaj bombastoj kaj perfortaj versoj, post multaj sed malmulton dirantaj vortoj, eluzitaj frazoj kaj bildoj, prezentis sin homo, kiu simple kaj sincere rakontas al ni siajn sentojn kaj kies sentoj estas indaj por rakonti ilin. - Tri volumetoj, en ili tridek poemoj. Konstanta evoluo kaj pliperfektigo - rompita de la morto." Per tiaj vortoj aprezis Kalocsay en 1922 verkon de dro Schulhof.

En PER ESPERO AL DESPERO ("despero" estas neologismo anstataŭ "malespero"; ĝi formortis) oni vidas ankoraŭ mankojn: la aŭtoro luktas kelkfoje kun la ritmo, eĉ kun la lingvo. Sed en AŬTUNAJ FLOROJ Schulhof estas jam

majstro de sia instrumento. Multpromesa talento li estis por nia literaturo, kiun senkompate rabis la morto.

Lia stilo estis natura, agrabla. Li ne deklamas, sed lia arto esta sincera; li parolas nur kiam li havas ion por diri. Multon ni ŝuldas al tiu ĉi granda - preskaŭ forgesita - poeto.

Post lia morto estis eldonita la kvara verketo sub tiutolo BOHEMAJ GRENATOJ, kiu estas malgranda poezi-antologio el ĉeĥaj poetoj (Vrchlický, Bezruč, Čech, Neruda k.a.). D-ro S. Kamarýt aprezas Schulhof-lingvaĵon en BOHEMAJ GRENATOJ ankoraŭ pli alte ol tiun en la originalaĵoj. Estas interese, ke B.G. estis dediĉitaj al la unua virina E.klubo en Praha.

## SOVAĜA KANTO

(El Aŭtunaj Floroj)

Foje en autuno, kiam bida aro  
sin pretigis flugi ien trans la maro,  
kiam en la parko velkis lasta flor',  
tiam ankaŭ mia kanto bela, juna  
eksopiris je la lando varma, suna  
kaj kun birda svarmo flugis de mi for.

La printempo venis en sekvinta jaro  
kaj de sud' kun birda petolema aro  
venis ankaŭ mia forfluginta kant';  
mi ĝin kompreneble logis, kapti penis,  
sed la sovaĝulo min jam ne komprenis  
kaj sin al mi kaŝis ie en lekant'.

Tial, se vi kanton mian koni volas,  
serĉu en natur' ĝin, kie vivo bolas,

sed ne en la libroj, ie sur paper';  
inter papilioj, muŝoj, floroj ĉarmaj,  
sur herbejo verda, en radioj varmaj  
mia kant' petolas ie sur la ter'.

Mi ne scias, kie vi ĝin serĉi devas,  
kie ĝi sin kaŝas, kie nune revas,  
aŭ ĉu je vi ridas ie en sekret';  
eble ĝi fariĝis bonodora floro  
kaj ĵus hejmen portas ĝin sur juna koro  
ia sopiranta, bela knabine'.

## STANISLAV KAMARÝT

La tridekan de julio 1956 estas funebra tago de la ĉeĥoslovaka kaj tumonda esperantistaro. Tiam forpasis unu el ĝiaj plej eminentaj personoj, dro Stanislav Kamarýt.

S. Kamarýt lernis Esperanton en 1900 kaj depost tiam li ĉiam estis frunte de la movado en niaj landoj. Senlace li laboris en BOHEMA ASOCIO ESPERANTISTA, ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA kaj ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR. Sukcese li redaktis gazetojn LA PROGRESO, BOHEMA ESPERANTISTO kaj ESPERANTISTA, samtempe aperigante en ili siajn saĝajn kontribuaĵojn.

Ankaŭ al la tutmonda E.movado S. Kamarýt grandskale kunlaboris. Li estis membro de la LINGVA KOMITATO kaj AKADEMIO.

Sed per la organiza laboro ne elĉerpiĝis liaj fortoj. Dro Kamarýt meritplene laboris eĉ sur la literatura kampo: MEZINÁRODNÍ JAZYK (1927), estas instrua ĉeĥlingva traktato,

FILOZOFIA VORTARO (1934), estas scienca verko el lia fako,

ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO (1935), estas fundamenta libro de nia literaturo; ĉefredaktoroj estis S. Kamarýt kaj O. Ginz.

HODIAŬ ANKORAŬ SUBIRAS LA SUNO SUPER ATLANTIDO (1956), de Vítězslav Nezval (manuskripto).

Dro S. Kamarýt krome estis ĉefkunlaborinto de la Enciklopedio de Esperanto.

En siaj lastaj tagoj li intense laboris super Esperanto-vortaroj de Filip, por prilabori ilin al la nova eldono. Monumenta verko estas lia HISTORIO DE LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-MOVADO, kiun li finis nelonge antaŭ sia morto. Li estis la unusola esperantisto, de kiu oni povis atendi seriozan kaj detalan studon pri la evoluo de nia movado en ĈSR. Mi ne povas ne mencii, ke la instigo verki la ĉeĥoslovakon E.-Historion venis el la Somera Esperanto-Tendaro de la ĉeĥoslovaka E.junularo, kie oni klare sentis ties mankon. Letero sendita al s-ano S. Kamarýt kaŭzis, ke li eklaboris fervore sur tiu ĉi neplugita kampo.

En sia letero, kiun dro Kamarýt sendis al mi, li skribas:

"Mi prezentas al mi, ke la historio finos en 1952, kiam ĉesis aperadi Esperantista kaj la Asocio estis likvidita. Tiam komencis agadi organizite kaj konscie nia Junularo. Estus bele fini per aparta ĉapitro pri tiu epoko. Tial mi tre dankus vin, se vi sendus al mi materialon, kiun vi ricevos de viaj delegitoj kun eventualaj rimarkoj viaj pri sintenoj kaj meritoj de unuopuloj." - Subita morto malhelpis lian planon!

Ni konservos en niaj koroj por la kara dro Kamarýt ĉiam plej helan rememoron.

## THEODOR ČEJKA

T. Čejka naskiĝis la 10-an de januaro 1878 en Bystřice pod Hostýnem. Samloke eklaboris kiel instruisto. Nestoro de la E.movado en la ĉeĥaj landoj.

T.Čejka verkis la unuajn ĉeĥajn lernolibrojn kaj vortarojn de E. kunlabore kun la fama komeniologo J. Krumpholc. Krome li estis redaktoro de iama REVUO INTERNACIA, INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO kaj ČESKÝ ESPERANTISTA.

Literature li aktivis tradukante el verkaro de T.G.Masaryk kaj J. S. Machar.

## OTA GINZ

O. Ginz naskiĝis la 19-an de julio 1896 en Zdánice. Oficisto. Gvida persono de nia enlanda movado. Kun dro S. Kamarýt redaktis (1935) ĈEĤOSLOVAKAN ANTOLOGION, kiu apartenas al la plej sukcesaj el la ĝis nun eldonitaj. Ĝi estas 500-paĝa reprezenta libro, enhavanta tradukojn el 69 ĉeĥaj kaj slovakaj aŭtoroj, fare de 107 tradukistoj.

O. Ginz estas aŭtoro de RADIO-AMATORA VORTARO KVINLINGVA (E. - ĉeĥa - germana - franca - angla). El la E. originalo tradukis ĉeĥen: PER AERŜIPO AL NORDA POLUSO de Add Arnesen kaj FINE MI KOMPRENAS RADION de Aisberg, kiun li mem instigis al ĝia verko.

O. Ginz estas fakulo pri la lingvaj problemoj. En aprilo 1956li kiel pensiulo kun sia edzino (aktiva esperantistino) transloĝiĝis al Israelo.

## RUDOLF HROMADA

R. Hromada naskiĝis la 9-an de novembro 1890. Esperantiĝis en 1907. Lingva Komitatano, Akademiano. Lia signifo por nia enlanda movado estas grande. Dank' al liaj laboro kaj organiza talento estis nia Esperanto-Asocio, kiun li gvidis pli ol 40 jarojn (en 1920 li fariĝis ĝia ĝenerala sekretario), unu el la plej bonaj Asocioj de la tuta mondo.

Li redaktis La Progreson kaj partoprenis tradukistan laboron por la Ĉeĥoslovaka Antologio. Li apartenas al nia plej brila traduka trio Lukáš - Hromada - Pumpr. El lia plumo ni ricevis eminentajn tradukojn de niaj klasikuloj (Vrchlický, Čech, Sládek k.a.), sed ankaŭ ĉarmajn tradukojn de la poetoj modernaj (Toman, Hora, Wolker, Šrámek, Seifert, Neumann, Rutte k.s.).

"Ĉiuj liaj tradukoj estas karakterizaj per siaj delikateco kaj nekutima poeta sento, kun kiuj li esperantigas la originalaĵojn, neniel tuŝante ĝiajn internan ideon kaj la eksteran formon. Li ne tradukas sklave, sed esperantigas kun fajna delikateco kiel vera majstro. Same kiel juvelisto per sperta mano cizelas la plej valorajn diamantojn, ankaŭ Hromada scias ĉiam perfekte trovi tion, kio estas plej valora kaj prezenti al la leganto verajn diamantojn de perfekta traduko. Krom tio, liaj tradukoj estas paroleblaj kaj estas do ĝuo kaj deklami kaj aŭskulti ilin." (E. Seemannová-Suchardová)

R. Hromada en siaj tradukoj estas profunde lirika kaj uzas neologismojn nur tre modeste, por ne malutili al la facila kompreneblo de poemo; domaĝe nur, ke R. Hromada neniam provis verki originale, almenaŭ ne por la publiko.



## EKLOGO V.

(Jaroslav Vrchlický: Eklogy a písňě.)

La padus' odoras en aer' kristala,  
sub piedo via tremas muska bed',  
de la lago sonas tono bakĥanala,  
de kratagoj falas brila florpluvet':

miras vi kun ĝoja larm'

kial tia ĉarm'?

Svarm'

diras birda supre, flora ĉe la ter':  
Ne alia de l' printempo estas manier'!

Via spir' padusa, brila la okulo,  
dum sub mia mano tremas via Brust'.

Fontas miaj kantoj el la korangulo  
kiel riverfonto el rokara krust':

miras vi kun ĝoja larm'

kial tia ĉarm'?

Svarm'

diras birda supre, flora ĉe la ter':  
Ne alia de la amo estas manier'!

## EN ANGULO ĈE L' PATRINO

(Jaroslav Seifert)

Kudril', fingringo kaj faden' diversa  
kaj okulvitroj plenaj de fajrer'.

Per kio mi mezuris tiam tempon,  
perditan tuj post la aper'?

Vi kiel iam flustras kvazaŭ songe:

"Aminda mia knab',  
vin certe ree tiuj stratbubaĉoj  
ŝtonvundis sur la kap'."

"Ne, panjo, mia kap' hodiaŭ sanas,  
ne frotvundiĝis eĉ genu'."

"Aĥ, mia Dio, mi forgesis ree,  
ke ĉio ne la sama estas plu."

Mi venas kiel iam kaj mi ploras  
en viajn manojn kun kompat-abund',  
kaj larmo sangas kiel en bandaĝon,  
dum revekiĝas la malnova vund'.

Por ĉiu butonet' kudrita viamane,  
por ĉiu via tiro de kudril',  
por ĉiu kis', per kiu vi karesis  
- ne tiel danki devis via fil'!

Adiaŭ temp' de truaj pantalonoj,  
perditajn tagojn serĉi - iluzi'!  
- la tempon, kiu ne plu jam revenos  
- aĥ, mi forgesas, mia Di',

## **JIŘÍ KOŘÍNEK**

J. Kořínek naskiĝis la 1-an de oktobro 1906 en Liberec. Natura poezi-amo kauzis, ke J. Kořínek post la dua mondmilito eklaboris aktive sur la literatura kampo. Dum la pasintaj 10 jaroj li skribis ĉ. 250 originalajn poemojn, ĉ. 130 poemtradukojn kaj ĉ. 140 tradukojn de opertekstoj aŭ klasikaj kantoj. Por la eldono estas preparitaj kompletaj:

PANJO, de Jaroslav Seifert, kun 44 juvelaj poemoj.

KRONPLEKTO DA SONETOJ, de Jaroslav Seifert, kun 15 majstraj sonetoj. (La Kronplekto aperis jam en Norda Prismo, kvankam en la lingvo ĉeĥa ĝi ankoraŭ ne estis publikigita.)

JAKOBENO, operteksto, estas preta ĝis unu triono.

Poemoj de J. Kořínek ornamas en la nuna tempo paĝojn de ĉiuj gravaj E. gazetoj. Kelkaj el ili akiris plej altajn literaturajn agnoskojn en Belartaj Konkursoj de UEA.

"En poezia skolo mi adaptiĝis al Kalocsaya grupo, kiu prenis en sian emblemon lingvan riĉecon. Esperanto posedu riĉajn sinonimojn kaj nuancvortojn, kiel la vastevoluintaj naciaj lingvoj, kie senteblas manko, oni ne timu neologismon." (Jiří Kořínek, intervjuate por Tagiĝo-31).

## KOMENCO KAJ FINO

En ĉiu ĵuskomenco naskiĝas jam la fin',  
el roza ekburgono  
jam spiras velkaromo  
kaj ĉiu altsvingiĝo al fal' preparas sin.

En ĉiu matenruĝo krepuskas jam vesper'  
kaj en plej gaja rido  
embuskas plorinsido,  
en ĉiu iluzio jam rodas sopra ver'.

En ĉiu ekdeziro jam grizas elreviĝ',  
nur temp' neniam haltas,  
sed kio naske startas  
gravedas jam je morto, je laca malleviĝ'.

Sed vi al pura ĝojo gutigu ne al gal',  
vi sole ne forgesu,  
delicon saĝe pesu,  
sciante, ke en brilo jam dormas svena pal'.

Se vi pri amo pensis kaj ĉion rabis van',  
sciu, dum via koro  
ekdronas en doloro:  
kun ĉiu trofeliĉo trist' iras man' en man'.

Sagace vivon prenu kun sci' ke venos solv',  
ja viv' kaj tuta mondo  
eterna estas rondo,  
post start' alstela venas malstart' en tera polv'.

## SUR SOJLO DE AŬTUNO

Lasta triono de septembro  
pruntprenis tagon el somer',  
ĝi min ellogis por kontemplo  
al herba bordo ĉe river'.

Jam post tri tagoj venos regi  
laŭ sia rajto la aŭtun',  
kaj baldaŭ jam komencos seki  
la foliar en pala sun'.

La pompan riĉon de koloroj  
postvenos pluve frida tag',  
kaj la iama bunta gloro,  
kuŝos en koto de la flak'.

Al tera grundo por ripozi  
reveni devas ĉiu pomp',  
foje aŭtuno venos fosi  
al ni kuŝejon en la tomb'.

Katenas min al tiu grundo  
subite firma konfidem':  
saniĝos fine mia vundo  
en ĝia mola ĉirkaŭpren'.

### SEN HOMA MEZURO

Ho kiel grandas universo  
kaj kiel eta estas mi  
kaj sensignifa mia verso  
kaj mia trist' kaj nostalgi'.

Ke tamen ega ŝajnas homo  
al viruseto sur polver',  
al centmilon de atomo,  
kia miraklo kaj mister'?

Se mikrokosmo kosmon formas,  
ne bagatelas homa sort',  
en sekvoj eta kaŭz' enormas,  
gravegas iam simpla vort'.

Samgravas eskplodeg' de astro  
kaj ekrideto de knabin'  
kaj nia ĝoj' kaj zorgbalasto  
sen sentempeco kaj sen fin'.

Ĉar samvaloras la sekundo,

kaj mil lumjaroj en etern',  
kaj fine nur en korprofundo  
kuŝas de granda solvo kern'.

## MATURIGADO (Antonín Trýb)

Vin ne teruru fakt-konstat' reala,  
ke am', doloro, por la bel' sentem'  
en homajn korojn de ĉiel' ne falas -  
kaj en mireg' pasiva sen kompren'  
ne tristu vane super sent' percepto.  
En vi nur ĝermas, en eterna ŝanĝ',  
de okazadoj, ordoj resonaj'  
je vivofakt', komplika prov-objekto.

Sorĉa vualo de ĉerizaj floroj  
kovras falaĵe koton de ŝose' -  
kaj plura bel' de niaj sobraj horoj,  
je malbezona jam ŝanĝita kre',  
ne vanas tamen - sen koncip' nenio  
maturas - nur post la perviva kresk'  
el lud' infana, rev', fabelvizio,  
klaras de l' vivo riĉa malsimpleg'.

## FRANTIŠEK VLADIMÍR LORENZ

La 24-an de decembro 1957 atingos la 85-an jaron de sia aĝo F.V.LORENZ en Dom Feliciano, Brazilo. Esperantisto de la unua horo, li estas verŝajne ankaŭ plej malnova vivanta esperantisto de la mondo. Kiel 18-jara junulo li verkis la unuan lernolibron de E. por ĉeĥoj: ÚPLNÁ UČEBNICE MEZINÁRODNÍ ŘEČI DRA ESPERANTO kaj eldonis ĝin en 1890 en Pardubice. La lernolibron li verkis kiel laboristo. Estis jam menciite, ke ĝi la movadon ne sukcesis iniciati.

Baldaŭ poste li estis suspektata de la tiama aŭstria polico pro patriota agado en la junularmovado OMLADINA. Li fuĝis kaj elmigris Brazilon, kie li de post 1896 vivis en Sao Feliciano. F. V. Lorenz ĉiam aktive partoprenis la movadon. Siatempe li favoris idistajn reformojn, sed post la decida voĉdonado li deklaris sin fidela al la origina Esperanto. Li rezignis ankaŭ pri sia propra projekto de internacia lingvo MUNDIAL.

La plej signifa estas la literatura agado, kies rezulto estas 16 gravaj libroj kaj 20 volumoj de tradukoj en la lingvon portugalan.

DIVERSKOLORA BUKEDO estas poemantologio el 40 lingvoj. F. V. Lorenz estas rekonata gramatikisto.

Honore al nia fama samlandano la brazilaj gesamideanoj fondis en Santos (1940) esperantistan grupon FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ.

### EL "RUBAJJAT"

(El la persa lingvo de Omar Ĥajjam, 12-a jarcento.)

Mi vidis multajn homojn de talentoj  
per multaj vortoj, pruvoj, argumentoj  
konstrui famajn turojn, sed - ho ve! -  
la turoj ĉiam falis per la ventoj.

La Universon multesploris mi,  
sekretproblemojn solvis kun pasi',  
sed restas unu: kio mi mem estas,  
kaj kial kreis min l' eterna Di'?

Ni ronde movas nin, kvazaŭ fantomoj:  
la sun' la centro estas, kaj la homoj  
fantazi-ombroj de l' granda lanterno,  
kreita de l' Majstro de l' astronomoj.

Man' Lia skribas, kaj ĉio priskribita  
por ĉiam estas fato difinita,  
kaj nek per larmoj nek per petoj povas  
eĉ unu linio esti ŝanĝita.

## MILOŠ LUKÁŠ

Miloš Lukáš - la violeto,  
en ombro kaŝe diligentas,  
ke li vers-arte eminentas,  
por multaj estas ja sekreto.

En lia brila interpreto  
poemoj ĉeĥaj elokventas,  
Miloš Lukáš - la violeto,  
en ombro kaŝe diligentas.

Trasento, formo, rimo-meto  
pri vers-genio dokumentas.  
Ho - kial al ni ne prezentas  
poemojn proprajn ĉi poeto?

Miloš Lukáš - la violeto.

(K.Kalocsay: Rimportretoj)



Miloš Lukáš, filo de popollerneja instruisto, naskiĝis la 15-an de septembro 1897 en Jilemnice. Plenuminte abiturientan ekzamenon gimanzian en Jičín, li studis post trijara militservo la klasikan filologion en Prago. Poste (1924-1949) li instruis en la gimnazioj de Jilemnice, Trnava kaj Hradec Králové. Ĝis 1951 li laboris en la Esperanto-fako de la Ministerio por Informoj kaj Kulturo. Reveninte al Hradec Králové li aktivis ĝis 1954 kiel instruisto de lingvoj ĉe la Militkuracista Altlernejo kaj ĝis 1955 kiel distrikta bibliotek-inspektoro. Nun li vivas samloke kiel emerito; li tradukas diverslingvajn (precipe estonajn) literaturaĵojn en la lingvojn ĉeĥan kaj slovakon.

Esperantisto li fariĝis jam en la jaro 1907; dum nelonga tempo li sin okupis pri Ido, tamen en la jaro 1911 li definitive redediĉis sin al la movado esperantista. Plurajn poemojn kaj prozaĵojn li tradukis kaj publikigis en gazetoj (ESPERANTO, ESPERANTISTA VOĈO, LA ESPERANTISTO, LA PROGRESO, LIGILO, ESPERANTISTA, ESPERANTO-SERVO, LITERATURA MONDO, GERMANA ESPERANTISTO, INTERNACIA KULTURO, LA NICA LITERATURA REVUO kaj aliaj /kaj en Ĉeĥoslovaka Antologio.

Memstare aperis en 1921 nur la de li tradukita komedio de Jaroslav Vrchlický NOKTO EN KARLŮV TÝN. Li interalie ankaŭ tradukis ĉiujn originalajn poemojn de Zamenhof en sian lingvon gepatran; tiuj tradukoj aperis en ESPERANTISTA.

Sekvantaj tradukoj de Miloš Lukáš konvinkos vin, ke la supra rondelo ne troigis.

LA VIOLONO DE L' CIGANO.  
(Jaroslav Vrchlický)

Gaje sin hodiaŭ distras  
la popol' en la kastelo,  
kiam per Tokaja vino  
ĝin regalas la nobelo.

Ĉe la son' de sakfajfilo  
kaj ĉe ludo de cimbaloj  
dancas oni, kantas oni  
kaj babilas ĉe pokaloj.

Jen cigano! Ha bonvenon,  
venas vi en ĝusta horo!  
Ludu nur! La hundoj dormas,  
skurĝon perdis la sinjoro.

La unua kord' eksonas  
de l' cigana violono  
ĉiu tono kvazaŭ flamo,  
koron pikas ĉiu tono.

Ĝi kraketas kiel fajro,  
ĝemas kvazaŭ en turmento  
oni kredus, ke la kordo  
devos krevi post momento!

Nun ĝi muĝas kiel vento,  
kiun sekvas tondro brua;  
el profundo ĝi sin svingas  
supren al la kordo dua.

Furioze kaj senbride  
ĝi aŭdiĝas en la halo,  
kiel se tra stepo vasta  
vir' galopus sur ĉevalo.

Tuj mallaŭte ĝi nur flustras  
aĥ! rampado de vipuro! -  
tuj ĝi blekas, kvazaŭ lupoj  
luktus en sovaĝa kuro.

Ĉu vi aŭdis? Sibla ĝemo,  
akrigado de tranĉilo!  
Jen brueto, kvazaŭ flugus  
korvoj ĉirkaŭ pendigilo.

La flugilojn ili skuas,  
homan korpon disŝirante,  
sed subite - kia ŝanĝo! -  
dolĉe sonas ĝi kaj kante.

Jes, la tria kordo vibras  
delikate, kun gracio,  
almiksiĝas nur kelkfoje  
fulma tono de pasio.

Kiel najtingal' ĝi ploras,  
ŝaŭmas kiel ruĝa vino -  
kiel se ciganon junan  
ĉirkaŭbrakus ciganino.

Aŭdu nun: la melodio  
tremas arde kaj sopire,  
vana amo kaj ĵaluzo

montras sin en ĝi korŝire.

Jen tintado de pokaloj  
kaj frivolaj diboĉ-krioj -  
iu plendas malespere,  
ŝiras harojn de l' tempioj.

Kaj la kvara kord' respondas  
per sonoro de malĝojo -  
ŝajnas, ke post ĉerko oni  
marŝas sur tombeja vojo.

Ĝi ululas, kvazaŭ nokte  
uragan' tra kampoj kurus,  
zumas, kiel se kadavro  
en la tombo ekmurmurus.

Akra frapo! - Ĉiuj kordoj  
donas nun la lastan tonon.  
Al la koro la cigano  
premas sian vilonon.

Noktomezo. . . Dormas ĉiuj ...

Sole la nobelo miras:  
»Stranga kanto! Vi klarigu,  
kion ĉiu kordo diras!«

La cigan' rigardon fiksis  
al la servistar' ebria:  
kiel violona eĥo  
sonis mola voĉo lia:

»Via moŝt' apenaŭ kredos:  
kordo havas ankaŭ koron  
kaj fidele interpretas  
la plezuron aŭ doloron.

Bonan havis mi patrinon,  
estis tre de ŝi amata;  
profetadis ŝi al homoj,  
kiam estis ŝi malsata.

Foje ĝin nobelo kaptis  
kaj rostigis ŝin vivanta.  
Kia mir', ke kordo mia  
ŝin nun estas priploranta!

Fraton havis mi - vagulon,  
sed al li min amo ligis,  
kaj ne scias mi, pro kio  
oni fine lin pendigis.

Eble juste - tion ofte  
nun mi mem al mi konfesas -  
la malsaĝa kordo tamen  
lin funebri jam ne ĉesas.

Ĉastan mi edzinon havis,  
trafis ĝin mizera ŝanco;  
duonnuda la nobelon  
distri devis ŝi per danco.

Li per silko kaj per oro  
volis poste ŝin kompensi. . .  
Ho, sinjor', pli bone estas

nun pri tio ne plu pensi!«

Kun la kara violono  
marŝas la cigan' al pordo...  
»Haltu!« la nobelon vokas.  
»Restas ja la kvara kordo!«

La cigano ekridetis,  
haltis iom, paŝis plue.  
»Volu kredi, via moŝto,  
vi demandas superflue!«

Li foriris. . . La servistojn  
vane vekas la nobelo -  
antaŭ ol li vekis ilin,  
ha! jam brulas la kastelo. . .

NIA KANTO  
(Stanislav K. Neumann)

Nuboj malhelaj iras kaj iras,  
kaj la terglobo spasme deliras.

Tondroj, mallumo, fulmo-ekbruloj,  
tamen paliĝas nur timemuloj.

Ofte nin plagis ŝipofrakaso,  
nin, la anaron de l' proletklaso.

Nokto senluma mise nin gvidis,  
nin, la senhelpajn, oni perfidis.

Malgraŭ ĉi tio plifortigante,  
ni pri la pano luktas konstante.

Jes, pri la pano kaj ĉio cetera,  
ĝis la homaro fariĝos libera.  
Ĉiam pli fortaj, konsciaj ni estos,  
ruĝan dimanĉon komune ni festos.

Plue la gloro de l' proletklaso  
anojn kunigos de ĉiu ajn raso

- blanka aŭ nigra, hebrea, mongola -  
sub la standard' laborista-popola.

Nia armeo jam estas hardita,  
cedas mallum' al krepusko subita.

En oriento jen ŝtala kastelo  
levas triumfe sin al la ĉielo.

Kaj supre lumturo plej granda elstaras,  
ĝi celon al patroj kaj filoj deklaras.

Sonoras el ĝi sonorilo giganta,  
al firma fratec' kun Sovetoj vokanta.

Deliru la mondo en ŝtormo tertrema,  
hontinde paliĝas nur homo timema.

Nin savas de ĝemoj kaj de maltrankvil'  
li, Lenin, lumturo, li, la sonoril',

lumtur', sonorilo, lumtur', sonorilo - Lenin!

## MORAVIAJ ESPERANTO-PIONIROJ

MEP estis unuiĝo de tri viroj: Jaroslav MASTNÝ, fabrikisto, Antonín KUDELA, juĝa oficisto, Albín NEUŽIL, lernejestro.

Ili kune fondis privatan libroeldonejon en Olomouc kaj meritas pri eldono de valoraj literaturaĵoj:

RUR (1926), de Karel Čapek,  
NOVELOJ (1934), de K. M. Čapek-Chod,  
KIEL FARIĜI KREINTO FACILE KAJ RAPIDE (1935), de Petr Den,  
MALRIĈA KNABO, KIU GLORIĜIS (1930), de Jan Herben,  
FOKSO-NUKSO (1932), de Ignát Herman,  
LA KOBOLDO ONDRA (1921), de Jiří Mahen,  
MI EN LI (1933), de L. Vladyka,  
TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO (1931), de Jan Welzl,  
HOMOJ SUR FLOSGLACIO (1937), de V. Werner.

## FRANTIŠEK OMELKA

F. Omelka naskiĝis en 1904 en Staré Město - Uherské Hradiště. Post la gimnaziaj studoj li fariĝis instruisto: laboro kun viva materialo estas por li plej interesa. Dum libertempo F. Omelka verkas por siaj junaj gelegantoj librojn, prefere kun aventuraj motivoj. Esperantiĝis en 1932. Aperigis kelkajn rakontojn en la antaŭmilita Heroldo kaj verkis libreton AVENTUROJ DE ANTONIO. Plej ŝatataj estas liaj rakontoj LA ALASKA STAFETO kaj KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ, ambaŭ verkitaj originale en Esperanto.



## KAROLO PÍČ

Karolo Píč naskiĝis la 6-an de decembro 1920 en Litomyšl. Tie li trapasis la gimnazion. Poste li komencis studi filozofion en Praha. Kiam en 1939 oni fermis la universitatojn, li fariĝis ano de la dominikana ordeno kaj ekstudis teologion. Tamen post duonjara novicado tie li foriris kaj eklaboris kiel oficisto en sia naskiĝurbo, poste li laboris en Most, kie pro la transiro de la landlimo oni arestis lin kaj dum du monatoj li estis tenata en "Erziehungslager" de Gestapo. Post la okupado dum kvin jaroj li vivis en Polička. Nun li laboras kiel ĉefa librotenisto refoje en Litomyšl.

Kun Esperanto li konatiĝis jam en sia deka vivojaro. Sed tiam li venis nur ĝis "leono estas besto". En la dekkvara vivojaro li verkis romantikan romanon ĉehlingvan. La manuskripto de tiu nematura provo, feliĉe, ne konserviĝis. Serioze li ekstudis Esperanton nur en la sepa gimnazia klaso. Tiam li faris ankaŭ la unuajn literaturajn paŝojn esperantlingvajn.

Ĝis nun li verkis poemarojn: FABELOJ EL TRANSE, EKKRIOJ AL GEORGINO, LA DAVIDA HARPO, ISMOJ!, ISMOJ!, DOKSY kaj PROZAJ POEMOJ, prilingvajn librojn: DEMANDOJ KAJ PROBLEMOJ, kaj LINGVO VIVANTA, libron de mallongaj prozaĵoj: ĜARDENO DE ALAHO, libron de filozofiaj eseoj: LA GRANA SUPERSTIĈO, kaj detektivan romanon: MISTERO DE TRI UNUOJ. Ĉiuj ĉi verkoj estas manuskriptaj.

Pluraj el liaj poemoj kaj kelkaj liaj prilingvaj artikoloj aperis en Esperantista, Esperanto, Literatura Mondo, Verda Voĉo de Doksy, Heroldo de Esperanto kaj aliaj E-revuoj.

Li estas obstina originalisto. La tradukadon principe li evitas.

## MALNOVA MEZEPOKA MANUSKRIPTO

Estasaŭtuno Pavimbrikoj estas malsekaj  
Tramallumokanonikoj kaj homoj pekas  
alkatedralopieiras Turcimbalo sonas liras  
kaj alĉiobonan matenon bondeziras  
Nussupersoj loŝtonagargoj loakvonsputas  
kaj ĝinŝutassursinjorojn kaj dolorojn  
Pluvassenĉeso Dumeenekantsolenekomenciĝas  
santkmeso.

(Ismoj! Ismoj!)

## LA POETO

Mi estas stranga pilgrimant';  
Mistonas mia akra kant',  
kaj zumas ĝi samkiel knar',  
Kiam mi kantas ĉe stupar'  
Fremdula.

Kaj kantas mi pri l' viv' kaj mort',  
Pri l' ŝanĝiĝema homa sort',  
Pri l' ŝip', maŝino, aŭto, tank',  
Aŭ pri l' printempa neĝoblank'  
Betula.

Kaj kantas mi pri l' am' kaj sent',  
Kaj pri l' somera varma vent',  
Sed plu jen sangas mia kor' ...  
Do mi foriras sub angor'  
Solula.

## TOMÁŠ PUMPR

Dro Tomáš Pumpr naskiĝis en 1906; juristo kaj ŝtata oficisto en Praha. Kun Esperanto li konatiĝis en 1926. Sur la literatura kampo li debutis per prozaj kaj versaj tradukoj por la Ĉeĥoslovaka Antologio. Libroforme aperis ĝis nun liaj tradukoj BUKEDO EL ĈEĤAJ NACIAJ MITOJ de Karel Jaromír Erben (1938) kaj LA BAPTO DE CARO VLADIMIR de Karel Havlíček Borovský (La Stafeto, 1953). El la fama ĉeĥa poemo MAJO de Karel Hynek Mácha estis publikigitaj en gazetoj nur fragmentoj.

En la jaroj 1946-48 li estis kunlaboranto de la Esperantaj artprogramoj de radiostacio en Praha (VERDA STACIO). Por la radioelsendado dro Pumpr tradukis kaj aranĝis en muzika kunlaboro de dro Fousek la tekstojn de la operoj EN LA PUTO de V. Blodek, VENDITA FIANĈINO de B. Smetana kaj NAJADO de A. Dvořák. Krome li tradukis pliajn operariojn, artajn kaj popolajn kantojn kaj multajn versojn el la moderna ĉeĥa poezio.

"Pumpr sukcesis redoni en siaj tradukoj ne nur fidelan enhavon de la originalo kaj ĝian stilon, sed ankaŭ diferenca karakteron de la lingvaĵo. La poemoj de Erben en lia interpreto sonas freŝe, harmonie estas esprimitaj jen komplikaj pensbildoj de deprima atmosfero, jen serenaj kolorriĉaj naturpriskriboj; kaj LA BAPTO parolas per lingvo ekstreme simpla, preskaŭ konversacia, kun spicaj parolturnoj de la satiraj kaj bonhumoraj popolkantoj." (Dro S. Kamarýt)

En la organiza vivo gvidis drp Pumpr dum multaj jaroj la literaturan komisionon de la Asocio kaj plenumis la funkcion de la sekretario de Ekzamena Komisiono. Li estas membro de Lingva Sekcio de TKKE (Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista) kaj ano de la redakta sesopo de La Nica Literatura Revuo.

Dro Pumpr helpas al popularigo de la ĉeĥa literaturo en ekstrema oriento (Japanujo, Ĉinujo) liverante al tieaj literaturistoj Esperantlingvajn tradukojn de ĉeĥaj verkoj. En la ĉeĥan lingvon li tradukis kaj por radioelsendo preparis faman teatraĵon de la nederlanda verkisto Maurits Dekker LA MONDO NE HAVAS ATENDEJON. (La Esperanta traduko fare de Faulhaber servis al dro Pumpr kiel modelo.)

T. Pumpr estas bona amiko de la junularo. En 1955 organizis la junularo en Praha vendredajn kunvenetojn, kiujn prezidis Pumpr kaj eksplikis teorion de la Esperanta poezio. Por la ĉeestintoj estis neforgesebla ĝuo aŭskulti lian parolon, kiu atestis jen pri klera fakulo, jen pri sprite-ŝerca samideano.

En la sekvanta IV. kanto de MAJO komparu la majstran tradukon de dro Pumpr kun la originalo de K. H. Mácha.

## MAJO

(Karel Hynek Mácha)

### IV.

Pasis la bela maj', velkis printempa flor',  
ekardis la somer', somera pasis tempo,  
eĉ vintro post aŭtun', revenis la printempo,  
kaj longa jar-seri' kun tempo flugis for.

Estis post jaroj sep lasta decembra tago;  
profunda nokt-mallum'. Noktmezon superinte  
venadis nova jar'. Dormis la val' ĉe l' lago,  
nur sur la borda voj' ferhufoj sonis tinte.  
Estis mia ĉeval'. - Al urb' min nokto gvidis.  
Haltis mi ĉe l' montet', kie en pac' dum jaroj  
tronis la Suveren', Teruro de l' Arbaroj.

Mi je unua foj' Vilém-kranion vidis.  
Sur meznokta pejzaĝ' ĝis lim' de l' horizonto  
blanka neĝa tavolo' sterniĝis kaj larĝegis:  
sur la arbar', kampar', sur lago, valo, montoj,  
kaj kiel ĉerkvual' sur fost' la kapon tegis.  
Lace tra nuba mar' la pala Luno vadis,  
jen ploris nokta strig', jen vent' malgaje ĝemis,  
kaj tiam sur la rad' la skeletul' klakadis -  
al mi kaj al ĉeval' eĉ timo bruston premis.  
Mi al urbkontur' mian ĉevalon spronis  
kaj tuj en sekva tag' demandis pri l' skeleto.  
La olda gastejist', montrante je l' monteto,  
- kiel mi skribis ĵus - tristan informon donis.

Ree min mia vivsort' en mondon elprovokis  
kaj multa ŝtorma tromb' min tra ĉagrenoj trenis,  
sed tiu trista rakont' min ĉiam retro vokis,  
ĝis kun juna printemp' mi al la mont' revenis.  
Sidis mi sur la montet', dum Suna disk' descendis -  
Super mi rado, fost', skeleto kaj kranio,  
al printempa pejzaĝ' mi tristan vidon sendis,  
kie griza nebul' ŝvebis sur mont-linio.

Reestis maja postvesper',  
vespera maj', la amsezon',  
al amo logis turta kver',  
aromis pinarbar-ozon'.  
Silenta musk' pri am' susuris,  
amĝemojn flustris arb' floranta,  
al roz' agrable odoranta  
la amon najtingalo ĵuris.  
Sub arbetoj akvo zumis -  
ĉagrenon kaŝis lago glata -

ĝin lude vasta bord' brakumis  
kiel fratinon brako frata.

Sur la kranio ĵus kuŝiĝis  
postbriloj kiel roza kron',  
ĝis la ostblanka vang' ruĝiĝis  
kun franĝa haŭto sub menton'.  
Petolis vent' tra l' kapkaverno,  
kvazaŭ resonus el interno  
obtuza rid' de morta hom'.  
Flirtetis sur la kapo haroj,  
kiujn forgesis longaj jaroj.  
La okulkavoj ŝajnis brili  
de rosaj gutoj - kvazaŭ larmoj  
pro la vesperaj majo-ĉarmoj  
elfluus en ĉagren' el ili.

Do tiel sidis mi, ĝis Luna lum' fariĝis  
kaj mi kaj la krani' ankoraŭ pli paliĝis.  
Nun ĉio kuŝis jam sub blanka Luna brilo:  
L' arbaroj, montoj, val' - kvazaŭ sub ĉerkkovrilo.  
Vokas jen fore kukol', jen nokta strig' ekploras,  
proksime el vilaĝ' hurlas kaj bojas hundoj  
kaj sur la sekherbej' spicherboj bonodoras.  
Larmoj de Virgulin' sur la deklivo floras.  
Mistere brilas lum' en foraj lagprofundoj.  
Lampiroj ĉe la rad' samkiel stela svarmo  
brilas en ronda danc' kaj preterflugas kroze;  
iu sur la krani' eksidas porripoze,  
sed baldaŭ flugas for kvazaŭ falanta larmo.

En mia trista vid' ankaŭ du larmoj brulis  
kiel fajreroj en lag' ludetis sur vizaĝ'.

Ĉar mia infanaĝ' - kiun belsongoj lulis -  
longe pereis jam sub kruda temp-sovaĝ'.  
For estas la junsonĝ' kiel pasinta obskur',  
aŭ blanka urbobild' en sin' de laglazur',  
kiel la lasta pens' de homoj post la mort',  
kiel ilia nom', bru' de pratempa atak',  
estingiĝinta radi' el foja lum' de Nord',  
ton' de rompita harp', sono post kordo-krak',  
agoj de praepok', mortstela ilumin',  
migro de fora planed', amo de mortintin',  
nememorata tomb', vaka Eterno-ruin',  
fum' de ĉesinta flam', de bronz' fandita son',  
de morta cigno kant', perdita hom-eden' --

Jen mia infanec'. Sed mia jun-sezon' -  
ho sama estis ĝi kiel ĉi Maj-poem'.

Kiel vespera maj' en kruda roktereno:  
Sur vangoj flirtas rid', en koro, ve! ĉagreno.

Vidas vi sur la herbej' migranton al la celo  
rapidi antaŭ ol nigros la rozĉielo?  
Vi lin ne vidis plu trans tiu montdeklin',  
se li al horizont' foriros kun akcelo.  
Ne plu, neniam plu! Jen mia plua viv'!  
Kaj ĉu por tia kor' konsol' ne mortis jam?  
La am' senlimas ja! - Trompiĝis mia am'!

Estas unua maj-vesper',  
vespera maj', la amsezon',  
logas al amo turta kver':  
"Ho Hynek! - Vilém!! - Jarmila!!!"

## EVA SEEMANNOVÁ-SUCHARDOVÁ

E. Seemannová naskiĝis la 21-an de marto 1920; post la abiturienta ekzameno en reala gimnazio (Krásnohorská) transiris al la ŝtata konservatorio, kie ŝi studis 3 jarojn, poste komencis aktori ĉe profesia teatra grupo, migranta tra la ĉeĥa kamparo. Ŝi komencis lerni Esperanton en la jaro 1949 kaj aŭtune 1950 en Karlovy Vary faris la ŝtatan ekzamenon. Instruisto de E. Seemannová estis R. Hromada, kiu malkovris ĉe ŝi verkistan talenton. Tamen E. Seemannová estas antaŭ ĉio aktorino kaj havas signifon ne kiel poetino, sed kiel E. aktorino kaj deklamantino. En siaj nemultaj poemoj ŝi klopodas prezenti - same kiel sur la scenejo - delikatajn animajn sentojn kaj statojn. Pri la traduka laboro E. Seemannová okupiĝas nur kiel gvidantino de la VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY, tradukante por sia kolektivo teatraĵojn, kiujn ŝi intencas surscenigi. Ĉe siaj tradukoj - ĉar estas nur teatraĵoj - ŝi atentigas antaŭ ĉio la vidpunkton aktoran, klopodante, ke la teksto estu bone elparolebla por aktoro kaj facile komprenebla por la publiko.

En la traduko de E. Seemannová legu fragmenton el PIGMALIONO, fame konata komedio de G. B. Shaw.

Kl - Klára; Pi - Pickering; Hg - Higginsová; Lí - Líza; He - Henry)

Sl: Fraŭlino Doolittle!

He: Estas ŝi, panjo!

Lí: Kiel vi fartas, sinjorino Higgins? Sinjoro Higgins estis tiel afabla kaj invitis min en via domo.

Hg: Tute bone. Mi vere ĝojas, ke mi konatiĝas kun vi.

Pí: Kiel vi fartas, fraŭlino Doolittle?

Lí: La kolonelo Pickering, se mi ne eraras? (Al Hi) Kiel vi fartas?



Hg: Mia filino Klára, mia filo Fredy ... (salutas sin)

Hg: Henri, ne sidiĝu sur mian skribotablon!

He: Pardonu!

Hg: Ĉu vi ne opinias, ke pluvos?

Lí: Negranda depresio okcidente de nia insularo probable ŝovos sin al orienta direkto. Tamen ekzistas neniuj simptomoj, kiuj anoncus pli gravan ŝanĝon de la meteorologia situacio.

Fr: Ha, ha, tio estas amuza!

Lí: Kio ne plaĉas al vi ĉe tio, junulo? Mi diris ja tion korekte!

Hi: Mi vere esperas, ke ne malvarmiĝos. En Londono estas epidemio de gripo. Nia familio suferas per tiu ĉiun printempon.

Lí: Mia onklino mortis je gripo. Almenaŭ oni tion pri ŝi diras. Sed mia opinio estas, ke oni ŝin forkrakis.

Hi: Ke oni ŝin forkrakis?

Lí: Kompreneble. Dio mia atestanto! Kial ĝuste ŝi devus morti je gripo? Unu jaron antaŭe ŝi pasigis ja sukcese difterion. Mi vidis ŝin propraokule. Ŝi estis jam tute blua en la vizaĝo. Ĉiuj jam pensis, ke estas fino kun ŝi. Sed mia patro verŝis en ŝian gorgon tiel longe brandon, ĝis ŝi subite rekonsciiĝis kaj preskaŭ tramordis per dentoj la kuleron.

Hi: Mia Dio!

Lí: Kial ankaŭ tia forta ino devus morti je gripo? Kaj kien malaperis tiu ŝia nova pajloĉapelo, kiun mi devis heredi de ŝi? Iu forpinĉis ĝin kaj mi volus veti, ke tiu, kiu forpinĉis ĝin, tiu ankaŭ forkrakis ŝin.

Hi: Mi petas vin, kion signifas: iun forkraki?

He: Sed tio estas tia nova societa termino. Forkraki iun signifas iun mortigi.

Hi: Vi ne kredus ja, ke iu vian onklinon mortigis?

- Lí: Ke mi ne kredus tion? Tiuj, kun kiuj ŝi loĝis, kapablis forigi ŝin el la mondo pro simpla pinglo, despli pro ĉapelo!
- Hi: Sed certe ne estis korekte, ke via patro tiamaniere verŝis en ŝian gorgon la brandon. Tio povis ja mortigi ŝin.
- Lí: Tiun? Ne eble! La brando estis por ŝi patrino lakto. Kaj krome, mia patro mem havis pri brando tiom da spertoj, ke li sciis precize, kiam ĉesi.
- Hi: Vi eble ne volas diri, ke via patro trinkis?
- Lí: Trinkis? Mia Dio, li drin... trinkis de tempo al tempo. Ĉe li tio estis ĥronika.
- Hi: Kompatindulino! Kiom vi certe devis suferi!
- Lí: Sed tute ne! Kaj kiel mi rememoras, al li tio ankaŭ ne malutilis. Nome li ne trinkis regule. Li trinkis, por tiel diri, nur kiam tio kaptis lin. Kaj mi povas certigi vin, ke post kelkaj gutoj li estis ĉiam multe pli agrabla. Kiam li estis sen laboro, la patrino ĉiam donis al li iom da kronoj kaj diris, ke li ne revenu pli frue, ol li ebriiĝos tiel, ke li havos gajan kaj agrablan humoron. Sur la mondo ekzistas multaj virinoj, kiuj devigas siajn edzojn al trinkado, ĉar alie ili ne eltenus kun ili. Sciu, estas jene: Kiam viro havas en si pecon da konscienco, do ĝi komencas mordi lin, se li estas sobra kaj tuj estas la bona humoro for. Sed sufiĉas, ke li eltrinku glaseton, la nuboj malaperas kaj li estas denove feliĉa. Hej, vi, pri kio vi ridemas?
- Fr: Pri tiu nova maniero de konversacio. Vi tiel eminente ĝin majstras.
- Lí: Do kial vi ridas. Se mi bone prezentis tion. Ĉu mi eble diris ion, kion mi ne devis?
- Hg: Nepre ne, fraŭlino Doolittle.
- Lí: No, do, mi havis feliĉan ŝancon. Mi ĉiam diras, ke ...
- He: (rigardas horloĝon) Hm ...

- Lí: Pardonu, mi devas jam foriri. Mi tre ĝojis, ke mi renkontiĝis kun vi. Ĝis revido! (Ĉiuj" Ĝis revido!)
- Fr: Ĉu vi hazarde ne iros tra la parko, fraŭlino Doolittle? Tiam vi eble permesus ...
- Lí: Mi veturas per taksio. Sur vian promenon tra la parko mi fajfas!

## JULIE ŠUPICHOVÁ

Mi rememoras kaj alte aprezas 50-jaran sindonan poresperantan laboron de Julie Šupichová, malnova pionirino de la Esperanta movado. Ŝi naskiĝis la 27-an de januaro 1884 en Studenice. Ekde la jaro 1920 laboris kiel instruistino en Červený Kostelec, Hronov n. M. kaj en Praha.

De la jaro 1907 komencas J. Šupichová florriĉan laboron, kiu celas per gazetartikoloj kaj prelegoj propagandi ideon de la internacia lingvo. Ŝia mallongigo "Ejŝ" estis tiam bone konata en Národní politika, en Rozkvět, Čech, Národní osvobození k.a. aperadis ankaŭ ŝiaj kontribuaĵoj. Apartan propagandan signifon havis ŝiaj artikoloj en fakaj gazetoj instruistaj. Same intense J. Šupichová kunlaboris al E. gazetoj kaj enlandaj kaj eksterlandaj.

Dum la unua mondmilito gvidis "Fraŭlinan rondeton en Praha", kiu en la jaro 1919 kreis fundamenton por "Rondeto de esperantistinoj en Praha", kies prezidantino ŝi fariĝis. Ĝuste al tiu ĉi Rondeto dediĉis dro S. Schulhof siajn Bohemajn Grenatojn. En la jaro 1925 J.Š. estis elektita en la Lingvan Komitaton kaj en 1933 estis nomita Honora Membrino de UEA. Verkis diversajn lernolibrojn de E. por junularo, konversaciajn librojn, propagandajn broŝurojn kaj legolibrojn.

J. Šupichová estas sincera amikino de la ĉeĥoslovaka E.junularo.

## ELI URBANOVÁ

Eli Urbanová estas aŭtorino de originalaj poemoj, el kiuj kelkaj atingis plej altan aprezon en Belartaj Konkursoj.

Ŝi naskiĝis la 8-an de februaro 1922 en Čáslav kaj tie vizitadis popollernejon, pli malaltan realgimnazion kaj pedagogian instituton. Post la abiturienta ekzameno ŝi akceptis okupon en Praha, en privata muziklernejo.

"Ankoraŭ pli potence ol la muziko min de ĉiam tiris poezio. Eble en la sama tago, kiam mi fariĝis knabino, mi komencis skribi. Tamen restis ĉe malfortaj provoj, el kiuj nur iom elstaras la poemaro ZRCADLO, eldonita 1940 en Čáslav. Modesta lirikaĵo. Ŝajnis, ke per ĝi definitive finflamis ĉiu kreopasio en mi ..." konfesas Eli Urbanová kaj aldonas: "Sed ne! Antaŭ Kristnasko 1948 mi ellernis Esperanton kaj jen mia senkuraĝe sopiranta koro vekigis al nova vivo! De tiu tempo mi verkis multajn originalajn versojn (sole en Esperanto); kelkaj el ili estas premiitaj."

En la jaro 1955 ordigis E. Urbanová siajn originalajn poemojn (el kiuj nemultaj estis jam publikigitaj) en poemaron NUR TRI KOLOROJN. Ĝi entenas jenajn versciklojn:

PRI MI MEM, TRA LA URBEGO, GUTOJ DE INTIMO,  
JARSEZONOJ, BESTA PARADO, FANTAZIAJ SCENOJ -  
FATAJ RENKONTOJ KAJ FABELOJ, EL LA KORBO, DU  
MARISTAJ, OKAZAJ POEMOJ, HETAJRO DANCAS,  
HEROOJ DE LA ZODIAKO, TRIOPO.

### DU DEMANDOJ

- I. Mi vin demandas, pro diablo,  
ĉu venis vi por min provoki?  
Al vi, sinjor', mi rajtas voki:  
Forlasu nin, tuj for de l' tablo!

Ke vi obeos, jen probable:  
Ĵetita gant' vin ŝajnas ŝoki.  
Mi vin demandas pro diablo,  
ĉu venis vi por min provoki?

Ja, kia pruvo pri kapablo  
grimaci iun aŭ primoki!  
Sed kavalir' ne emas koki  
per stulta vort', ekgrincu sabro!

Mi vin demandas pro diablo!

II. Mi vin demandas, aĥ, pro Dio,  
kial vi tiel mute kuŝas?  
Sub vi sangruĝa herbo pluŝas ...  
Ĉu jam finiĝas tragedio?

Pardonon ... Kia apatio!  
Tremante mi la manon tuŝas ...  
Mi vin demandas, aĥ, pro Dio,  
kial vi tiel multe kuŝas?

Ne helpas vorto, eĉ de tio,  
ke mi la ŝultrojn pete puŝas,  
ke krias mi, dum larmoj duŝas:  
Nin iam ligis simpatio!

Mi vin demandas, aĥ, pro Dio!

## ŜI NE VENAS

Kiel sur dornoj somnambulo  
mi paŝas ĉirkaŭ strat-angulo,  
centfoje haltas, plu promenas -  
Kaj ŝi ne venas!

Kredu min, homoj, nur hazardo  
min ree gvidas al bulvardo -  
sed mil okuloj tuj divenas:  
Ha, ŝi ne venas!

Ie ŝi klaĉas en komforto,  
dum min ĉi tie aĉa sorto  
pri l' pacienco ekzamenas ...  
Do ŝi ne venas!

Certe frizaĵ' aŭ nova robo  
absorbis tempon de la snobo!  
Amara kraĉo min venenas.  
Fi, ŝi ne venas!

Kia enuo! Kia tedo!  
Palpante je la cigaredo  
virinan genton mi malbenas.  
Ĉar ŝi ne venas!

Restas foriri ... Jen - subite -  
subite ĉio pardonite,  
agrable, mole mi mienas.  
Jes, ŝi jam venas!

## POR ĈIAM

Vin apogante je kolono  
vi cigaredon fumis mute ...  
Samtempe dio kaj demono,  
vi min ekkravis tuj kaj tute,  
por ĉiam.

Okuloj viaj de cigano  
al mi hipnote ŝajnis brili.  
Kvazaŭ anĝelo kaj satano  
delogi volus min per ili  
por ĉiam.

Kia feliĉo! Kaj sufero!  
Pri l' am' mi pensis, pri la morto ...  
Ĉielo mem kaj mem infero,  
vi min sklavigis eĉ sen vorto  
por ĉiam.

## ŜTEFO URBAN

Ŝ. Urban, muzikkomponisto kaj profesoro de la Ŝtata Konservatorio en Praha, naskiĝis en la jaro 1913 en Boŝanovice apud Praha. Literatur-ama leganto povis dum pasintaj jaroj ofteri legi en E. gazetoj spritoplenajn kontribuaĵojn kaj prozajn kaj poeziajn subskribitajn per lia nomo aŭ pseŭdonimo Ŝteur Panban. Kvin literaturaj premioj (4 de UEA) rezultis el lia ĝis nuna verkado kaj 2 premiojn li akiris en internaciaj konkursoj pri originala gitar-komponaĵo.

La verkaro de Ŝ.U. ampleksas:

30 novelojn

33 originalajn kantaĵojn

3 verssatirojn

2 vers-ciklojn

1 kantan kun parafrazo satiraj pri popolkantoj.

Jen kelkaj opinioj de Ŝ.U. pri Esperanto:

"Traduklaboron mi absolute ne kulturas; laŭ mia imago prefere originalaj verkoj povas krei Esperantan memstaran kulturon. Originala muziko (kantoj) antaŭ ĉio! Espe devas iĝi kultura movado kaj ne aro da kolektantaj stranguloj "-istoj, -antoj, -uloj"."

El lia plumo venis sekvantaj specimenaj poemoj:

## SPEGULO

Post mia morto mi iĝis spegulo  
sin apoganta sur strata angulo.

Preter mi ondas kaj bolas la vivo,  
tajde ŝaŭmante, en levo kaj drivo.

De la mateno amas' rapidanta,  
nokte ebria ular' kanto-vanta

fuĝan fragmenton de l' Nuno ekĉasas,  
kiam futur' hieraŭon jam pasas.

Kaj senmemoro pri l' ĵusa pasinto,  
mi, sovaĝvaganto en ĉi labirinto,



giron de l' Urbo arĝente reflektas,  
revojn el lumo kaj ombroj kunplektas,

dorsapogante sin sur la angulo,  
mi, lum-soifanto, la brila spegulo.

## KANTO DE KOMENCANTOJ (Iŝla Marina)

"Dekses reguloj antaŭ okuloj!"  
Jen la sentenco por la komenco.  
Tra la la la la la la gardu FUNDAMENTON;  
tra la la la la la jen la FUNDAMENT'.

Naŭcent radikoj, karaj amikoj,  
ega progreso antaŭ kongreso.  
Tra la ...

Ej, la sufiksoj, kvazaŭ oniksoj,  
la vortfarado - granda parado!  
Tra la ...

## JOSEF VONDROUŠEK

J. Vondroušek naskiĝis la unuan de decembro 1904 en Brno. Post la studoj en komerca akademio li eklaboris kiel bankoficisto. Esperantisto ekde 1923; baldaŭ funkciulo de la klubo, komitatano de EAĈSR kaj UEA, organizinto de la 6-a ĉeĥoslovaka E. kongreso, unu el organizintoj de la 8-a ĉeĥoslovaka kongreso en Brno kaj nun prezidanto de la plej malnova E. klubo en ĈSR, kies programoj kaj tradiciaj koncertoj vekas admiron.

### **Tradukitaj verkoj:**

LIBRO DE APOKRIFOJ, de Karel Čapek,  
RAKONTOJ EL LA DUA POŜO, de Karel Čapek,  
ONDRO KAJ DRAKO, de Viktor Dyk,  
SATURNIN, de Zdeněk Jirotka,  
SATIRUSO, de Max Švabinský (Antaŭparolo de V. Denkstein).

J. Vondroušek redaktas (krom poezia parto, kiun prizorgas J. Kořínek) ankaŭ ĉeĥlingvan Bultenon de la E. klubo en Brno.

\*\*\*\*\*

Estas senduba, ke inter ĉeĥaj aŭtoroj troviĝas kelkaj, kiuj apartenas al la elito de la Esperantaj literaturistoj.

Sed ili ĉiuj suferas pro komuna malsano: iliaj verkoj ne estas eldonataj - ili ne havas kontakton kun la legantoj. Ni esperu, ke la frua estonteco alportos ŝanĝon de tiu ĉi stato.

Dume mi dirlotas penson, aperigi malgrandan antologion el ilia verkaro, almenaŭ en la aranĝo, simila al tiu ĉi Skizo.

## FAKA LITERATURO EN ESPERANTO

Kvankam relative malmultaj fakaj libroj estis tradukitaj en Esperanton kaj ankoraŭ malpli multaj fakaj libroj estis skribitaj en ĝi originale, tamen apliko de la Internacia Lingvo en scienca kampo havas sian apartan signifon.

Nuntempa sciencisto estas alte specialigita kaj koncentrita al certa scienca branĉo, se li volas efike kaj sukcese stimuli ĝian pluan evoluon. Tion kaŭzas granda amplekso de niaj scioj pri la naturo. Sed la scienco estas afero kolektiva. Oni devas ja sekvi laboron de siaj eksterlandaj kolegoj por ne esploradi jam esploritan. Scienca esplorado en la nuna jarcento estas farata preskaŭ en ĉiuj landoj de la mondo. La rezultoj estas publikigataj en plej diversaj lingvoj. Hodiaŭa sciencisto devas kompreni minimume lingvojn anglan, rusan kaj germanan por povi informiĝi pri la aktuala stato de sia branĉo. Imagu grandan penon, kiun oni devas dediĉi al ellerno de tiuj ĉi tri lingvoj: dume oni publikigas gravajn verkojn ankaŭ en lingvoj aliaj: franca, hispana, sveda k.a.

Nur granda nacio povas eldoni en sia lingvo sciencajn verkojn, kiuj estas destinitaj al relative malvasta grupo de sciencistoj. Eminentaj sciencistoj de malgranda nacio aŭ ne povas entute sian libron eldoni, ĉar nur kelkaj personoj interesiĝus pri la tro specialigita verko, aŭ ĝin sukcesas eldoni, sed por la aĉetontoj la prezo - rezultanta el la malgranda eldonkvanto - estas neakceptebla. Tiamaniere la scienco estas senigata je valoraj kontribuoj.

Oni ĝenerale konscias, kiel gravaj estas la internaciaj sciencaj konferencoj. Sed nur personoj, kiuj tian konferencon partoprenas povas konstati, kiel grava obstaklo de la librera interŝanĝo de esploraj akiraĵoj estas la lingva ĥaoso. Oni ĝenerale elektas kelkajn "oficialajn lingvojn", en kiuj flue

parolas nur sciencistoj de la resp. landoj, dum la aliaj pasive partoprenas pli malpli komprenante la traktatan aferon.

Siatempe funkcion de la internacia lingvo plenumis la lingvo latina. Profesoro de kiu ajn universitato povis prelegi en kiu ajn universitato kaj ĉie esti bone komprenata. Sed tiu tempo longe forpasis kaj nuna sciencisto kaj scienco baraktas pro grandaj lingvaj malfacilaĵoj. Antaŭ Esperanto staras koncerne sciencajn laboron grandaj perspektivoj.

Jam en 1924 oni diskutis la lingvan problemon en franca ACADÉMIE DES SCIENCES. La rezulto estis, ke 40 membroj de la Akademio akceptis rezolucion favore al Esperanto. Oni nomis Esperanton "majstroverko de logikeco kaj simpleco" kaj esprimis favoron al disvastigo de ĝi en la sciencajn aferojn.

En aŭgusto 1950 85 japanaj sciencistoj subskribis specialan promeson, laŭ kiu ili devigas sin publikigi en E. almenaŭ unu el la disertacioj, kiujn ili verkos en ĉiu jaro kaj aldoni Esperantlingvan resumon al ĉiu traktato verkata en alia lingvo.

Tiun ĉi ekzemplon en la jaro 1951 sekvis sciencistoj en Ĉinio. Dudek profesoroj de diversaj ĉiniaj Universitatoj akceptis rezolucion en kiu, interalie, ili skribas:

"La sciencistoj, kiuj malfeliĉe parolas aliajn lingvojn kaj kiuj deziras tamen ion krei en siaj popraj sferoj, devas eluzi pli ol duonon de sia vivtempo por ellerni 4 aŭ 5 fremdajn lingvojn, ĉar alie ili ne povas digesti la konojn jam ekzistantajn, des malpli fari ian indan kontribuon. Tia trokonsumo de tempo kaj de energio estas vere nekompensebla perdedo de la scienco. Ni volas adopti la simplan, facile lerneblan Lingvon Internacian, Esperanto, kiel la sciencajn lingvojn por internacia uzado kaj por publikigi niajn verkojn en ĝi."

Jam antaŭ la unua mondmilito estis publikigitaj sciencaj verkoj en Esperanto. Oni daŭrigis inter la du militoj kaj precipe post la dua mondmilito.

Sciencaj artikoloj estas aperigataj krome en SCIENCA REVUO, kiu estas organo de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA (ISAE). Inter ĝiaj prezidantoj ni legas nomojn de du famaj Nobelpremiitoj:

J. J. Thomson kaj franca fizikisto Cotton.

### **KELKAJ TRADUKITAJ SCIENCAJ VERKOJ:**

Leibnitz: Monadologio; Descartes: Parolado pri la metodo; Renan: La vivo de Jesuo; J. Novák: Jan Amos Komenský; Carnegie: Por arbitracio; Fried: Problemoj de l' malarmo; Angell N.: Moralaj kaŭzoj de la militoj; Kant: Al eterna paco; Marks-Engels: La komunista manifesto; Liebknecht: Por ataki kaj defendi; Lasalle: Pri la esenco de konstitucio; Lenin: Ŝtato kaj revolucio; Mendelejev: Provode kemia kompreno de l' monda etero; Reiche: El la mondbildo de l' nova fiziko; Fersman: La kemio de l' Universo; Tomosaburo: Pri la stato de inkubacio; A. da Silva: La Araneoj.

### **KELKAJ ORIGINALAJ SCIECAJ VERKOJ:**

Badouin: La arto de memdisciplino; Hodler: La pacproblemo; Nekrasov: Patri-ideo en la nuna rusa poezio; De Saussure: Geometrio folietara; Vörös: Analitika geometrio absoluta, Elementoj de la geometrio absoluta; Wüster: Fizikaj grandoj kaj iliaj unuoj; Collinson: La homa lingvo; Aisberg: Fine! Nun mi komprenas la radion! (tradukita ĝis nun en 18 naciaj lingvoj); Privat: Interpopola konduto; Lapenna: Retoriko, kun aparta konsidero al Esperanta parolarto, Aktualaj problemoj de la nuntempa vivo; Drezen: Historio de la mondlingvo; Ŝirjaev:

Kökény, Bleier: Enciklopedio de Esperanto (du volumoj); Reiersol: Diferencialaj ekvacioj de specimenaraj distribuoj; Tokui Sato: Pri etendo de la teoremo de Carleman-Hukuhara rilate al asimptomaj serioj; Pri fikspunkta teoremo, Pri la limo de funkci-sekvaĵoj; M. Nagumo: Rimarkoj pri fikspunkta teoremo en funkcialaj spacoj; Ernest Dodge: Flugado Alimonden; Paul Neergard: Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso, Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj.

Menciindaj fakaj revuoj, kiuj publikigadis sciencajn disertaciojn estas: SCIENCA GAZETO (1912-1914), TEĤNIKA REVUO (1918-1919), MEDICINA REVUO (1923-), INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (1908-1922), ESPERANTOLOGIO (1947-), SENNACIECA REVUO (1921-).

Ankaŭ SOMERAJ UNIVERSITATOJ, en kiuj prelegas famaj universitataj profesoroj, servas al popularigo de scienco per Esperanto.

En Esperanto estas eldonataj ankaŭ Fakaj vortaroj kaj Terminaroj, kiuj ludas specialan rolon. Ĝis 1949 ekzistis en E. 106 presitaj fakaj vortaroj kaj 43 diversaj terminaroj por filozofio, tekniko, metioj kaj aliaj branĉoj.

Inter aliaj ekzistas fakaj vortaroj kaj terminaroj por: anatomio, arĥitekturo, armeo, aviado, botaniko, ĥemio, komerco, edukado, elektrotekniko, juro, maŝinoj, matematiko, medicino, mekaniko, muziko, navigacio, ornitologio, farmacio, filatelo, filozofio, fotografado, fiziko, fitopatologio, telekomunikadoj, psikologio, radio, religio, scienco (ĝenerale), statistiko, teknologio, transportoj, zoologio.

Post 1949 aperis krome terminaroj por fakoj: marista, fervoja, elektroteknika. Al la verkado de fakaj terminaroj kaj vortaroj donis sian helpon la Akademio de Esperanto, kiu havas apartan sekcion pri teknikaj vortaroj. En la eldonado

ludas gravan rolon UEA, kiu en la lastaj jaroj eldonis plurajn tiajn terminarojn.

Kvankam la faka literaturo estas ĝis nun laŭnombre multe superata de la beletra, tamen la perspektivoj antaŭ ĝi estas vastaj.

## **LA PLEJ GRAVAJ LITERATURAJ REVUOJ**

### *Literatura mondo*

Neŭtrala literatur-arta revuo aperinta en Budapest. Ĝia fondinto estis dro T. Schwartz. Li estis ĝia respondeca redaktoro de 1922 ĝis 1924. Pluan eldonadon transprenis Hungara E-Instituto, respondeca gvidanto estis V. Toth. La revuo ĉesis aperadi en 1926. En la unua periodo redaktis ĝin K. Kalocsay kaj J. Baghy.

LM estis refondita de V. Bleier en 1931, kiu fariĝis la eldonisto kaj administranto. Ĉefredaktis denove Kalocsay kaj Baghy. Krome formiĝis reto da kunlaborantoj (Szilagyi, Totsche, Bodo, Hohlov ktp.), kiu estis vere internacia. El la numeroj estis tre ŝate akceptitaj opaj naciaj numeroj: estona, pola, ĉeĥa, jugoslava, latva, sveda. LM estis debutaĵo de la juna poetogeneracio.

La formato de tiu ĉi impona revuo estis ĉiam 30 x 23 cm. La signifo de ĝi estas nemezurebla. LM aperadis ĉiam en arta eksteraĵo kun multaj ilustraĵoj.

En la dua periodo LM estis ankaŭ plej aktiva libroeldonejo.

La tria periodo komenciĝis en la jaro 1947 kaj daŭris ĝis 1949.

### *Norda Prismo*

Ĝi estas kultura, socia kaj literatura revuo, dumonata, redaktata de dro Ferenc Szilágyi, aperanta en Svedujo. La unua numero aperis marte 1955. Ĝi estas arta spegulo, kiu post

malapero de la Literatura Mondo kaj Malgranda Revuo celas forigi ties mankon.

### *La Nica Literatura Revuo*

Sub la kompetenta ĉefredaktado de Gaston Warinhien fariĝis ĉi tiu revuo inda reprezentanto de la Esperanta kulturo. En la redakta sesopo laboras ankaŭ dro Tomáš Pumpr el Praha.

Ĝi publikigas la plej plaĉajn poemojn kaj originalajn kaj tradukitajn, la plej artajn prozaĵojn. La Nica Literatura Revuo celas daŭrigi tradiciojn de Literatura Mondo.

## **VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY**

VĈDJB estas la unua Esperanta teatra kolektivo, kies fondiĝon inspiris hungara poeto, aktoro kaj reĝisoro Julio Baghy. Li revis pri teatra kolektivo de Esperantaj aktoroj el diversaj nacioj, kiuj prezentus teatraĵojn en unusola lingvo komuna - Esperanto. Tiun ĉi ideon, kiun li mem ne povis - bedaŭrinde - realigi pro malfavoraj cirkonstancoj, li transdonis al sia korespondantino kaj amikino Eva Suchardová. Jam kelkaj liaj propraj vortoj skribitaj al Suchardová:

"... mi revis pri organizado de aktortrupo por migre viziti la grandajn urbojn de la mondo kaj prezenti artajn vesperojn ... mi volis organizi trupon kun la nomo "Verda Ĉaro". Nu, intervenis la milito kaj ... kaj mia revo restos por la posteuloj, eble por vi ... Ĉu vi ne volus transpreni ĉi tiun taskon?"

LA VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY komencis ekzisti en la jaro 1955 en tre modestaj cirkonstancoj kaj en ankoraŭ pli modesta formo. Ĝi havis tiam ne pli ol 4 membrojn. Ĝi komencis aranĝi artajn teatrajn vesperojn, pli poste prezentis aŭ unuaktaĵojn aŭ mallongigitajnteatraĵojn. Sed jam post unu



jaro ĝi havis 10 konstantajn membrojn, al kiuj ĝi laŭ neceso aligas novajn interesatojn kaj mem edukasilin aktore.

Tiam ĝi jam kapablis kuraĝi prezenti al sia publiko tutvesperan teatraĵon. Estis MARYŜA, esperantigita dramo de la ĉeĥaj aŭtoroj, fratoj Mrštík.

Poste VĈdJB ekstudis kaj prezentis PYGMALION de G. B. Shaw, jam sen iaj ajn agaptoj kaj mallongigoj kaj fine la dramon de Ibsen NORA.

El la jam prezentita repertuaro de la VĈdJB estu menciitaj teatraĵoj:

LA OMBRO DE LA VIVO, de Niccodemi,

GRANDA LUDO

LANDVOJA RENKONTO,

DUM TONDRAS KANONOJ, ĉiuj tri originalaĵoj verkita por la VĈdJB de Julio Baghy,

LA PATRINO, de Karel Čapek,

PIGMALIONO, de G. B. Shaw,

MARYŜA, de fratoj Mrštík,

ĈE AKVO DE FORGESOM de M. Boulton,

KORESPONDU, de Antoni Seemann,

Mi ESPERAS, de Antoni Seemann (ambaŭ originalaĵoj),

NORA, de Henrik Ibsen.

La celo de la Verda Ĉaro de Julio Baghy estas prezenti teatraĵojn aŭ originale Esperantajn aŭ esperantigitajn de la tutmonda teatra literaturo, por montri, kiel viva kaj belsona estas la lingvo, ke ĝi taŭgas ankaŭ por la teatra esprimiĝo kaj doni ekzemplon kiel transdoni al diversaj nacioj kaj lingvoj la naciajn literaturojn en unu komuna lingvo.

La arta gvidantino de la Verda Ĉaro de Julio Baghy estas Eva Seemannová-Suchardová, reĝisoro Antoni Seemann. Krom la aktoroj havas la kolektivo siajn teĥnikajn membrojn (sekretarion, mastron, maskiston k.t.p.).

# MALLONGE PRI LA ESPERANTA METRIKO

Ne nur por tiuj, kiuj mem volas ekpraktiki versfaradon, sed eĉ por simpla versleganto estas utile kaj interese koni la elementajn principojn kaj regulojn de la E. metriko, por povi des pli profunde penetri en beloĵn de Esperantlingve skribitajn poeziaĵojn.

Al la unuaj mi rekomendas por la faka studo libron de Kalocsay-Waringhien: Kiel fariĝi poeto aŭ PARNASA GVIDLIBRO (kiu donos al li "ĉion krom genio" - kie promesas la enkonduka balado). La alia utila libro por ili estos LINGVO STILO FORMO (la poezia parto).

Por la ceteraj, kiuj kontentiĝos pri la scio, ke La espero estas skribita en trokeoj, al kiuj sufiĉos rekoni la ritmon de legata poemo kaj nur konciza klarigo de fakaj terminoj kiel ekz. "adasismo", "rimoido", "asonanco" estas dediĉita sekvanta ekstrakto el "Skizo pri la Esperanta metriko" de Gaston Waringhien - Fundamentaj konoj (el Parnasa Gvidlibro):

RITMO estas, laŭ ĝenerala formo, pli malpli regula alterno de fortaj kaj malfortaj sonoj

VERSO estas sekvo da silaboj, kies nombro estas proksimume fiksa, kaj kiuj estas en certaj lokoj necese fortaj. En Esperanto oni konsideras *fortaj* la akcentajn silabojn, *malfortaj* la akcidentajn.

VIRA aŭ OKŜITONA estas vorto akcentita sur la lasta silabo (A. remain, G. beruf, F. cité, I. vertu).

INA aŭ PAROKSITONA estas vorto posedanta akcenton sur la antaŭlasta silabo (E. domo).

ENKLITIKO estas vorto posedanta akcenton nur malfortan, kiu en certaj okazopj povas malaperi. En E. la enciklikoj estas 1. la tabelvortoj nedifinitaj, kolektivaj, demandaj kaj montraj; 2. la posesivaj adjektivoj: mia, cia, lia, ŝia, ĝia, nia, via; 3. la vortoj: dua, tria, apud, preter, super, ili, oni, unu, estas. Sume, ĉiuj dusilaboj, kies akcenta vokalo estas mallonga, ofte eĉ malforta pro interna hiato, kaj kies malĉefa senco nebligas intensan prononcon.

LONGA estas silabo, kies vokalo estas sekvata de du konsonantoj aŭ pli, el kiuj almenaŭ unu apartenas al la koncerna silabo, ekz.: -lan- en "melankolio", -kons- en "konstitucio"; sed ne -pa- en "patrineco".

PIEDO estas versero prezentanta facile memoreblan kombinson de unu forta kaj unu aŭ pluraj malfortaj tempoj.

TEMPO estas elemento de piedo. Oni havas piedojn dutempajn: jambo (o-), trokeo (-o), tritempajn: anapesto (oo-), daktilo (-oo), amfibrako (o-o), kaj kvartempajn: peano (ooo-), piriko (oo) kaj tribraka (ooo) estas iom apartaj piedoj, ne enhavantaj fortan tempon.

RIMO estas la sameco, inter du versfinoj, de la lasta akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj sonoj (duajn-ĝuajn, ekstra-dekstra).

RIMOIDO estas rimo, en kiu la postakcetotaj konsonantoj nur similas inter si (aĵo -paŝo, vintro-cindro; tondro-ondo).

PRESKAŬRIMO estas rimo, en kiu la konsonantoj, kiuj sekvas la postakcentan vokalon, nur similas inter si (morgaŭ-zorgaj; tiam-lian).

ASONANCO estas rimo, en kiu samas nur la akcentaj kaj postakcentaj vokaloj (tamen-klare); kria-iras).

AGORDO estas rimo, en kiu la akcentaj vokaloj nur similas inter si (arbo-korbo; celinda-plenda).

ADASISMO estas sufiksrimo (monteto-rivereto)

APOGKONSONANTO estas la antaŭakcenta konsonanto (p en: ponto)

RIĈA estas rimo, rimoido aŭ agordo, en kiu samas ankaŭ la apogkonsonanto.

KONTINUAJ aŭ PARAJ estas rimoj, kiuj regule sekvas sin duope (aa bb cc dd).

ALTERNAJ estas rimoj, kiuj sin miksas laŭ la skemo: abab cd cd ...

RINGAJ estas rimoj, kiuj sin miksas laŭ la skemo: abba cddc ...

LEONAJ estas rimoj inter partoj de l' sama verso.

Oni povas krei grandegan serion da versoj, akumulante laŭ varia nombro jen samspecajn, jen diversspecajn piedojn. La plej uzataj versoj estas:

### KVARTROKEO ....

Fratoj, manon donu kore  
Kaj senzorge, sendolore  
Belan horon festu ni!

(L. L. Zamenhof)

### KVARJAMBO ...

Gardisto cara sub fenestro  
Postenon staras kun fier'.

(J. Baghy)

### TRIAMFIBRAKO ...

En sonĝo princinon mi vidis  
Kun vangoj malsekaj de ploro

(L. L. Zamenhof)

### KVINJAMBO ...

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
El mia brusto nun ne saltu for!

(L. L. Zamenhof)

### FIKSFORMAJ POEMOJ

La RONDELO estas carma kaj facilmova poemo, taŭga ankaŭ por sprito. Ĝi enhavas 13 versojn laŭ la skemo: ABba - abAB - abba A. Komparu tiun ĉi skemon kun la rondeloj de K. Kalocsay ĉe diversaj aŭtoroj en tiu ĉi Skizo.

La TERCINO estas poemo sen difinita longo, kies rimoj faras seninterrompan ĉenon laŭ skemo: aba bcb cdc ...

Jen estus savo! Sed mi amon festi  
Nur povas per absinto de l' momento.

Konstrui neston, sed nenian nesti,

Îcar ŝiras for la neston kruda vento ...

(K. Kalocsay)

La SONETO estas poemo konsistanta el du verskvaroj kaj unu versseso, ordinare skribita kiel du verstrioj. La sekvantaj skemoj estas regulaj:

abba abba cdc dcd

abba abba ccd ede

abba abba cdc dee

abba abba ccd eed

abba abba cdd cee

Oni povas uzi por la soneto ĉiujn specojn de verso, sed oni evitas miksi ilin en tiu poemo. Malgraŭ sia malvasteco la soneto estas tre bela formo, kiu povas enteni plej altan poezion.

## MALLONGA LISTO DE NEOLOGISMOJ

Pri la problemo de neologismoj (novaj vortoj) ni jam parolis ĉe Antoni Grabowski kaj Kolomano Kalocsay. Ni konatiĝis kun la motivoj, kiuj pledas por ilia enkondukado en la lingvon. Ni vidis ankaŭ kiel akra batalo ekestis inter la konservativemuloj kaj modernuloj. Sed restas fakto, ke en a modernaj, precipe poeziaj verkoj aperas certa nombro da neologismoj, kiu kiu devas ĉiu esperantisto konatiĝi por bone la poezion kompreni. Tial mi elektis el la Listo de neologismoj (Parnasa gvidlibro - ĉeĥa traduko de J. Kořínek) la plej necesajn, kiujn devas moderna esperantisto koni almenaŭ pasive.

Adaĝa - zdlouhavý, pozvolný

Adheri - přilínati, přilnouti

Adoleska - dospívající (v muže, ženu)

Adolta - dospělý

Agresi - válečně napadnouti

Analoj - anály

Aprezi - ocenit (něčeho uměleckou hodnotu a p.)

(Apreci)

Ascendi - vystupovati

Avanci - 1) postoupiti (v boji)

2) postoupiti (být povýšen)

Beata - blažený

Bestio - bestie (sovaĝbesto)

Bestiala - bestiální

Bizara - bizarní, podivný

Bohema - bohémský

Bruska - briskní, urážlivě úsečný

Brutala - brutální

Bukolika - pastýřský

Bunta - pestrý  
Citato - citát  
Darfi - směti  
Degni - (ntr.) uráčiti se  
Delekti (sin) - kochati (se)  
Delico - slast  
Descendi - sestupovati  
Disipi - plýtvati, mrhati  
Diurno - jeden den a noc  
Dokta - učený  
Dramaturgo - dramaturg  
Dura - tvrdý  
Ek! - Vzhůru! V chod!  
Ekscentra - výstřední  
Elano - elán  
Enorma - nesmírně veliký, enormní  
Ensemblo - soubor (např. divadelní)  
Erota - erotický  
Erupti - vybuchnouti (o sopce)  
Fajna - jemný  
Falto - vráska  
Febla - slabý  
Femina - charakteristicky ženský  
Finto - finta, úskok, trik  
Fragila - křehký  
Frida - studený, chladný  
Futuro - budoucnost  
Galaksio - mléčná dráha  
Gaskoni - chvástati se  
Gracila - útlý  
Hasti - chvátati  
Jelpi - kňučeti  
Kiromancio - hádání z ruky



Klostro - klášter  
Kloseto - kloset, záchod  
Koktelo - coctail  
Koncedi - (tr) připustiti, povoliti  
Konfronti - konfrontovati  
Kuloto - krátké kalhoty (po kolena)  
Kultivi - vzdělávati, pěstovati  
Kurta - krátký  
Langvoro - uvolnění (duševní, tělesné)  
Lanta - pomalý  
Lasciva - lascivní, chlípny  
Latrino - latrína  
Leĝera - ležerní (nenucený, nedbalý)  
Lici - (ntr) býti dovoleno  
Magra - hubený  
Majusklo - velké písmeno  
Majoritato - národní většina  
Maroro - koníček (záliba)  
Mesaĝo - poselství  
Minoritato - národní menšina  
Minusklo - malé písmeno  
Mitingo - tábor lidu, shromáždění  
Molesti (tr) - překážeti, obtěžovati  
Morna - chmurný, ponurý  
Moskatelo - muškátové víno  
Mungi - smrkati  
Negi (tr.) - negovati, popírati  
Nekromancio - vyvolávání mrtvých  
Neofito - nováček (novevarbito)  
Nikso - vodník  
Nilono - nylon  
Noci - škoditi  
Notico - krátká zpráva, noticka

Notora - notorický  
Nupto - sňatek, spojení dvou jedinců různ.pohlaví  
Obskura - temný  
Olda - starý  
Opresi - utiskovati  
Orgojlo - domýšlivost  
Ostenti - okázale se honositi, ještině se chlubit  
Pigra - líný  
Pikniko - piknik, oběd, svačina v přírodě  
Pimpa - švarný  
Plongî (ntr) - vrhnout se střemhlav do vody, v letectví letěti  
střemhlav  
Pluki - sbírat, trhati (jahody, květiny atd.)  
Plumpa - neforemný, nemotorný  
Pojno - zápěstí  
Povra - ubohý  
Prohibi - zakázati  
Prompta - promptní  
Refleksa - reflexivní  
Refreno - refrén  
Resoluta - resolutní  
Responsi (tr) - míti odpovědnost  
Restrikti - restringovati  
Retreto - ústup (armády)  
Riporti - dávat zprávy do novin  
Sanitara - zdravotnický  
Senila - stařecký  
Simuli - simulovat  
Sinekuro - důchod bez velké námahy  
Sinki - klesati  
Softa - tichý  
Spekti - přihlížeti, naslouchati (např. v divadle)  
Spektatoro - divák

Spuro - stopa  
Stop! - Stůj!  
Streta - úzký  
Sturni - hnáti útokem  
Superba - vznešený, velebně krásný  
Suspiro - povzdech  
Tajpi - psáti na stroji, klepati  
Tarda - pozdní  
Temerara - slěpě odvážný  
Tenera - něžný  
Trejni - trénovati  
Trista - smutný  
Turbulenta - turbulentní, bouřlivý, neklidný  
Turpa - ošklivý  
Vertiĝo - závrať (kapturniĝo)  
Vigli - býti čilý, bdíti  
Violenti - znásilniti  
Vringi - ždímati  
Zepelino - Zepelin (vzducholod')

---

## SKIZO PRI LA ESPERANTA LITERATURO

**Aŭtoro:** Vlastimil Novobilský, kultura delegito de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Junularo kaj ano de la Junulara Ekzamena Komisiono.

**Eldonis:** Esperanto-Junularo de Domo de Kulturo en Opava. La titolpaĝon proponis kaj skribis s-ano Dolfa Bartošík, Praha. La tekston maŝinskribis s-ano Vladimír Novotný, Praha.

---

Bitigis kaj kontrollegis Miroslav Malovec.

Kontrollegis kaj grafike finaranĝis

(kun respekto al la originalo) Pavla Dvořáková .

La elektronika versio estis publikigita 12.2.2021 omaĝe al

[Vlastimil Novobilský](#) (15.2.1935 – 11.2.2021) okaze de lia forpaso.